


中國新道

EL POPOLA


ĈINIO




Ŝanĝiĝo de Longkeng-distrikto

Vojaĝo ĉe Weishan-lago

• Privataj Frizejoj en Pekino







INTER NI

KVANKAM foto pri la Ĉiela Altaro estas bona, tamen ĝi estas superflua, ĉar tiu konstruaĵo laŭ mi aperas en ĉiuj bildoj, kiuj estas pri via lando.

Laŭ mi artikolo "Rompi Fern Bovlon" tute ne estas interesa por mi, ĉar mi sentas, ke ĝi temas pri ekonomiaj aferoj.

Rubriko "Ĉina Medicino" en la januara numero tre multe plaĉas al mi, ĉar delonge mi multe scias pri la kupa terapio, kiu estas konata ankaŭ en mia lando.

Mi rimarkigas al vi, ke en via revuo devas esti artikoloj ne nur pri atingoj, sed ankaŭ pri aferoj, kiuj malsukcesis, kaj pri tiaj, kiuj povas esti nekonvenaj por vi, sed konvenaj por alilandanoj.

Min ne interesas tiaj artikoloj, kiuj komenciĝas sur paĝo 10 kaj paĝo 16 de la februara numero... Raportoj pri vizitoj de diversaj ĉinaj Esp-delegacioj en aliaj landoj povus esti skribitaj alimaniere... Kiam mi rigardis rubrikon "Esp-novaĵoj", en ĝi estas denove du fotoj, kiuj estas malklaraj. Forigu tiajn fotojn. Bildoj pri raraj vegetaloj sur paĝoj 38-39 estas tre bonaj.

Bildoj kaj artikolo sub la titolo "Lando de Bicikloj" estas bonaj, ĉar mi multe ŝatas bicikli, eĉ vintre. Mi sentas, ke la plej granda problemo pri migrantoj estas ĝuste en Ĉinio... Laŭ mi rubriko "Kurantaj Aferoj" estus bona, se en ĝi ne estus tiel multe da informoj pri diversaj ekonomiaj atingoj... Laŭ mi la plej interesa kaj samtempe bonfaga artikolo estas "Ĉinio en Okuloj de Germano".

SEPPO PIETILÄINEN
(Finnlando)

Soso kreskanta el velkinta arbo
Foto de SUN YI

ENHAVO

- 6 **Ŝanĝiĝo de Longkeng-distrikto**
 18 **Vojaĝo ĉe Weishan-lago**
 10 Volontula tago sur Nankin-strato
 14 Sunenergio — valora riĉaĵo de la homoj
 48 **ĈINA LITERATURO:**
 Romanoj de Ming-dinastio (II)
 El la romano "Pilgrimado al la Okcidento"
 35 **Malfacila problemo por element- kaj mez-lernejoj en Ĉinio**
 54 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (6):**
 Abundo da antikvaj kasteloj kaj pasejoj
 16 Helpema nova riĉulo
 24 Pecetoj de la 74-a UK
 28 La disvolviĝo de Esperanto dependas de aplikado
 30 **SUR NIA LIBROBRETO:**
 Venku la naivan optimismon!
 34 **ESP-NOVAĴOJ**
 52 **POR KOMENCANTOJ:**
 Bonkora knabo
 33 Karmemore al s-ro Honfan
 32 **Li estis kiel perlo kaj tero**
 42 Privataj frizejoj en Pekino
 44 **Vojaĝo en suda Henan (I)**
 53 **ĈINA MEDICINO:**
 Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (IV)

- 59 **ĈINAJ ARTOJ:**
 Floraj kaj birdaj pentraĵoj de Ĉinio (II)
 23 **ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:**
 Va-aj knabinoj
 38 Religiaj konstruoj en Ŝanhajo
 4 **INTER NI**
 40 **KURANTAJ AFEROJ**
 13 **KORESPONDI DEZIRAS**

SUR LA KOVRILO:

Kampanarino preparanta kukon

Foto de **TANG MING**

INTERNE DE LA KOVRILO:

- 2 La kontenerizita kajo de Xingang-haveno

Foto de **LI CHUNGENG**

La nomita haveno situas ĉe la golfo de Bohai-maro tuŝanta Tanggu-distrikton de Tianjin, kie Haihe-rivero enfluas la maron. Plivastigita en la lastaj jaroj, ĝi estas la plej granda haveno por diversaj en norda Ĉinio kaj la plej granda kontenerizita kajo de Ĉinio.

- 4 Ŝoso kreskanta el velkinta arbo

SUR LA DORSKOVRILO:

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Stonehenge—antikva monumento

de **SIMON HEWITT** (Britio)


Samaĝaj ĉevalo (kalifo) kaj hundo (paco)

ludantaj

de **GIUSEPPE TRAMBAIOLO** (Italio)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Xuchang
2. Zunyi-gubernio
3. Leling
4. Weishan-lago



ŜANGÎĜO DE LONGKENG-DISTRIKTO

Teksto de WEI LIAO

Fotoj de LIU SIGONG




Ĉe rivero

En vilaĝa frizejo



La familio de kamparano Li Jiaqiang

Elementa lernejo en vilaĝo



GUIZHOU-provinco situas sur altebenaĵo kaj ĝia ĉefurbo Guiyang estas 1 073 metrojn super la marnivelo. Atinginte la provincon, mi aŭdis cirkulantan popolan kanton: "La serena vetero daŭras ne pli ol tri tagojn, eĉ malgrandan ebenejon oni tie trovas malfacile kaj la popolo vivas mizere." Ĝi montris la severajn naturajn kondiĉojn kaj la malfacilan vivon de la popolo.

En daŭra praktikado de la ĉinaj ekonomia reformado kaj pordmalferma politiko la malriĉaj regionoj

komencis strebi al riĉiĝo. Mi propraokule vidis tian ŝanĝigon en Longkeng-distrikto de Zunyi-subprovinco de Guizhou.

STANDARDO EN VENTO-PLUVO


Gongqing-vilaĝo, kie sidas la registaro de Longkeng-distrikto, estas standardo de kamparanoj por sin liberigi de malriĉeco, ne nur en la distrikto, sed ankaŭ en la tuta provinco.

En la periodo de komunumigo

de la kvindekaj ĝis la sepdekaj jaroj, Gongqing-vilaĝo estis standardo kontraŭ kapitalismo. Tiam oni praktikis en la ĉina kamparo la egalisman principon labori kaj distribui kolektive. Oni malpermesis al la kamparanoj kulturi ĉirkaŭ sia loĝejo grenon kaj legomojn por kovri konsumon de la familio, rigardante tion kiel kapitalisman agon, kaj malpermesis eĉ al maljunaj kamparaninoj vendi kokovojn en foiro. Gongqing-vilaĝo fidele observis tiujn regulojn.

En vintro 1978, la Tria Plena

En kamparana korto



Sesio de la 11-a CK de KPC elmetis la politikon reformi kaj perfektigi la kamparan ekonomian sistemon, kiu permesis laŭkontraktan terkulturadon laŭfamilie kun difinita produktokvanto, liberan komercadon kaj laŭleĝan ekziston de privata parcelo kaj libera pruntedono. Tiu ekonomia reformado ricevis varman respondon en la vasta kamparo de Ĉinio.

Kiam plejparto de la ĉina kamparo varme efektivigis laŭkontraktan terkulturadon laŭfamilie kun difinita produktokvanto, la kadroj de Gongqing-vilaĝo persistis en tenado de la egalisma standardo, tamen ĝi ŝanceliĝis jam en vento-pluvo.

En la periodo de komunumigo, kiam furoris egalismo, per unutaga laboro la kamparanoj de Gongqing-vilaĝo povis ricevi nur 0.08 juanon kaj 0.25 kilogramon da greno. La kamparanoj, ĉu laborantaj aŭ ne, same ricevis monon kaj grenon en la jarfino, tial ili ne volis aktive labori kaj surkampe la herboj pli prosperis ol la grenplantoj. En 1978 la pokapa jara neta enspezo estis nur 69.5 juanoj. Krom aĉeti oleon kaj salon, oni apenaŭ povis havigi al si novan veston.

La vilaĝanoj estis ĉiam pli mal-kontentaj pri la egalisma distribuo,

Parto de Longkeng-distrikto



laŭ kiu la diligentuloj vivtenas la maldiligentulojn. En 1984, la vilaĝanoj spontanee efektivigis laŭkontraktan terkulturadon laŭfamilie kun difinita produktokvanto, labori kaj distribui laŭfamilie, praktikis la distribuon regulon garantiendi difinitan kvanton da greno al la ŝtato, doni sufiĉan kvanton al la kolektivo kaj havigi la restan grenon al la terkulturisto. Tio certgrade grandigis la produktan kaj distribuon memdecidajn rajtojn de kamparanoj kaj vekis ĉe ili produktan entuziasmon. Dank' al tio aperis prospero en la agrikultura produktado. En 1988, kiam la produkta kvanto de greno multe reduktiĝis pro atako de plago, la pokapa jara grenkvanto de la vilaĝo estis 277 kilogramoj kaj la pokapa jara enspezo atingis 875 juanojn.

Kamparano Gao Guoxiao (Gaŭ Gŭoŝjaŭ) laŭkontrakte kulturis 9 muojn da tero (15 muoj = 1 hektaro). Pro manko de kemisterko, li do bredis multajn brutojn kaj metis herbon en la stalon por fari sterkon. Uzante tian naturan sterkon, li ĉiujare akiris riĉan rikolton. Oni diris, ke li ofte iras al foiro kun rizo kaj revenis kun duonkorbo da aĉetitaĵoj. La ekonomia reformado portis al li multan bonon.

En Gongqing-vilaĝo mi vizitis

familion de 40-jara kamparano Liu Liangyu. Antaŭ la kampara ekonomia reformado, kun fortika korpo li ĉiujare laboris pli ol 300 tagojn, sed jarfine li enspezis nur centojn da juanoj, tial lia familio vivis ne riĉe. Hodiaŭ, krom la konsumado en la vivo, ĉiujare li povas ŝpari 2 000-3 000 juanojn. En 1987, li konstruis loĝdomon kun areo de 150 kvadrataj metroj kaj havigis al ĝi familiajn elektroaparatojn. Li, liaj edzino kaj 16-jara filo vivas bonhave kaj feliĉe.

DISVOLVIĜO DE VILAĜAJ KAJ URBETAJ ENTREPRENOJ

73% de la tero de Guizhou konsistas el kalkoŝtono, kiu havigas al la provinco multajn karstajn kavernojn vidindajn por turistoj kaj estas bona materialo por produkti cementon.

En la tempo, kiam Longkeng-distrikto efektivigis laŭkontraktan terkulturadon laŭfamilie kun difinita produktokvanto, ĝi komencis disvolvi vilaĝajn entreprenojn por havigi laboron al la superflua laboruloj kaj akceli la disvolviĝon de kampara var-ekonomio.

La Longkeng-a Cementa Fabriko estas la unua kaj plej granda entrepreno fondita de la distrikto. En 1978 la distrikto mem kolektis kapitalon kaj prunteprenis monsumon de banko por konstrui la malgrandan cementan fabrikon kun jara produktokvanto de 3 000 tunoj. Dank' al la abunda materialo kaj la debito de produktaĵo, la fabriko multe disvolviĝis. Nun ĝia jara produktokvanto atingis 16 000 tunojn kaj la fabriko ricevis provincan honoron de bonkvalita produktaĵo.

La distrikto nun havas pli ol 110 entreprenojn, interalie la jara produktovaloro de 19 entreprenoj, inkluzive fabrikojn de cemento, brikoj, ŝtonaĵoj kaj konstrupecoj, superis 100 000 juanojn. En 1988 la totala industria produktovaloro de la distrikto atingis 11 870 000 juanojn kaj multe superis tiun de la samjara agrikulturo.

La disvolviĝo de vilaĝaj kaj urbaj entreprenoj havigis laboron al kamparaj superfluaĵoj laboruloj. En Gongqing-vilaĝo pli ol 600 kamparanoj fariĝis laboristoj kaj okazis granda ŝanĝiĝo al ilia vivo. La distrikto ĉiujare elprenis monsumon el la industria enspezo por helpi la disvolviĝon de agrikulturo.

RUDIMENTO DE URBETO

La registaro de Longkeng-distrikto sidas en Majiawan (Maĝjaŭan). En la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio, tie estis nur tri kabanoj. En la fino de la kvindekaj jaroj, oni konstruis tie Gongqing-lagon, kio ŝanĝis la akvomankan staton, alilokaj kamparanoj sinsekve transloĝiĝis tien kaj tiel formis Gongqing-vilaĝon.

En la okdekaj jaroj, rapide disvolviĝis agrikulturo kaj vilaĝa industrio. Tien trapasas la Sichuan-Guizhou-a Ŝoseo. La aŭtoj portis al la loko grandan kvanton da ekonomiaj informoj, kiuj multe akcelis ĝian var-ekonomian disvolviĝon. En 1987 la kamparanoj, loĝantaj ambaŭflanke de la ŝoseo ĉe Majiawan, sinsekve konstruis loĝdomojn, interalie pli ol 30 kamparanaj familioj konstruis domojn por loĝado kaj komercado. Ankaŭ la guberniaj kooperativo kaj ĉiovendejo konstruis tie du komercajn etaĝdomojn. Sekve de tio, la ordinara vilaĝo fariĝis movoplena urbeto. Laŭ statistiko, tien ĉiutage trapasas pli ol 30 000 homoj kaj en tempo de foiro alfluas diversaj vendantoj kaj aĉetantoj.

Por plue disvolvi var-ekonomion de la loko, la distrikta registaro kaj la loka organizo de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo kolektis kapitalon kaj konstruis novan foirejon apud la nuna urbeto en vintro 1988. Nun konstruiĝis vicoj da aĉeteblaj domoj. Distriktestro Li Deyi diris, ke post nelonge la loko fariĝos centro de la distrikto.

DISTRIKTESTRO LI DEYI

38-jara Li Deyi kun densaj bro-



Distrikta kuracejo

voj kaj grandaj okuloj vere estus bela viro, se liaj dentoj ne flaviĝus de fumo.

Kiel distriktestro, li administras 6 vilaĝojn el 2 473 familioj kun pli ol 11 000 loĝantoj.

Li Deyi estis kamparano. En 1973, post kiam li diplomitiĝis el supera mezlernejo, li hejmvrenis kaj terkulturis duonjaron, poste li estis engaĝita de la agrikultura buroo de la gubernio. Antaŭ tio li funkciis kiel vilaĝa instruisto. En 1986 li fariĝis distriktestro de Longkeng.

Li Deyi akiris okulfrapan sukceson en Longkeng. En 1978, la pokapa neta enspezo de la distrikto estis malpli ol 130 juanoj, sed en 1988 la enspezo atingis 656 juanojn. Antaŭ lia alveno al la distrikto la kamparanoj plejparte loĝis en lignaj domoj aŭ kabanoj. Nun malaperis la kabanoj. Proksimume mil kamparanaj familioj konstruis aŭ rekonstruis pli bonajn loĝdomojn kun plankareo de pli ol 94 000 kvadrataj metroj. La kamparanoj, kiuj antaŭe eĉ ne sciis kio estas televido, fariĝis ĝiaj konstantaj rigardantoj.

Parolante pri la estonta Longkeng-distrikto, Li Deyi konigis al mi: "En la venontaj jaroj Longkeng-distrikto ankoraŭ disvolvos industrion, agrikulturon kaj var-ekonomion, akcelante kaj helpante agrikulturon per industrio por fari la lokon urbeto."

Li Deyi konigis al mi ankaŭ, ke estas en plano la duperioda konstruo de nova urbeto, kiu etendiĝos al Gongqing-lago, kaj oni faros la lagon turisma vidindejo.

Li diris malkaŝe, ke 5% de la kamparanoj de la distrikto ankoraŭ havas malfacilon en sia vivo, ilia pokapa jara enspezo estas malpli ol 200 juanoj.

Same serioza stato ekzistas en Guizhou-provinco. En la provinco minimume 5 000 000 loĝantoj vivas ege malriĉe. Laŭ plano de la registaro de tiu provinco, ĝis 1990 ĝi solvos la problemon pri la vivo de la loĝantoj en la malriĉaj gubernioj kaj efektiviĝos la celon, ke ilia pokapa jara enspezo superos 200 juanojn. Tio sentigis al mi profunde, ke estos penigaj la taskoj por vere forpeli la malriĉecon de la kamparanoj kaj daŭre praktiki la ekonomian reformadon en Ĉinio, precipe en la interna landparto. ■

Volontula Tago sur Nankin- strato

Teksto de LU GUOYUAN

Fotoj de YU XINBAO



Korpo-ekzameno al maljunulo

ANTAŬTAGMEZE de la 20-a de ĉiu monato sur Nankin-strato, la plej vigla komerca strato de Ŝanhajo, regas interesa spektaklo: Homoj, torentantaj al magazenoj en la ordinaraĵoj, nun svarmas antaŭ la strataj stabloj.

“Ne funkcias mia horloĝo,” transdonis junulo malnovan vekhorloĝon al riparisto, kuspis sian manikon kaj montris, ke ne funkcias ankaŭ liaj 2 brakhorloĝoj. “Kiom da horloĝoj ne funkcias, tiom multe

mi riparos,” tion dirante, la riparisto prenis la horloĝojn de la junulo.

Ĉe stablo tajloro kun rideto tajlis veston por iu alilokano kaj kudris lian difektitan vatitan jakon.

Sur la servostablo de la Ŝanhaja Vendejo de Lumiloj estis metitaj diversaj tablolampoj riparendaj. Iu pli-ol-70-jara maljunulo metis sur ĝin alian lampon per tremanta mano. Li estis favorita kaj post 3 minutoj la tablolampo relumis.

Riparo de horloĝoj



Senpaga servo sur Nankin-strato





Riparo de ombreloj

La 20-an de ĉiu monato komizoj de la vendejoj sur Nankin-strato senpage servas al la urbanoj. Ekde 1982, la 20-an de ĉiu monato, pli ol 4 200 junaj komizoj el 184 vendejoj sur la strato starigas stablojn, antaŭ ol funkcias la vendejoj, por senpage servi al la loĝantoj. Tie oni riparas hejmajn elektroaparatojn, horloĝojn, okulvitrojn, valizojn, ombrelojn, ŝuojn ledajn kaj tolajn. Kontentiĝas ankaŭ tiuj, kiuj deziras ŝanĝi sian loĝejon. Oni iras tien, kiel al foiro, kio faras la straton aparte movoplana. Laŭ

nekompleta statistiko, en la lastaj 7 jaroj pli ol miliono da homoj estis favorita en la volontula tago.

Tao Yijia (Tao Jigja), prezidantino de la laborista sindikato de la Medikamenta Kompanio de Huangpu-distrikto, iras al servotablo antaŭ la Unua Apoteko de Ŝanhajo frumatene kaj tie ŝi mezuras korpopezon kaj sangpremon al pasantoj. Ŝi ja estas iniciatintino de la volontula servo.

En 1982, Tao laboris kiel vicsekretario de la filio

Guan Liping flikas ŝaflanan puloveron.



de la kompartio de la apoteko. Laŭ ŝia iniciato, 5 junuloj de la apoteko starigis la unuan servostablon sur Nankin-strato. Poste, Tao estis transpostenigita, tamen ĉiufoje en tiu tago ŝi venas tien por labori surstrate kune kun siaj antaŭaj kolegoj. "Oni devas havi aspiron. Servi al la popolo kiel Lei Feng ja estas mia aspiro. Tion mi daŭrigos por ĉiam," ŝi diris.

Lei Feng estis juna armeano de Ĉinio en la 60-aj jaroj. Li donis al la ĉinaj junuloj bonan ekzemplon de fervora helpo al aliaj. Prezidanto Maŭ Zedong alvokis la tutan landon: "Lernu de kamarado Lei Feng!"

"Kamarado, kie estas onjo Guan?" haste venis el antaŭurbo de Ŝanhajo al la servostablo de la Unua Magazeno de Ŝanhajo iu knabino kun maltrankvilo. Fine de la lasta jaro ŝi aĉetis belan ŝaflanan puloveron. Portante ĝin dum la Printempa Festo, ŝi faris

Senpaga vesto-farado



Entuziasma ŝlosilfaristo



trueton sur ĝi pro malatento. Oni diris al ŝi, ke Guan Liping, komizino de la Unua Magazeno de Ŝanhajo, la 20-an de ĉiu monato flikas puloveron surstrate, tial ŝi rapidis de la antaŭurbo frumatene tiutage. Fliki tian truon por Guan ja estas bagatelo. En la lastaj 6 jaroj ŝi senpage flikis pli ol 6 000 puloverojn. Guan diris: "Oni vivas kun signifo nur tiam, kiam oni donas al aliaj pli multe ol oni ricevas de ili." Ŝi lerte kaj rapide flikis la puloveron. La knabino prenis ĝin kaj diris: "Onjo, mil dankojn al vi! Via servo ja estas laŭdinda!"

Homoj svarmis antaŭ la servotablo de Zou Zhonglei (Zou Gonglej), oficisto de domadministrejo de Longmen-strato. Tie oni konkure demandis lin pri la politiko pri domoj, havigis al si informojn pri domŝanĝo aŭ prunteprenis liajn biciklo-riparilojn kaj pumpilon. Por Zou estis unufoje fari volontulan servon sur Nankin-strato. Antaŭ 6 jaroj, kiam komenciĝis la volontula tago sur la strato, li starigis servotablon antaŭ la domadministrejo, sur la strato Yan'andonglu n-ro 1 100. Li senpage servis al pasantoj de la 6-a kaj duono ĝis la 8-a ĉiumatene. Li neniam ĉesigis tiun servon dum la 7 jaroj. Antaŭ 10 tagoj, pro la laborŝanĝo, li translokis sian servotablon al Weihai-strato, tre proksima al Nankin-strato, kaj tial li enviciĝis inter la volontuloj. Kial li daŭrigis sian servon dum 7 jaroj? "En la socio oni obstinas en sia antaŭjuĝo pri ni, oficistoj de domadministrejo. Mi donu ekzemplon por ili," diris Zou.

La Ŝanhaja Komitato de la Komunisma Junulara Ligo faris specimenan enketon en 1988. La rezulto montris, ke 62.4% de la enketitoj estas nekontentaj pri la socia servado. Multaj el ili deziras ŝanĝi tiun staton per sia propra penado. Wu Wenqing (U Venĉing), tajloro de la fama vestovendejo Peiluomeng, ja estas unu el ili. Antaŭ la tajlora stablo de la Vesto-kompanio de Huangpu-distrikto staras multaj homoj. Tio estas stablo speciala por maljunuloj, infanoj kaj homoj bezonantaj veston de anormala mezuro. Por ili aĉeti konvenajn vestojn en magazeno estas malfacile kaj ili kompreneble ne volas preterlasi tiun bonŝancon. Ĉiufoje en la volontula tago Wu Wenqing kontentigas dekojn da homoj. "Mi neniom malprofitas de tio, tamen mi estas laŭdata de la publiko. Tio estas neaĉetebla," diris tajloro Wu.

La volontula servo okazas ne nur sur Nankin-strato. Materialoj donitaj de la Ŝanhaja Komitato de la Komunisma Junulara Ligo montris, ke nun en Ŝanhajo viglas sume 200 servaj taĉmentoj. Proksimume 200 000 gejunuloj senpage servas al urbanoj en la feriaj tagoj kaj festotagoj. Ili starigas servostablojn surstrate aŭ iras al loĝkvartaloj, fabrikoj, oficejoj kaj lernejoj por ripari fridujojn, televidilojn, horloĝojn, tondi harojn, tajli veston, ripari ŝuojn k.s. Tiaj taĉmentoj senpage servas ne nur sur komercaj stratoj sed ankaŭ en malproksimaj lokoj de la urbo.

Deng Weizhi, sociologo de Ŝanhajo, diris, ke ne

KORESPONDI DEZIRAS

* Christopmer A. Przybyla, 22-j., volas kor. tm., interesigas pri geografio, biologio kaj muziko. Adr.: ul. Niedzialkowskiego 1 d m 1, PL 67-200 Glogow, Pollando.

* Aleksandr Kovaljov, 32-j. fotisto, dez. kor. tm., interesigas pri naturo, turismo, kaj kolektas monerojn. Adr.: per. Majskij 2-6, Magadanskaja obl. Omsukcan, USSR.

* Wang Zhiyu, 19-j., dez. kor. tm. pri diversaj temoj, kolekti kaj interŝ. bk. pm. ktp. Adr.: Yian Shijieyu Xiehui, 161500 Yian, Heilongjiang, Ĉinio.

* He Zhihui, dez. kor. kun esp-istoj el Brazilo, Kolombio, Venezuelo kaj aliaj landoj de Latinameriko, kaj interŝ. pm. kaj bk. Adr.: 1-05 3 Men, 4 Dong, Dongguashan Sancun, Changsha, Hunan, Ĉinio 410002.

* William H. Simcock ĵus transdonis la administradon de "Geonkloj Esperantistaj" al fraŭlino Pearl Bellis, Rockwood, 44 Ladderedge, Leek, Staffs., Britujo, ST13 7AE.

* La Singapura Esperanto-Asocio estas nova asocio. La membroj bezonas geesperantistojn viziti nin, kaj bezonas helpojn kaj inspiron por ke la asocio evulu. Kiu ajn venos ĉi regionon bonvolu skribi al mi aŭ kontaktu min en Singapuro. Lee Kim Kiew, 11 Jalan Batu 04-152, Singapore 1543, Tel.: 4404746.

* J Jankowiak, 17-j. volas kor. tm. pri diversaj temoj, interesigas pri literaturo, danco, muziko, pentraĵo, arto. Volas koni la kulturon de aliaj landoj. Adr.: ul. M. Konopnickiej 4B/9, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando.

* Pluraj ĉinaj gesamideanoj sendas al mi leterojn kun adresoj nesufiĉaj aŭ nelegeblaj. Plej bone estus, se la ĉinaj gesanoj sur apartaj paperfolioj skribus sian adresojn precizajn ĉu en Hanyu Pinyin, ĉu en ĉinaj ideogramoj kaj ilin mi povus simple surglui sur la koverto. Josef Kondor, FR Germanio.

* Kovnators Naumo, 31-j. instruisto, dez. kor. tm. pri neuzitaj poŝtmarkoj kaj bildkartoj de urboj. Adr.: 229700 Liepaja, Fr. Brivzemnieka 24-a, Latva SSR USSR.

* Justyna Sobczak, 17-j. knabino volas kor. tm. pri ĉt. esperante kaj germane. Adr.: ul. Hanki Sawickiej 16, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando.

* S-ino Veselka Nenĉeva dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: BG-5400 Sevlievo, Centro Poŝto-Poŝt Restante, Bulgario.

* Junaj membroj de Badulla Alta lerneja-Esperanto unuigo dez. kor. kun diverslandaj geesp-istoj pri ĉt., 15-25-j. Skribu al: U. Zeiter Perera, Badulla Maha Vidyalaya, Badulla Srilanka.

* 19-70-j. esp-istoj dez. kor. tm. Provizora adreso: Esperantoklubo, "Hristo Kozlev", PK 61, 5180 Pol-

ski Trambes, Bulgario.

* Adam Lipinski, 17-j., dez. kor. tm. pri sciencaj temoj kaj aliaj temoj. Adr.: Str. Tadeusza Kasciuszki 14a, 08-300 Sokolow Podlaski, Pollando.

* C R Lindenmo, 66-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Justeliusgatan 27, S-575 34 Eksjo, Svedio.

* Rune Ekmark, maŝinteknika inĝeniero 63-j., dez. kor. kun samprofesiano pri projektgvidado. Adr.: Linnevagen 12, S-81131 Sandviken, Svedio.

* Xiong Guoqi, 33-j. laboristo, dez. kor. kun esp-istoj. Adr.: Hua Dong Yuan 3 Dui, San Dun Zhen, Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio.

* Zhong Zhenye, 24-j. teknikisto, dez. kor. tm. pri muziko, komputero kaj aliaj temoj, kaj interŝ. pm. Adr.: 901 Shi, 42 Ba Qi Er Ma Lu, Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

* Wang Fu, 27-j. inĝenieradjunkto, dez. kor. tm. pri ĉt. Esperante, japane aŭ angle, interŝ. pm. pk. kaj E-eldonaĵojn. Adr.: Cheng Jian Zong He Kai Fa Gong Si, Ma Sheng Miao Jie, Zhangye, Gansu, Ĉinio.

* He Zhihui, dez. kor. kun samideanoj el Francio, Sovetunio kaj Nordeŭropaj landoj kaj interŝ. pm. Adr.: 1-05# 3 Men, 4 Dong, Dong Gua Shan San Cun, Changsha, Hunan, Ĉinio 410002.

* 57j virino dez. kor. kun geesperantistoj tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: S-ino. Ost Renée, Vogelpersstrato, 71, 1500 Halle, Belgio.

gravas, kiom da valoro donas al la socio tiu volontula servo, sed gravas, ke tiuj gejunuloj montras al la socio sian propran valoron: alte taksi la publikajn moralojn, strebi antaŭen kaj teni fortan respondecon por la socio. 51-jara Deng estas vicĉefredaktoro de "Enciklopedio" de la Ŝanhaja Akademio de Sociaj Sciencoj. Li tenas intimajn rilatojn kun ĉ.100 junuloj de diversaj sociaj rondoj de Ŝanhajo.

Zhu Husheng (Ĝu Huŝeng), konduktoro de la trolebuso n-ro 19, kiun oni honoras per "viva mapo", diris: "En la pasinteco niaj konduktoroj ofte kverelis kun pasaĝeroj. Ili servis malbone. Mi malŝatas tion kaj volas doni al ili bonan ekzemplon." Ĉiumonate en du feriaj tagoj li servas en haltejo: helpi al

maljunuloj kaj infanoj en- kaj elbusiĝi, montri vojon al fremduloj. Por tio li bone memoras la situon de ĉiuj fabrikoj, vendejoj, hospitaloj k.a. laŭlonge de la strato trapasata de la trolebuso. Respondeculo de la Publik-trafika Kompanio de Ŝanhajo diris, ke en la kompanio 120 konduktoroj laboras en la volontula tago sur 30 linioj.

Zhu Rongji (Ĝu Ĵongĝji), urbestro de Ŝanhajo, estas fiero pro tiuj gejunuloj. Li diris, ke la diversaj aktivadoj de la volontula servo fare de ŝanhajaj gejunuloj montras ilian novan spiriton kaj estas utilaj por starigi la bonan socian moron "Mi faras ĉion por aliaj kaj ili por mi." ■

Sunenergio — valora riĉaĵo de la homoj

MALFACILO EN LA MONDA ENERGIO

Energio estas grava materia bazo por la homa vivo. Ĉiu grava invento de energia tekniko estigis ŝanĝigon de la produkto kaj socio. La industria revolucio rezultis el la rekta uzado de karbo kaj petrolo. La homa civilizacio refoje rapide progresis dank' al apero de elektro.

Ja estas vero, ke la energiaj teknikoj alportis al la homoj grandan riĉaĵon, sed ili samtempe tre rapide forkonsumis valorajn riĉfontojn formiĝintajn de la naturo en milionoj da jaroj. Ekde la 50-aj jaroj, la neregeneraj energioj terure konsumiĝas. Laŭ statistiko de usona Revuo "Petrolo kaj Natura Gaso" en 1988 la petrola rezervokvanto de la tuta mondo estis 121 554.7 milionoj da tunoj, dum ĉiujare oni ekspluatas 2.9 miliardojn da tunoj da nafto. Laŭ tiu rapideco la rezervokvanto de la oleo sufiĉas por nur 40 jaroj, tiu de natura gaso por 50 jaroj kaj tiu de karbo por 240 jaroj.

En tiaj cirkonstancoj oni devas esti singardema

Tibeta paŝtisto uzas sunfornon.



por solvi la problemon de energioj kaj moderigi la krizon pri la energioj en la mondo.

Antaŭ la krizo, oni turnis la atenton al altaj teknikoj kaj regeneraj, disaj kaj variaj energioj. La novaj energioj, kiaj la suna, nuklea, biologia, tervarma, venta kaj tajda, estos grava konsistiga parto de la energia sistemo en la estonteco. Ĝuste ili fariĝos movforto de la nova industria revolucio de la mondo.

SUNENERGIO, LA PLEJ ELSTARA EL LA NOVAJ ENERGIOJ

En uzado de sunenergio oni ne bezonas transporti fuzaĵojn, nek transmision elektron, ĉar oni povas produkti ĉeloke elektran energion per malgranda energiotransforma maŝino. Oni povas rekte uzi sunenergiecon por varmigi kaj fridigi, sen transporti fuzaĵojn kaj elektron de malproksime. Tiuj avantaĝoj estas sufiĉaj por kovri la koston por transformi sunenergiecon en elektron kaj konservi la energion pro nekontinua radiado de la suno. Ĝuste pro tio pluraj landoj entuziasme disvolvas kaj utiligas sunenergiecon, malgraŭ ke la instalaĵo de la lasta estas pli multekosta ol tiu de la ordinara fuzaĵoj.

En la estonteco, la elektroprodukta sistemo kun ordinara fuzaĵoj kiel energio kaj la elektra retoj certe kovros la tutan Teron. Sed nun estas 2 000 milionoj da homoj en la mondo, kiuj ankoraŭ ne havas elektron kaj ili havas elektron nur post multaj jaroj. Krome oni devas multe elspezi por elektrizi la kamparojn, kie disvivas la loĝantoj.

Ekz., nun al Pakistano mankas 20 000 putoj por lavi la alkalajn terojn. Por tion efektiviĝi ĝi bezonas elektrajn pumpilojn, grandan elektrejon kaj elektrokondukan sistemon. Se oni havas praktikajn sunenergiajn akvopumpilojn, oni do ŝparus la monon por konstrui la multekostan elektrokondukan sistemon.

Antaŭe, la subevoluintaj landoj neniam atingis kontentigan sukceson en utiligo de sunenergio, pro manko de monaj rimedoj kaj teknikistoj, malgraŭ, ke en tiuj landoj estas sufiĉaj sunlumoj.

Sed hodiaŭ la faktoj pruvis ke oni povas profiti de sunenergio en varmigado, malvarmigado kaj transformado de sala akvo en dolĉan. Kompreneble, oni povas ankaŭ transformi sunenergiecon en aliajn movfortojn.

Por sciencistoj kaj teknikistoj de diversaj landoj la urĝe solvendaj problemoj estas malpliigi la elspezojn de la supre menciitaj servoj, proksimumigi la elspezon por sunenergiaj instalaĵoj kaj tiun de la fuzaĵoj, elektroenergio, brutoj kaj homfortoj. Nun estas inventitaj novaj materialoj, kiaj malmultekosta sunradio-eltena kaj travidebla plasto kaj ultrapura duonkonduktanto. Krome ni havas novan sciencan koncepton, akumulis spertojn pri inĝenieraj teknikoj kaj pli klare ekkonis la utilon kaj bezonon de sunenergio en la mondo.

REKTA UTILIGO DE SUNENERGIO

En la lastaj jaroj tre aktiva estas la studo pri rekta utiligo de sunenergio en pluraj landoj. En utiligo de sunenergio, la rendimento de transformiĝo de sunlumo en elektron per nekristal-silicia sunenergia pilo jam atingis 10-12%. Nun oni klopodas por levi ĝin al 15-20% kaj faras ĉion eblan por redukti la elspezon por instali aparaton produktantan unu vatton da elektro al ĉ. unu usona dolaro. Antaŭ nelonge la Universitato de Stanfo, Usono, sukcese faris sunenergian pilon kun silicio kiel ĉefa materialo, ĝia energiotransforma povo estas 27.5%, je nur 4% malpli multe ol tiu de la elektrejo funkciigata per karbo. Poste, iu altteknika kompanio de Masaŝuseco, Usono, deklaris, ke ĝi inventis 2 novajn metodojn por produkti sunenergian pilon, kiu povas transformi 70-80% de sunlumo en elektron, tiel ke la produktokosto de ĉiu kilovatto-horo da elektro estas nur 0.03-0.04 usona dolaro.

FR Germanio inventis novan sunenergi-konservilon kun praktika valoro, kiu faciligis elektroproduktadon kaj hejtadon per sunenergio en la landoj, kies latitudoj estas similaj al tiuj de FR Germanio.

Lastatempe, en Hanovra Ekspon-Centro, FR Germanio, oni starigis sunenergian ŝargejon altan je 42 m., kiu transformas sunenergian en elektron kaj ŝargas akumulatorojn de specialaj veturiloj de la ekspozicio. En la ordinaraj tagoj la transformita elektro konserviĝas en komuna elektra reto. En la sunoplenaj tagoj, la totala kapacito de tiu sunenergia ŝargejo estas 15 kilovattoj.

De 1958, kiam Ĉinio komencis esplori solkristalan silician sunenergian pilon, multe progresis ĝia esploro, produkto kaj praktiko de sunenergia pilo. Nun dekoj da institutoj, altlernejoj kaj fabrikoj sin okupas pri tiu laboro. Ekde 1971, Ĉinio uzas sunenergian pilon en la kampo de kosmonaŭtiko, signala lumo, fervoja signalaro, meteoro, prognozo de tertremo, telekomuniko, horloĝo, jakto k.a.

Kaj plie Ĉinio nun havas pli ol 50 000 sunfornoj. En Yongjing-gubernio, Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio, ĉ. 70% da kamparanaj familioj uzas sunfornon, dank' al kiu oni fundamente solvis la tiean hejtaĵan problemon. Hodiaŭ Ĉinio produk-

tas 10 specojn de sunenergiaj akvovarmigiloj. Sole en Tianjin funkcias 2 000 sunenergiaj akvovarmigiloj. En Daxing-gubernio, antaŭurbo de Pekino, funkcias kampara eksperimentejo, kie sunenergio anstataŭis ordinarajn energiojn. Ĝi estas konstruita de ĉinaj kaj FR Germanaj teknikistoj. Antaŭ nelonge ekfunkciis sunenergia pumpstacio kun kapacito de 10 kilovattoj, kiu liveras ĉiutage pli ol 100 tunojn da subtera akvo, tiel ke fundamente solviĝis la problemo pri akvo bezonata de la homoj, brutoj, irigacio kaj vilaĝaj entreprenoj.

Unuvorte, la homa esploro, kono, utiligo kaj ekspluato de sunenergio pli kaj pli disvolviĝas kun la progreso de la homa socio, sciencoj kaj teknikoj. Ni kredas, ke en la proksima estonteco sunenergio fariĝos unu el la ĉefaj faktoroj, dank' al kiu homaj sciencoj kaj teknikoj grandpaŝe progresos. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

KONTRIBUU POR LA RUBRIKO "MI KAJ ĈINIO"

Karaj legantoj

Por festi la 40-jariĝon de EPC en la venonta majo, ni petas vian kontribuon por la rubriko "Mi kaj Ĉinio".

Vi povas verki pri: impresoj pri Ĉinio, amika kontakto kun ĉinoj aŭ ĉinaj esperantistoj, amikeco kun EPC ktp. Via artikolo povas esti en ajna stilo aŭ formo, sed ne pli-ol-tri-paĝa (laŭ la formato de EPC). Bonvenaj estas koncernaj fotoj (inkl. de portreto de la aŭtoro). Limdato: la 31-a de januaro 1990 (laŭ vialoka poŝtstampo).

Ni aperigos bonajn verkojn el la kontribuoj en EPC. Ni aljuĝos la unuan premion al 1, duan premion al 3 kaj trian premion al 5 kontribuintoj. La premioj estos ĉinaj metiartaĵoj. Nepremiitaj kontribuintoj ricevos donaceton.

La rezulto de la aljuĝo legiĝos en la 6-a numero de 1990.

Ni anticipe dankas vin por la kunlaboro.

La Red.


ZHENG ZHENJIE:

Helpema nova riĉulo

TIU ordinara kamparano, kiu antaŭe estis strata metiisto, riĉiĝis en la lastaj jaroj. Tamen li ne forgesis siajn malriĉajn samvilaĝanojn, kiuj trenis vivon kiel li en la pasinteco. Per sia mono li faris multe da bonoj por ili.

Li aĝas 35 jarojn kaj en simplaj vestoj neniom malsimilas al tiuj junaj kamparanoj, kun kiuj mi

Liang Xisen (dekstre) kaj lia gasto



ofte renkontiĝis sur la ebenaĵo en nordokcidenta Shandong-provinco, sed li estas multe pli okupita ol la ordinaraj kamparanoj. Post klopodo mi sukcesis vidi lin, Liang Xisen (Ljang Ŝjisen) de la vilaĝo Liangzhui en la antaŭurbo de Leling, Shandong-provinco.

Mi informiĝis de li, ke en lia infaneco lia familio vivis mizere. 13-jara, li devis ĉesigi sian lernadon kiel unuaklasa lernanto kaj komencis vagan vivon kune kun sia patro, kiu estis forĝisto. Martelado akompanis lian kreskadon.

Post kiam en la ĉina kamparo oni ekpraktikis la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado, li ĉesigis forĝadon kaj anstataŭe kulturis laŭkontrakte 7 mu-ojn da kampoj por greno kaj 8 mu-ojn por koton (15 mu-oj egalas unu hektaron).

La longtempa vaga vivo larĝigis lian vidkampon. Li bone scias, ke kiel aliaj entreprenoj kamplaboro estas nedisigebla de scienco kaj kulturo. Por altigi la kotonan produktokvanton, li piediris pli ol 20 kilometrojn kaj petis teknikiston analizi la konsiston de lia grundo. Laŭ la analizo li grasigis sian kotonkampojn per fosfora sterko. Rezulte de tio, la mu-a produktokvanto de sensemigita koton de lia kampo atingis 400 kilogramojn, dum tiu de alies kampo ne grasigita per tia kemiaĵo estis nur 200 kilogramoj.

En tri jaroj li enspezis pli ol 10 000 juanojn per vendo de kotono.

Nun Liang Xisen fariĝis riĉulo el malriĉa forĝisto. Kiel elspezi la akiritan monon? Unue li fondis farejon de mantooj (vaporumita farunaĵo) por vilaĝanoj. Por vaporumi mantoojn necesas sodo, kiu tamen malkomponas vitaminojn kaj perdigas al faruno bonan guston. Li pensis, ĉu eblas prepari mantoojn sen sodo. Post provado li sukcesis prepari tiajn mantoojn. Pro sia bongusteco kaj malmulta kosto la mantoo estis tre bonvena en la merkato. Sub lia influo multaj vilaĝanoj starigis similajn farejojn. Ĉie en la urbo kun areo de 150 kvadrataj kilometroj vendiĝis tiaj mantooj. En 1988 la vilaĝanoj enspezis 270 000 juanojn per vendo de mantooj kaj la pokapa enspezo kreskis je 850 juanoj. Multaj farejoj estis subvenciitaj de Liang Xisen. Ekz., lia helpanto Liang Chunfeng intencis funkciigi farejon de mantooj, sed al li mankis mono. Vidinte tion, Liang Xisen donis al li 2 000 juanojn kaj helpis lin instali fornon. La vilaĝanoj dankeme diris: "Li riĉiĝis, tamen ne forgesis nin."

Antaŭe la vilaĝanoj devis iri longan vojon por ŝanĝi sian tritikon kontraŭ faruno. En 1984 li investis 27 000 juanojn por konstrui muelejon de faruno en la vilaĝo. Kelkajn jarojn poste, li funkciigis ankaŭ kolor-teksejon. Nun li estas kamparano-entreprenisto kun fiksa kapitalo de 1.7 milionoj da juanoj.

La vilaĝanoj devis iri pli ol unu kilometron por preni akvon. Li do elspezis 37 000 juanojn por provizi la vilaĝon per kranakva instalaĵo. Krome, li pagis por elektraj dratoj kaj fostoj, ke ĉiu familio povas uzi elektron.

En la vilaĝo estas nemalmultaj senhelpaj maljunuloj. Ili vivis malfacilan vivon. Li donis 100 000 juanojn por konstrui maljunulejon. 14 maljunuloj el ses distriktoj senpage loĝas kaj manĝas en la maljunulejo. La pokapa monata manĝkosto estas 83 juanoj kaj la sumo estas sufiĉe rimarkinda en la ĉina kamparo. Por vigligi la vivon de la maljunuloj, li aĉetis por la maljunulejo koloran televidilon kaj videoaparaton kaj konstruis banĉambron kaj amuzejon. En ĝi laboras servistoj kaj sanitaristoj.

Por ŝanĝi la ideologion de vilaĝanoj, ke multe da gefiloj feliĉigas siajn gepatrojn kaj filoj garantias ilian vivon en la maljuneco, li iniciatis la asekuron pri emeritiĝo en la kolor-teksejo kun 156 laboristoj kaj oficistoj. Oni kondiĉas, ke ĉiu paro da junaj geedzoj, kiu promesas naski nur unu infanon laŭ kontrakto subskribita kun la teksejo, havas la rajton ĝui la asekuron pri emeritiĝo kaj ĉiu el ili ricevos almenaŭ 120 juanojn monate post sia emeritiĝo.

La domoj de la elementa lernejo en la vilaĝo estis



En la maljunulejo

simplaj, kaj adoboj servis kiel tabloj. Ofte okazis, ke somere pluvo tralasigis tra tegmento kaj vintre la geknaboj ne povis lerni pro frosto. Tio multe malhelpis la instruadon. Tiutempe en la vilaĝo malpli ol 50% de la lernoagaj knaboj vizitis lernejon. Vidinte tion, li rememoris sian pasintecon: Foje li oficvojaĝis al urbo en nordorienta Ĉinio. Eltrajniĝinte, li demandis pasanton, kie estas hotelo. Pro sia analfabeteco li ripetis la demandon eĉ tuj antaŭ hotelo kun ŝildo. Ne volante, ke la geknaboj de la vilaĝo estu analfabetaj kiel li, li investis por funkciigi la lernejon.

Por plibonigi la medion de lernado, Liang Xisen investis por konstrui lernejan domaron kun areo de 154 kvadrataj metroj kaj aĉetis por ĝi novajn tablojn, elektrajn lampojn, ventumilojn kaj hejtilojn. Nun ĉiuj lernoagaj geknaboj de la vilaĝo vizitas lernejon. Tion vidante, li sentas grandan ĝojon.

Antaŭ ol finkonstruiĝis la nova lernejo, li loĝis ĉiam en budo apud ĝi. Post ĝia finkonstruiĝo li sin turnis al notariejo por konfirmi, ke la lernejo ĉiam apartenas al la vilaĝo.

La fardo de Liang Xisen levis ardan tajdon funkciigi lernejojn en multaj vilaĝoj de Leling. Mi informiĝis de Gao Hanqing, vicurbestro pri edukado, ke en la fino de 1988 la domoj kaj iliaj instalaĵoj de la pli ol 1 000 elementaj lernejoj sub la urba eduka buroo estis plejparte plibonigitaj kaj altiĝis la kvalito de edukado.

Ĉe la adiaŭo mi demandis lin pri lia plano. Li respondis, ke la teksejo baldaŭ havigos al si novan domon kaj jam akceptis 244 junulojn el la kamparo. Li plivastigos la maljunulejon kaj loĝigos en ĝi 50 senhelpajn maljunulojn. Kaj krome, en la urbo li starigos ankaŭ edukan fonduson, kiu elspezos 50 000-60 000 juanojn jare por premii tiujn instruistojn, kiuj amas sian aferon kaj elstaras en laboro. ■



VOJAGŔO ĈE WEISHAN-LAGO

Teksto de MOU JULIANO Bildoj de YAN JIN


Kolekto de konkuloj



ĈIUSOMERE, kiam pompe disvolviĝis lotusfloroj, mia koro direktiĝis suden al Weishan-lago pli ol 500 km. for de Pekino. Tie kreskis grandareaj lotusoj. De longe mi pekinano deziris ŝipveturante rigardi lotusflorojn sur la lago. Ĉi-somere realiĝis mia deziro.

La lago en silkraŭpa formo estas la plej granda dolĉakva lago en norda Ĉinio. Ĝi longas je 120 km.,

largas 10 km. kaj oblikve kuŝas en la ebenajo inter la malsupraj basenoj de la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero. La antikva Granda Kanalo trapasas ĝin. Ankaŭ la konstruaĵo por konduki akvon de sude norden trapasas ĝin. La lago punktiĝas per velŝipoj kaj sur ĝi sonas gajaj kantoj ĝis vespero. La barĝoj interligitaj kaj tirataj de unu motorŝipo estas kvazaŭ naĝanta longa drako kaj laŭdataj kiel surakva trajno.



Ŝipoj sur la lago

Fiŝkaptado



En la lago troviĝas insulo kun monteto, sur kiu estas la tombo de Weizi — fondinto de Song, vasala regno de Zhou-dinastio (1066-256 a.K.). Starante antaŭ la tombo, mi karesis la eroziitan tomboŝtonon kaj legis ideogramojn sur ĝi. Tiam, mi kvazaŭ vidis la pasintecon de la ĉina nacio kaj sentis la longecon de ĝia historio.

Ĉe kajo de fiŝista vilaĝo kolektiĝis nove lakitaj plezurŝipoj grandaj kaj malgrandaj, kaj surborde svarmis turistoj ege dezirantaj rigardi lotusflorojn sur la lago. Mi haste enŝipiĝis kaj veturis al la centro de la lago laŭ la kanala navigvojo. Post momento granda areo da sovaĝaj lotusfloroj aperis ambaŭflanke de la vojo. Ĝenerale, la florado daŭras tri monatojn. La turistoj ĉiuj admiris la pejzaĝon foje refoje, fingre montrante jen tien, jen ĉi tien. Mia kunvojaĝanto, fotisto Ren Shiyin (Ĵen Ŝijin), surgrimpis la supron de la ŝipo kaj

fotis belajn lotusflorojn. Li volis prezenti la belecon de Weishan-lago al niaj legantoj.

Mi vidis unu-du grandajn ŝipojn inter lotusfloroj. En ili estis viroj, virinoj, junaj kaj maljunaj, infanoj kaj ankaŭ amindaj hundetoj, apud la ŝipoj naĝis aro post aro da ansoj. Sendube, ili estis fiŝistoj vivantaj en ŝipo inter fragmitoj kaj lotusfloroj. Antikvuloj admiris la montanan vivon, dirante: “En ŝvebanta blanka nubaro vivas loĝantoj,” kaj mi devas admiri la fiŝistan vivon: “Inter lotusfloroj sennombraj vivas fiŝistoj.”

Nia ŝipo haltis ĉe densaj lotusfloroj. Starante surŝipe, mi rigardis al ruĝaj kaj blankaj lotusfloroj, pompe disvolviĝantaj, kaj al burĝonantaj lotusoj. Poste mi veturis per boato inter lotusflorojn. Grandaj verdaj folioj subtenis lotusflorojn, surfoliaj akveroj brilis argente kaj ruliĝis tien kaj reen en zefiro. Mi derompis folion kaj me-

tis ĝin sur la kapon por ŝirmi min kontraŭ la suno. Tiam mi ekridis, ke mi kvazaŭ estis knabo. La boato derompis toruson kaj gustumigis al mi freŝajn lotussemojn. La boato moviĝis malrapide inter floroj super mia kapo. Lotusfolioj karesis miajn vangojn. Tie la flora aromo frapis la nazon kaj regis kvieto. Mi kvazaŭ kunfandiĝis kun la naturo kaj ebruiĝis de la pejzaĝo, forgesante reveni. Kiel forte mi dezirus tranokti kaj rigardi tie al la firmamento!

La bela kaj fekunda Weishan-lago estas laŭdata kiel trezora lago. Ĝi entenas grandan kvanton da akvo, kiu uziĝas por produkti elektron, irigacii kampojn kaj transporti varojn. Kun multa fiŝnutraĵo ĝi estas regno de fiŝoj. En ĝi vivas fiŝoj, salikokoj, kraboj kaj konkuloj, sume 78 specoj. Ĉe Weishan-lago ĉiutage mi havis fiŝan bankedon kaj ĝuis fiŝajn kaj salikokajn pladojn preparitajn div-

En fiŝbredejo



ersmaniere. La fama plado “Karmo Saltas trans Drakan Pordon” estas neforgesebla por mi. La fritita karmo kurbiĝis sur la plado, kun la kapo supren kaj la vosto malsupren, kvazaŭ ĝi eksaltus. La karmo havas kvar naztruojn kaj nomiĝas kvarnaza karmo. Ĝi estas loka produktaĵo de Weishan-lago. Ĝi havas delikatan viandon kaj estas ĉiam apetitiveka. Iuj turistoj alvenas tien speciale por manĝi tian fiŝon.

La lago estas ankaŭ edeno de birdoj kaj bestoj. Tie vivas 87 specoj de birdoj. Ankaŭ lutreoloj kun fiŝo kiel sia nutraĵo vivas en la lago. Sur la ondetanta lagsurfaco mi vidis grandarean verdaĵon. Tio estas fragmitoj kaj valisneroj (*Valisneria spiralis*). Fragmitoj donas al la lago sovaĝan trajton kaj ankaŭ liveras abundan materialon por fari paperon kaj plektaĵon. Valisneroj amase kreskas je homa alteco. Ili estas delikataj kaj servas kiel unuaklasa furaĝo de laktobovinoj. Ĉiujare ili estas grandkvante eksportataj al Japanio. La herboj kreskas rapide. Kelkajn tagojn post falĉado, ili denove kreskas dense, kvazaŭ helpate de dia forto, tial oni nomas valisneron dia herbo.

Sub la lago rezerviĝas granda kvanto da bonkvalita karbo, kiun oni ekspluatas kaj transportas al la malsupra baseno de Yangzi-rivero per la Granda Kanalo. Apud la lago troviĝas la monto Qieshan (Ĉjeŝan), kie produktiĝas rara tero. Enirinte la minejon, mi vidis erojn kaj rafinitan pulvoron de rara tero. La pulvoro de rara tero estas nemankigebla por la moderna industrio kaj por la popola vivo. Ĝi estas vitamino de industrio.

Weishan-lago estas plue ekspluatata. Oni tie konstruas ĉelagan parkon, riparas kaj liveras pli da plezurŝipoj por disvolvi turisman servon. La abundaj lagproduktaĵoj estas utiligataj por disvolvi manĝaĵ-prilaboran industrian. La kalkumitaj ovoj en la loko produktitaj estas kristalaj, bongustaj kaj eksportataj al Japanio. La tieaj asparagaj ladmanĝaĵoj estas famaj lokaj produktaĵoj, laŭ-



Kalkumado de ovoj



Herborikolto

dire, ofta manĝado de asparago povas preventi kanceron. Ĉirkaŭ la lago antaŭe estis multe da virgatero, kiu nun estas ekspluatata kaj servas kiel kampo, fiŝbreda lageto, fruktĝardeno kaj paŝtejo. Mi traveturis tiujn lokojn kaj vidis ombrajn arbarojn, lagdigojn, saltantajn fiŝojn kaj fruktojn. Ĉie, kie mi restis, mi ĝuis belajn kamparajn pejzaĝojn. La registaro de Weishan-gubernio donis grandan atenton al protektado de la fiŝoj, birdoj, sovaĝaj bestoj kaj antikvaj vidindejoj. Por konservi certan kvanton da fiŝoj, la loka regis-

taro konsilas al la fiŝistoj kaj kapti kaj bredi fiŝojn. En la profundakva zono fiŝistoj bredas fiŝojn en retaj kestoj kaj rikoltas altan produktokvanton. En la malprofundakva zono ili bredas fiŝojn en lokoj ĉirkaŭitaj de retoj. En tiaj lokoj kreskas lotusoj, inter kiuj petolas fiŝoj. Krome, oni konstruis tie ankaŭ eksperimentejon por dolĉakva bredado de fiŝidoj por la lokaj fiŝbredejoj.

Weishan-lago multe favoras la lokanojn, sed ĝia ekspluatado estas ankoraŭ en komenca etapo. Iu gvi-



Turistoj alvenas.

Ombraj arboj ĉe la lago



Virinoj de fiŝistaj familioj

danto de Weishan-gubernio diris al mi, ke la lago ĉiujare produktas 50 000 000 kg. da lotusradikoj. Pro manko de fosmaŝinoj de lotusradikoj, ili putras en la lago. Oni esperas, ke kapabluloj provfaros tian maŝinon. Oni esperas ankaŭ enkonduki alilandajn kapitalon kaj teknikojn por efektiviĝi plenan ekspluatadon de la lago. Mi pensas, ke la lago fariĝos pli riĉa kaj pli bela estonte. ■



VA-AJ KNABINOJ

Pentraĵo de ZHOU XIUQING

Va-oj, unu el la ĉinaj nacimalplimulto, loĝas ĉefe en va-a montregiono de Yunnan-provinco, riĉa kaj bela en la subtropika zono.

La va-aj virinoj portas senkoluman ĵaketon ruĝan, bluan aŭ nigran kaj plisitan jupon tubforman, kun arĝenta ringo sur la kapo kaj arĝenta koliero kaj ĉenoj da bidoj sur la brusto. Ili portas lianajn ringojn ĉe la talio kaj nuko kaj arĝentajn braceletojn, ringojn kaj bendojn respektive sur la brakoj, oreloj kaj kruroj. La viroj havas sur si senkoluman jaketon kaj larĝan kaj mallongan pantalonon, kun kapo ĉirkaŭvolvita per nigra tukstrio kaj oreloj truitaj, sur kiuj pendas ruĝaj aŭ nigraj kvastoj. La junuloj portas sur la nuko bambuajn aŭ lianajn ringojn, kun glavo ĉe la talio.

La va-oj ĝuas riĉan kulturen vivon. En tradicia festotago kaj dum kamplaboro kaj religiaj aktivadoj ili, feste vestitaj, ĝoje kantas kaj dancas.



PECETOJ DE LA 74-A UK

LA 74-a Universala Kongreso okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto en brita marborda urbo Brajtono. Ĝin vizitis pli ol 2 200 samideanoj el 50 landoj, inkluzive de 10 ĉinaj esperantistoj. La alta protektanto de la kongreso estis Lordo Wilson de Rievaulx. Li funkciis kiel ĉefministro de Britio de 1964 ĝis 1970 kaj de 1974 ĝis 1976. Li eklernis Esperanton en sia junaĝo kaj plurfoje esprimis sian subtenon al la celoj de la Esperanto-movado. Estas vere granda honoro por ni havi lin kiel nian altan protektanton.

SOLENA LANĈO DE LA KONGRESO

Ĉar la kongreso mem okazis ekster la ĉefurbo, oni aranĝis la Antaŭkongreson en Londono kun dutaga programo, por ke la ekstera mondo pli bone konu nian lingvon

kaj nian movadon, kaj la kongresanoj ĝuu turismon en la urbo. La Antaŭkongreso kulminis per la solena Lanĉo de la 74-a UK la 28-an de julio kun partopreno de pli ol 200 kongresanoj kaj honoraj gastoj kaj ĵurnalistoj. La lanĉo okazis en la impona halo Guildhall, la urbodomo de la antikva civito Londono, kie Zamenhof faris paroladon antaŭ 82 jaroj. En la lanĉo s-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, faris festparoladon, en kiu li eksplikis la ideon de Zamenhof pri patriotismo, t.e. ami sian patrion, sen ke tio signifas malestimadon al aliaj popoloj. Li diris, ke 82 jarojn post la parolado de Zamenhof respekto al aliaj popoloj ankoraŭ ne kondukis al kompreno pri la lingva problemo en la mondo. Oni jam ofte aŭdas, ke tiu problemo estas per la angla lingvo finsolvita. Sed kiel indas agnoski la egalecon de ĉiuj landoj nur je kondiĉo, ke oni

akceptu la anglan kiel mondlingvon? Jen demando diskutenda en tiu ĉi kongreso.

Dum la lanĉo salutis la kongreson Lordo Rugby nome de la britaj parlamentanoj-subtenantoj de Esperanto kaj diverslandaj diplomataj reprezentantoj. Skribajn bondezirojn sendis al la kongreso Lia Reĝa Moŝto Princo Edward, kardinalo Hume, ĉefepiskopo Runĉie kaj aliaj eminentuloj.

NASKIĜIS NOVA ESTRARO DE UEA

En la unuaj tagoj de la kongreso elektiĝis nova estraro de UEA kun prof. John Wells kiel la prezidanto. Escepte de s-ro Grégoire Maertens, kiu apartenas al la malnova estraro de UEA, ĉiuj aliaj en la estraro estas novaj. Ni nomas ilin novaj, ĉar iliaj nomoj unuafoje troviĝas en la estrarana listo de UEA. Sed antaŭ tio ili jam faris elstarajn kontribuojn al nia movado enlande aŭ internacie kaj montris eksterordinaran kapablecon. Iliaj nomoj absolute ne fremdas al ni. La ĉinaj esperantistoj konas prof. Wells pro liaj abundaj verkoj precipe liaj *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto* kaj *Konciza Esperanta-Angla Vortaro*, kaj mi mem estas ravita de liaj brilaj prelegoj en niaj kongresoj. Mi esperas kaj kredas, ke ili per sia nova vizaĝo, nova ideo alportos al nia Esperanto-movado novan viklecon kaj novan progreson. Ĉinaj esperantistoj kore gratulas ilin pro ilia elekto kaj deziras al ili plenan sukceson en la venonta 3-jara laborperiodo. Adiaŭante la malnovan estraron de UEA, d-ro Wells diris multajn dankojn al ili. Li dankis al prof. Tonkin, kiu donis al li bonan ekzemplon, li dankis al s-roj Grégoire Maertens, Yosimi Umeda kaj s-ino Flóra

D-ro H. Tonkin (la unua de maldekstre), prof. J. Wells (la dua de maldekstre) kaj urbestro de Brajtono (la tria de maldekstre)



Szabó-Felső, kiuj tre diligente, tre laboreme servis en la pasintaj jaroj, li dankis al ĉiuj aliaj estraranoj. Lia dankesprimado al la malnova estraro rikoltis varman kaj longan aplaŭdadon de la kongresanoj. En tiu ĉi momento ni ĉinaj esperantistoj estis plenplenaj de dankemo kaj profunda respekto al la malnova estraro. Ni ne forgesos, ke ĝuste en ilia oficperiodo Ĉina Esperanto-Ligo aliĝis al UEA. Ni ne forgesos, ke ĝuste pro ilia klopodado kaj subteno la 71-a Universala Kongreso okazis en Pekino. Ni ne forgesos ĉion kion ili faris al la ĉina Esperanto-movado kaj la movado de la tuta mondo. Ni kore esperas, ke ili daŭre kontribuos al nia komuna afero.

DEBATO INTER ESPERANTO KAJ LA ANGLA

Ĉi-foje por la 74-a UK la kongresa temo estis "Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado". Ĉar ĝi koncernas kernan demandon pri la idealo de Zamenhof kaj celo de nia movado, ĝi vekis grandan atenton de la publiko. La diskutadon partoprenis ne nur specialistoj, sed ankaŭ ordinaruloj. Rilate al tio speciala debato kun la temo "Ĉu Esperanto, ĉu la angla estas solvo de la monda lingvo-problemo" okazis inter profesoro Honey, kiu instruas la anglan lingvon en la japana Universitato de Humamoto, kaj la nova prezidanto de UEA profesoro Wells. Profesoro Wells estas fame konata kiel oratoro jam delonge, oni tute ne bezonis maltrankviliĝi pro lia situacio en la debato. Post lia elokventa enkonduka parolado pri la temo parolis profesoro Honey, argumentante, ke eĉ se ne estas juste, ke la angla estu la lingvo de internacia komunikado, ĝi nun tio estas; ni ne povas ŝanĝi la faktan realon. Se Esperanton efektive parolus dekoj da milionoj da homoj dise tra la mondo, ĝi fariĝus same malregula kaj disdialektiĝinta kiel la angla. Kompreneble la vidpunktoj de profesoro Honey ne povis trovi eĥon en la kongresejo, male tuj



S-ro Yosimi Umeda (meze) en la kunsido de EPĈ-legantoj

post lia parolado refute respondis kelkaj el la aŭskultantoj. Fine parolis denove s-ro Wells, ke ni ne akceptu la mondon, kia ĝi estas, sed ni klopodu ŝanĝi ĝin. Disdialektiĝo ne okazos en mondo, kie amaskomunikiloj pli kaj pli proksimigas la homojn.

La akra debato finiĝis tamen en amika atmosfero. Profesoro Honey devis sola defendi la anglan lingvon, li tamen ricevis saman aplaŭdadon de la ĉeestantoj. Oni opinias, ke tia debato tre utilas por konvinki la mondon, ke nur Esperanto, kiu estas samtempe facila por la lernanto kaj neŭtrala inter la diversaj partioj kaj partianoj, povos fine solvi la lingvan problemon.

FREŜIGA ELEMENTO DE LA KONGRESO

Lastatempe iom ŝanĝiĝis la situacio de Esperanto-movado en Sovetunio. Tiu ŝanĝo montriĝas ankaŭ en nia Brajtona kongreso. Ĝin vizitis pli ol 30 sovetaj esperantistoj el malsamaj landpartoj. Unuafoje dum dekoj da jaroj venis al kongreso en Okcidento tiom multaj sovetaj samideanoj. Ili ne nur ĉeestis, sed ankaŭ vigle partoprenis en diversaj diskutoj. El la 9 prelegantoj en la Internacia Kongresa Universitato du venis el Sovetunio, nome Lev Medvedev kaj Povilas Jegorovas. Mi kun granda intereso aŭskultis la prelegon de s-ro Povi-

las Jegorovas pri Litova Esperanto-movado. Tuj post la prelego oni pafis multajn demandojn al la preleganto por havi plidetalajn informojn. Cetere la sovetaj esperantistoj faris apartan kontribuon al la kongreso per amuzaj programeroj. Ĝuste pro tio s-ro Ulrich Lins, nova vicprezidanto de UEA, nomas ilin freŝiga elemento de la kongreso kaj esperas vidi ĝin en la estontaj kongresoj.

VIGLE VIZITATA KUNSIDO DE EPĈ-LEGANTOJ

Per okazigo de kunsido de EPĈ-legantoj saluti niajn perantojn, legantojn kaj amikojn kaj aŭskulti iliajn opiniojn pri nia revuo estas unu el niaj ĉefaj taskoj en la kongreso. Ĉi-jare la kunsido okazis posttagmeze la 4an de aŭgusto en salono Lapenna kun pli ol 200 partoprenantoj. Malsame ol en aliaj pasintaj kunsidoj, la legantoj ne nur prezentis opiniojn kaj proponojn pri la enhavo kaj aspekto de la reformita revuo, sed ankaŭ faris inter si tre varman diskuton, eĉ disputon pri kelkaj punktoj, kiel ekzemple pri uzo de la han-lingva fonetika alfabeto por transskribi ĉinajn proprajn nomojn, pri la titolo de nia revuo. Ĉu la vidpunktoj de la legantoj akordiĝas kun niaj aŭ ne, ni profunde sentis el iliaj entuziasmaj paroloj amon kaj zorgon al ni. Estas por ni granda ĝojo kaj honoro, ke venis al nia kunsido




Renkontiĝo de kongresanoj

malnova vicprezidanto de UEA s-ro Yosimi Umeda, nova vicprezidanto s-ro Ulrich Lins kaj nova estrarano s-ro So Gilsu kaj membro de Akademio de Esperanto s-ro Andrzej Pettyn. S-ro Yosimi Umeda afable akceptis nian peton organizi vizitgrupon el Japanio kaj Sudkoreio por partopreni la 40-jaran jubileon de EPC en majo de la venonta jaro en Pekino. En la kunsido li fervore prezentis al la legantoj turisman itineron proponitan de la redakcio al vizitgrupoj por la jubilea arango kaj ĉinan si-

tuacion, kiun li propraokule vidis dum sia vizitado al Ŝanhajo en la dua tagdeko de júnio. Li diris, ke la situacio tie estas stabila, ne estas granda malfacilaĵo kaj oficialuloj, kun kiuj li parolis, garantiis, ke Esperanto en Ĉinio estas ĉiam ajn subtenata tute senŝanĝe. Parolis en la kunsido ankaŭ s-ro Andrzej Pettyn. Li estas fama raportisto kaj redaktoro de Radio Polonia, tre sperta en sia profesio. Li donis al ni tre inspirajn sugestojn pri nia redakta laboro, proponante plifortigi kunlaboron inter nia redakcio kaj

Radio Pekino kaj aliaj Esperantaj organizaĵoj. Li alvokis la ĉeestantojn iamaniere klopodi por popularigi la abonadon de El Popola Ĉinio okaze de ĝia jubilea festo. Antaŭ tiuj tre afablaj amikoj mi, unu el la redaktoroj de la revuo, pro forta emocio, povis diri nenion krom "koran dankon". Mi tamen scias, ke la plej bona rekompenco por la sincera amikeco kaj subteno de niaj legantoj al nia redakcio devas esti nenio alia ol diligenta laborado por daŭre plibonigi nian revuon.

Dum la mallongaj kongresaj ta-




Ĉinaj esperantistoj antaŭ la kongresejo



En la kunsido de EPC-legantoj

La nova prezidanto de UEA prof. John Wells (dekstre) kaj raportisto de Radio Polonia

goj mi ne nur multe ĝuis la riĉajn programerojn fakajn kaj artajn, kaj belan pejzaĝon de Brajtono, sed ankaŭ plej grave spertis kunfratecon de ĉiuj homoj, por kiu pledis Zamenhof en sia parolado antaŭ 82 jaroj. Finiĝis la Brajtona kongreso en plena sukceso, sed longa distanco estos por atingi nian finan celon. Kion ni devas fari nun? Ni devas, kiel diris prof. Tonkin, plu donadi nin al la disvastigo de lia idealo kaj dediĉi nin al la lukto por sendiskriminacia komunikado. ■



La disvolvigo de Esperanto dependas de aplikado

— Memore al la 5-a datreveno de la fondiĝo de STEA sub ĈAS

POST la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (STEA sub ĈAS) en la 15-a de junio 1984, ni neniam forgesis kiamaniere akceli disvastigon kaj aplikadon de Esperanto en la scienc-teknika kampo. Ni opinias, ke por ke Esperanto plidisvolviĝu, oni nepre devas vaste uzi kaj popularigi ĝin ne nur en politiko, lingvo, literaturo, muziko, teatro, turismo, korespondo kaj agadoj de Esperanto-klubo, sed ankaŭ en scienco, tekniko, ekonomio, komerco kaj produktaj agadoj de la socio. Nur tiel, Esperanto fariĝos vera lingvo nemankigebla por la homa ĉiutaga vivo kaj ludos sian rolon en la socia progreso kaj evoluo.

Dum la pasintaj kvin jaroj nia asocio klopodis utiligi ĉian ŝancon kaj krei kondiĉojn por senĉese antaŭenpuŝi la aplikadon de Esperanto en la scienc-teknika kampo.

“Lerni por uzi” estas nia principo ĉiam sekvata en kulturado de esperantistoj. Ekzemple, en E-kursoj ni ĉiam prenis librojn, ĵurnalojn, revuojn kaj leterojn kiel instrumaterialojn, por ke la kursanoj lernu la lingvon kaj senĉese altigu sian lingvonivelon en praktikado. En la komenco ni instruis la lernantojn en konversacio pri la vivo por unuapaŝe atingi la kapablon aŭskulti kaj paroli; tion sekvis legado ĝenerala kaj serioza por altigi lingvonivelon; post tio ni ekzercis ilin per tradukado kaj verkado. Post la intensa trejnado en 3-8 monatoj la kursanoj povis korespondi kun eksterlandaj esperantistoj kaj labori en internacia konferenco, traduki artikolojn por la revuo “Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj” (TST) kaj la bulteno “Informilo de Scienco kaj Tekniko” (IST). Dank’ al sia kono pri la nobla idealo de Esperanto kaj ĝiaj internacieco kaj praktika valoro en diversaj kampoj, la lernantoj ekhavis firman decidon kaj memfidon batali ĝismorte por Esperanto.

Plejparto de la sciencaj revuoj en diversaj landoj estas eldonata en ilia propra lingvo, kaj estas tre malfacile scii pri la evoluo de la mondaj sciencoj kaj teknikoj pro lingva baro. Nun multaj sciencistoj jam komprenas, ke Esperanto kiel ponto ebligas al la scienc-teknika interŝanĝo vojon proksiman, ireblan kaj ekonomie favoran. La revuo TST fondita de STEA aperis sub tiu situacio. Ĝi eldoniĝas en Esperanto kaj la ĉina lingvo. Fakuloj en la scienc-teknika

kampo interesiĝas pri ĝiaj freŝaj temoj kaj scienc-esploraj informoj. Iuj esperantistoj en Sovetunio, FR Germanio, Japanio, Irano k.a. tradukis artikolojn de TST en sian propran lingvon por aperigi ilin en lokaj ĵurnaloj aŭ gazetoj. Ekz., sovetia fizikisto M. T. Popov tradukis la artikolon “Nova Atingo en Esploro pri Meĥanismo de Metala Oksidiĝo” de d-ino Guan Ruonan el TST, n-ro 1/1986 en la rusan lingvon por sovetia specialisto, kiu ankoraŭ ne komprenis Esperanton. Estas aparte interese, ke la referaĵo “Esploro pri Kuracado de AIDS per Akupunkturo en la Imunologia Vidpunkto” de n-ro 3-4/1988 de TST estis represita en “Mondo de Universitato” de n-ro 3/1988 en Suda Koreio kaj poste ĝi estis elektita en la rubriko “Bibliografiaj Notoj” de “Heroldo de Esperanto” kiel interesa artikolo en Esperanto. Samtempe elektita artikolo estis ankaŭ “Dek Sanigaj Metodoj kaj Ertiangong” en la sama numero de la gazeto.

Multaj sciencistoj Esperanton nekomprezentaj tamen tre envidas, ke la revuo TST povas trovi multajn legantojn en diversaj landoj, opiniante, ke ĝi malfermas novan terenon por la scienc-teknika interŝanĝo. Tial, ili tre deziras publikigi en ĝi artikolon pri sia plej nova scienc-esplora atingo. Ekzemple, usona scienca verkisto J. G. Richardson, antaŭa ĉefredaktoro de “Influo de Scienco sur la Socio” eldonata de Unesko en la angla kaj franca lingvoj, multe aprobis disvastigon de Esperanto en la scienc-teknika kampo kaj decidis doni grandan helpon. Okaze de la Dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko, li sendis al ni sian franclingvan referaĵon, kiun ni aperigis en la 3-a numero, 1989 de TST. Ankaŭ sciencistoj de aliaj landoj montris similan deziron. Nemalmultaj esperantistoj tradukis iliajn sciencajn artikolojn el la nacia lingvo en Esperanton por aperigi ilin en TST.

Krom TST ni eldonis ankaŭ sciencon verkon “Atoma Klarigo de Materialaj Propecoj” de Rob Vetter, nederlanda docento pri fiziko, per komuna kapitalo en la daŭro de unu jaro. La aŭtoro de la libro alte taksis nian eldonlaboron kaj esperis, ke troviĝos pli da volontuloj-verkistoj, kiuj povos en pli mallonga tempo kompili Esperantajn lernolibrojn kaj eldoni ilin por lernantoj de Esperanto. Do, “Esperanto certe eltenos tiun etnolingvan konkuren-


con.”

Nia asocio ofte sendis sciencistajn grupojn al aliaj landoj por kontakti kun iliaj scienc-teknikaj rondoj; kaj samtempe ni ankaŭ prizorgas la venintajn eksterlandajn sciencistojn kaj helpas ilin en kontaktoj kun ĉinaj samfakuloj. Ekzemple, okaze de la 71-a UK en Pekino en 1986, Barbara Despiney, estrarano de UEA kaj esploristino pri ekonomiko de la Tria Mondo, vizitis pere de nia asocio la Instituton pri Sovetunio, Orienta Eŭropo, Okcidenta Azio kaj Afriko sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj starigis amikan rilaton kun ĉinaj samfakuloj; en 1987 hungaraj hidraŭlikistoj d-roj Gerencser Árpád kaj Gether István vizitis Ĉinion kaj estis invitita de nia asocio al ĈAS por tie prelegi kaj renkontiĝi kun ĉinaj hidraŭlikistoj; kaj en 1988 ni akompanis polan agrobiologon s-ro Edmond Sidorowicz al bredejo de laktbovinoj en la kultivejo de la orienta antaŭurbo de Pekino.

Ni ankaŭ interkomunikigis alilandajn sciencistojn, kiuj ne povis viziti Ĉinion, kun ĉinaj kolegoj por interŝanĝi sciencajn informojn. La 3-an de julio 1986 ni ricevis leteron de la Universitato de Udine, Italio, kun la peto, ke ni traduku en Esperanton tri sciencajn artikolojn aperigitajn en “Botanika Gazeto” kaj “Fitofiziologia Gazeto”, kiuj temas pri novaj teknikoj kaj eksperimentoj de genetiko kaj bonspesia kulturado de plantoj. Ni tradukis la artikolojn en Esperanton. Dum la tradukado ni diskutis kun la aŭtoroj de la artikoloj pri terminaj problemoj. Ili ĉiuj laŭdis nian laboron, ke estas ege aprobinde, ke ni faris tiel realan, ĝustatempan, oftan akademian interŝanĝon en Esperanto, kio certe kontribuos por la scienc-teknika evoluo. Poste ni informiĝis, ke scienc-esploristoj de la Universitato de Udine faris similan eksperimenton laŭ la ĉina sperto kaj akiris novan atingon. Krome, silvikulturisto Johann Pachter en FR Germanio korespondas en Esperanto kun la Forst-grunda Instituto sub ĈAS en Shenyang, Ĉinio, kaj interŝanĝas koncernajn materialojn.

Por akceli la informan interŝanĝon, nia asocio eldonas ankaŭ “Informilo de Scienco kaj Tekniko” kiel suplementon de TST. Tio ebligis kunlaborojn en la scienc-teknika kaj ekonomi-komerca kampoj.

Por plipopularigi la scienc-teknikan interŝanĝon en Esperanto, nia asocio okazigis dufoje la Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE). Pri tio EPĈ jam raportis. La konferenco altiris multe da homoj, ĉar ĝi havas karakteron multfakan kaj sintezan, kiu ebligas al diverskampaj sciencistoj kaj teknikistoj partopreni ĝin. Samtempe en la tuta konferenco regis la penso pri reformado kaj pordmalfermo, tial en ĝi partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ sciencistoj, kiuj ne komprenas Esperanton, tamen volonte subtenas la evoluon de Esperanto. Laŭ la rezolucioj de la du konferencoj ni okazigos ĉiun duan jaron la konferencon, kiu fariĝos granda movforto por popularigi Esperanton kaj altigi la



La aŭtoro (maldekstre) kaj alilandaj esperantistoj

lingvonivelon en la scienc-teknika kampo. Ni jam dissendis anoncon pri okazigo de la tria IAKSTE en Pekino inter la 25-a kaj la 30-a de majo 1990. Ni kredas, ke tio certe ricevos pli varman subtenon en- kaj eksterlande.

Kiel konate, nun ni pretas fondi la Internacian Esperantan Scienc-teknikan Universitaton kunlabore kun famaj universitatoj, scienc-esploraj institucioj kaj industriaj kaj komercaj rondoj en- kaj eksterlandaj. En la komenca periodo funkcios urĝe bezonataj fakoj de ekonomio, administrado, tekniko kaj ĉinstilaj kulturo, medicino k.a. Poste laŭ bezono ni plimultigos la studtemojn. La plej grava estas uzo de Esperanto kiel la unua laborlingvo. La universitato donos al esperantistoj konstantan ejon kaj pli bonan ŝancon por pli oftaj akademaj interŝanĝoj kaj Esperanto-aplikado en diversaj kampoj.

Ni jam ricevis varman eĥon en- kaj ekster la lando. Tamen efektivigo de nia projekto bezonas komunan klopodon. Plej grave estas starigi fonduson kolektante monon en- kaj eksterlande por solvi la problemojn de vojaĝo kaj vivo de instruistoj kaj studentoj, kiuj instruos kaj studos en Ĉinio, kaj parte por eldonado de instrumaterialoj kaj aliaj legaĵoj disponeblaj por tiuj, kiuj deziras lerni Esperanton en- kaj ekster la universitato.

Lastatempe multaj leteroj flugis al ni por demandi, kiam ekfunkcios la universitato kaj kiajn lecionojn oni donados. Ni respondis, ke ni de nun komencas kaj faras tion, kio estas tuj efektivebla. Ekzemple, en septembro 1989 ni okazigos scienca simpozion kaj E-kurson kunlabore kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino. La simpozio estos miniaturo de nia universitato. Ni bonvenigas eksterlandajn instruistojn kaj studentojn, kiuj deziras veni al Ĉinio kun supre diritaj celoj, nur se ili povos mem pagi por sia vojaĝo, kaj estonte ili venos eble senpage dank’ al nia fonduso. Ni kredas, ke la funkciigo de la universitato malfermos novan vojon por konstanta aplikado de Esperanto. ■

VENKU LA NAIVAN OPTIMISMON!


PERFEKTA CIVITANO novelaro de Sándor Szathmári, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Redaktoro: V. Benczik. Formato: 20 × 13.5 cm. 454 p. Prezo: 39 gld.

Nia poeto W. Auld diris, ke S. Szathmári (1897-1974) estis “unu el la grandiozaj satiristoj de la nuntempa mondo” kaj “okupas lokon samnivele apud siaj grandaj kaj mondkonataj fratoj Swift, Wells, Anatole France, Macach kaj Karinthy”. Kvankam verkoj de S. Szathmári aperis libroforme kaj en diversaj gazetoj, kaj iuj el ili estas tradukitaj en naciajn lingvojn inkluzive de la ĉina, tamen certe li ankoraŭ ne atingis la renomon de iu el la supre menciitaj grandaj satiristoj. Sed mi kredas, ke multaj homoj, kiuj estas legintaj la verkaron aŭ plejparton de la verkoj de la esperantisto-satiristo samopinios kiel W. Auld.

S. Szathmári estis hungara maŝin-inĝeniero. En sia junaĝo li devis migradi kun sia patro de urbo al urbo, kie loĝis hungaroj kun nacimalplimulto kaj same kiel Zamenhof vidis naciajn antagonismojn. En sia 14-jara aĝo, li eklernis Esperanton kaj en la Esperanto-movado li vidis siajn homaranismajn ideojn pli kaj pli reliefigantaj. Poste li ricevis influon de la ĉefverko de Madách “La Tragedio de la Homo” kaj de “Vojaĝoj de Gulliver” de Swift. En 1931, li verkis sian unuan romanon “Vane” por esprimi sian pesimismon pri la homaro, sed tiu tril-

ogio ne aperis, ĉar la aŭtoro ricevis evoluon de la idearo kaj en 1935 li verkis la satiran romanon “Vojaĝo al Kazohinio” en Esperanto. Eble pro financa kaŭzo, tiu romano tamen ne povis aperi ĉe Literatura Mondo, kaj tamen ĝia hungara traduko aperis en 1941 kun neatendita sukceso. Per tiu romano li diras, ke “ni estas en grava krizo. Se ni ne povas niajn instinktojn akomodi al nia maŝinigita medio... ni pli aŭ malpli frue ekstermos nin mem pere de la maŝinoj”. En 1958 aperis “Vojaĝo al kazohinio” en Esperanto kiel eldonaĵo de SAT; ĝi estas la ĉefverko de S. Szathmári.

Efektive la rakonto “Maŝinmondo”, la unua kaj ankaŭ la plej longa novelo en la “plena novelaro” “Perfekta Civitano”, diras preskaŭ la samon kiel la supre menciita romano: la homaron minacas pereigo fare de ĝi mem per robotoj. Kvankam sufiĉe vasta estas la gamo de la temoj de la kolekto el 27 rakontoj, tamen preskaŭ ĉie la leganto povas senti la humanisman pesimismon de la aŭtoro, kvaŭzaŭ averton, ke ni venku la naivan optimismon. Li montras al ni diversajn kontraŭdirojn en la homa socio: scienco kaj superstiĉo, vero kaj falso, dio kaj diablo, mikro-mondo kaj makromondo, la naturo kaj la kulturo, paco kaj milito, medicino kaj mortigo per municio, ridindeco de obstinaj kutimoj, scio por nenio, fideleco de la virinoj, itismo ktp. ktp. Kvankam kelkaj pecoj ŝajnas esti sciencaj fikcioj, sed efektive ili estas filozofiaj sati-



roj, kiel la “Tempomaŝino” de H. G. Wells. Estas neeble por mi iri en detalon de la enhavoj de la rakontoj, mi prezentu al vi la pecon “Perfekta Civitano” per kelkaj vortoj:

Kruela kaj kolerema monarko ordonis sian kortegan ĉefmetiiston krei por li maŝinhomon, kiu lin servu kiel perfekta civitano. Kiam alvenis la limdato post unu jaro, la majstro alportis al la monarko sian rezulton: ideala civitano obeema, ĉiam laŭdanta la altan reganton laŭ tradicia formulo, kun plej fleksigema spino, dika vizaĝhaŭto kaj mola postaĵo, kiu havas tian eksterordinaran kvaliton, ke ĝi sentigas agrablecon al siaj piedbatantoj. Unu el la mirindaj karakterizaĵoj de tiu maŝinhomo estis, ke ju pli oni piedbatis ĝin, des pli fervore ĝi plenumas sian servon. La monarko prove piedbatis ĝin por ĉesigi ĝian senĉesan ripetadon de la frazo “Senvualigu la perfidulojn!” sed li trovis, ke ĝi ne estas maŝinhomo, sed homo vivanta. Li koleregis pro la trompiĝo. La terurita majstro devis konfesi, ke li multe klopodis vane kaj fine konvinkigis, ke neblas krei tian perfektan maŝinhomon, kaj nur vivanta homo povas plenumi tiom multe kiel perfekta civitano.

Kvankam "Perfekta Civitano" estas unu el la plej mallongaj rakontoj el la kolekto, tamen ĝi estas sufiĉe bona reprezentanto pri la novelaro ĉu en have, ĉu stile; ĝi estas en certa senco la ĝusta tipo. Ĝi estas unu el la 33 rakontoj elektitaj el la originalaj Esperantaj noveloj far R. Rossetti kaj F. Szilagyi. Do ĝi tre konvenas esti la titolnovelo de tiu ĉi plena kolekto.

Ĉar ĉiu grava verko en Esperanto servas kiel leg- kaj studmaterialo por la lernantoj de la lingvo, mi volas diri kelkajn vortojn ankaŭ pri la lingvo de la verkisto. En pli ol unu punktoj liaj tekstoj devus esti poluritaj; ekzemple: oni devus legi "plasto" anstataŭ "plastiko" (p. 7), "enfermite" anstataŭ "enfermiĝante" (p. 34), "kontraŭ ĝi" anstataŭ "kontraŭ si" (p. 66), "kapturajn" anstataŭ "kapturnigajn" (p. 78), "neorganizite" anstataŭ "senorganizite" (p. 269), "post ĉirkaŭ duonhora" anstataŭ "ĉirkaŭ post duonhora" (p. 277) ktp. Kaj tiun lingvan nefortecon S. Szathmari bone konsciis, kiam li parolis pri la traduko de lia rakonto "Vincenzo" (la sola peco tradukita el la hungara) far K. Kalocsay: "...mi devas danki al Kalocsay ne nur lian helpon, sed precipe la brilan tradukon de la rakonto Vincenzo, per kiu li montris al mi la vojon, kiel mi devus verki, se mi estus ne nur verkisto, sed ankaŭ majstro de nia lingvo." Kvankam la rakontoj legiĝas tre glate kaj ofte plaĉas per siaj freŝaj esprimoj kaj kuraĝaj eltrovaĵoj, tamen mi preferus havi tekstojn sen la misaĵoj. La redaktoro tamen havas alian opinion dirante, "ni klopodis elekti tiun varianton, kiu ŝajnis porti malplej multe da redaktoraj korektoj". Kial eviti la "korektojn", se ili ne estas efektivaj erarigoj?

En p. 304 la 24-an linion sekvas du superfluaĵoj, en p. 452 ripe tiĝas tuta alineo. Mankas unu titolo en la enhavtabelo ĉe la fino! Evidente neglekto de leganto de la presprovaĵoj. Pri la tekniko mi rimarkigu, ke la bindo per gluo ne taŭgas, ĉar post unufoja foliumo

jam elfalis folioj!

Malgraŭ ĉiuj mankoj (tute natura afero), mi gratulas niajn hungarajn Esperanto-eldonistojn pro la sukcesa publikigo de tiu ĉi grava originala verko, kaj mi forte ĝin rekomendas al ĉiuj legantoj kaj studentoj de la Esperanta literaturo.

Recenzis Laŭlum

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

ABISMO 24 bildoj de Ĵano Lajpo kun 24 sonetoj pri ili en Esperanto kaj la germana lingvo de Rikardo Ŝulco, eldonita de Esperanto-Centro Paderborno. Formato: 20 × 20 cm. 78 p. Prezo nemontrita.

SFEROJ-6, kolekto de rakontoj de scienc-fikcio kaj fantasio, eldonita de Grupo Nifo. Formato: 11 × 18 cm. 139 p. Prezo nemontrita.

MALGRANDA GVIDILO TRA LA PARKO DE SANSSOUCI ilustrita per 21 koloraj fotoj kaj mapo pri la bela parko kaj muzeo. Formato: 10 × 19 cm. 24 p. Prezo nemontrita.

MI ESTAS ESPERANTISTO de Smail Grbo pri lia aktivado por Esperanto, eldonita de Voĉo. For-

mato: 12 × 17 cm. 136 p. Prezo: 5 US\$.

ŜANCO POR FELIĈO de Phil Bosmans (poemaro), el la nederlanda tradukis Lydia Kerremans. Eldonita de la Flandra Esperanto-Ligo. Formato: 12 × 21 cm. 96 p. Prezo: 19.9 gld.

PATRINA KORO rakontaro originala de Nevena Nedelĉeva. Eldonita de J. Regulo. Formato: 12 × 17 cm. 150 p. Prezo: 12 gld.

INFODUKTOJ de Luc De Brahandere, esperantigita de Reinhard Beskers, eldonita de UEA/B-SO. Formato: 14.5 × 21 cm. Prezo: 30 gld.

LAŬDO DE L' STULTECO de Erasmo de Roterdamo, el la latina tradukis Gerrit Berveling. Eldonita de la Universala Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 21 cm. 112 p. Prezo: 30 gld.

JUBILEO kolekto de artikoloj de diversaj aŭtoroj, redaktita de Mark Fettes. Eldonita de la Universala Esperanto-Asocio. Formato: 16 × 23 cm. 162 p. Prezo: 57 gld.

LA DANGERA LINGVO de Ulrich Lins, studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Eldonita de Bleicher-Eldonejo. Formato: 12 × 19 cm. 546 p. Prezo nemontrita.

Kontribuu por la rubriko

"Fotoj Faritaj de E-istoj"

"Fotoj Faritaj de E-istoj" en nia gazeto estas rubriko destinita por publikigo de fotoj faritaj de niaj legantoj. Por tiu rubriko ĉiam fervore kunlaboras kun ni la legantoj. Ili sendis al ni multe da fotoj, kaj granda parto el ili estis aperigita en la rubriko.

Por ke nia rubriko estu pli ĉarma, ni esperas pli da fotoj kaj lumbildoj pri la popola vivo, moro, pejzaĝo kaj Esperanta movado de ĉiuj anguloj de la mondo.

La sendintojn de la fotoj, kiuj estos aperigitaj en nia gazeto, ni rekompencos per malgranda donaco — ĉina Esperanta libro. Cetere, en jarfino, nia redakcio sendos donacon en ĉina gusto al la sendintoj de la plej bonaj fotoj.

— La Red.

Li estis kiel perlo kaj tero

— Karmemore al s-ro Honfan

de OUYANG WENDAO

SUR mia skribotablo kuŝas “La Historio de Esperanto”, ĉina traduko, kaj “Esperanto-Ĉina Vortaro” eldonita en 1987, donacitaj de Honfan al mi kun lia subskribo. Liaj ĉinaj ideografiaĵoj penike skribitaj kun fortaj strekoj brilas kiel lia konduto kaj pensigis al mi, ke li estis kiel perlo kaj tero...

Lia moraleco brilis kiel perlo kaj lia kontribuo de dumviva diligenta laboro por la ĉina Esp-movado estis tiel ordinara kiel tero. La supre menciitaj du libroj estas pruvo ke li estis kiel tero. Kiel la ĉefredaktoro de la vortaro, s-ro Honfan donis grandan energion kaj serioze faris multan laboron, kion mi propraokule vidis kaj estis profunde kortuŝita.

Mi konatiĝis kun li en la Unua Tutlanda Simpozio de Cifero-kompilado por la Ĉinaj Ideografiaĵoj okazinta en Qingdao (Ĉingdaŭ) en la somera fino de 1980. Kiam ni interŝanĝis koncernajn problemojn en la kunveno, mi informiĝis, ke li

estas redaktoro de EPĈ. En la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam mi lernis en mezlernejo, mi memlernis Esperanton. Sed en la postaj jaroj, pro okupiĝo pri revoluciaj kaj sciencaj laboroj, mi forlasis Esperanton. Estis Honfan, kiu revenigis min en la Esperantan mondon. Tiam mi ne nur fariĝis leganto de EPĈ, sed ankaŭ konatiĝis poste kun Tikos, multaj veteranaj esperantistoj kaj novaj amikoj. En tiu ĉi mondo mi vidis prosperan amasan Esp-movadon en la tuta lando kaj trovis pli multajn bonajn instruistojn kaj amikojn. Dank’ al ilia stimulo kaj subteno, mi komencis kombini la scienc-esploran laboron kun Esperanto.

Surbaze de mia propra kono pri la lingva baro en sciencaj interŝanĝoj, mi verkis la artikolon “Lingva Problemo en Sciencoj kaj Rolo de Esperanto”. Instigite de Honfan, mi publikigis ĝin en EPĈ, kiu poste reaperis en Esperantaj gazetoj kaj broŝuroj de pluraj landoj,

inkluzive de “Eŭropa Dokumentoj” kaj “Pri Humancibernetiko”, ĉar la lingva problemoj en sciencoj ĝuste estas komune zorgata de la scienc-teknikaj rondoj de la mondo. La propono en la artikolo pri uzo de Esperanto kiel pontolingvo en maŝina tradukado nun estas efektiva en Distribuita Lingva Tradukado de la Eŭropa Komunumo.


S-ro Honfan zorgis precipe la problemon pri

maŝina tradukado de la ĉina lingvo. Mi proponis en mia artikolo, ke tiu ĉi laboro devos esti plenumita de ĉinoj, pri tio mi ofte diskutis kun Honfan. Ankaŭ li havis grandan intereson pri tio kaj ofte prezentis iujn opiniojn laŭ trajto de Esperanto, sekve de tio mi ofte vizitis lin. Ni ofte emociiĝis pro nia komuna kono en la diskuto pri tre proksima trajto en Esperanto kaj la ĉina lingvo. En la diskutoj iom post iom maturiĝis mia projekto preni la vortradikojn de Esperanto kiel semantikajn modelojn de la ĉin-lingvaj informoj, kaj mi disvolvis tiun penson en mia disertacio “La 5-dimensia Modelo de Ĉinlingvo”, kiu vekis atenton ĉe enkaj eksterlandaj scienc-teknikaj rondoj post sia publikiĝo. S-ro Honfan bone posedis Esperanton kaj liaj trafaj opinioj ofte inspiris min. Kiel scienc-teknika laboranto mi ricevis de tiu ĉi lingvisto nemalmultajn utilajn lecionojn. Ĉiam rememorinda estas nia amikeco kaj ankaŭ akademia interŝanĝo!

En Esperanto mi korespondis kun la monda scienc-teknika rondo, en tio Honfan donis al mi varman helpon. En la komenco mi ofte petis de li helpon por korekti erarojn en miaj leteroj kaj artikoloj kaj li ĉiam serioze plenumis mian peton, kio multe progresigis mian verkadon en Esperanto. Dank’ al la influo kaj helpo de Honfan k.a., mi havis certan progreson en la interkonumiko kaj kunlaboro kun la monda scienc-teknika rondo.

En 1987 invitite mi faris trimonatan sciencon viziton al la Instituto pri Cibernetiko de la Universitato

S-ro Honfan kaj lia nepo



Pri tumulto en Pekino



De aprilo ĝis junio 1989 okazis en Pekino serioza tumulto. En la lastaj 3 monatoj ni ricevis leterojn de niaj legantoj, en kiuj ili faris diversajn demandojn pri la evento. Ni donas jenajn respondojn, por ke ili bone konu la veron de la tumulto.

La Red. de EPC

Demando: Kial aperis la tumulto?

Respondo: La 15-an de aprilo Hu Yaobang, iama ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (KPC), mortis ekster atendo. La ĉina popolo sentis profundan malĝojon. Kun la sama sento multaj studentoj partoprenis funebrajn aktivadojn, sed areto da insidemuloj kaptis la okazon por levi tumulton kontraŭ la gvido de KPC kaj la socialisma sistemo.

Instigate de la homoj kun kaŝita motivo, ne obeante la konstitucion kaj admonon de la aŭtoritatoj, studentoj de iuj superaj lernejoj de Pekino gluis multajn dazibao-ojn (opiniafiŝojn) en la korto de la lernejoj atakantaj la Komunistan Partion kaj registaron. Malobservante la regulojn difinitajn de la Pekina Registaro pri manifestacio, ili manifestaciis en sinsekvaj tagoj. En la profunda nokto de la 18-a kaj 19-a de aprilo ili sturmis Xinhua-pardon de la sidejo de la Centra Komitato de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro, kriante sloganojn kontraŭ la registaro. Ili organizantoj semis kalumniojn kaj demagogiojn. Hu Yaobang mortis de subita grandarea miokardia infarkto post 7-taga plenenergia savado, sed iuj mensogis, ke li mortis post kverelo kun iu gvidanto de la Centra Komitato. Nokte de la 19-a de aprilo okazis trafika akcidento: Iu studentino estis vundita de trolebuso survoje al la lernejo post vesper-kunveno. Ŝi mortis post vana savado. Sed homoj kun kaŝita motivo semis kalumnion, ke ŝin intence mortigis policano per aŭto. Matene de la 20-a de aprilo policanoj pelis la studentojn sieĝantaj kaj sturmantaj Xinhua-pardon kaj veturigis ilin al la Pekina Universitato, sed tiuj kun kaŝita motivo mensogis, ke policanoj batis studentojn, laboristojn, virinojn kaj infanojn ĉe la pordo. Ili mensogis, ke mil sciencistoj kaj teknikistoj falis kun sangoverŝo. Pro insida instigado furioziĝis malkontentaj studentoj.

La 22-an de aprilo la funebra kunveno por Hu Yaobang okazis en la Popola Halo. Matene de tiu tago, sub la agitado de la insidemuloj, dekmiloj da studentoj okupis Tian'anmen-placon, oriente de la Popola Halo. Ili faris diversajn maljustajn postulojn, pro kio la funebra kunveno preŝkaŭ interrompiĝis. Post la kunveno Li Peng, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj ŝtato forlasis la halon, sed por krei pretekston ataki Li Peng, iuj mensogis: "Ĉefministro Li Peng promesis akcepti studentojn sur la placo je 45 minutoj post la 12-a." Post tio 3 studentoj iris sur la peronon ĉe la orienta pordo de la Popola Halo kaj genuiĝis por doni peticion kaj tuj poste ili kalumniis: "Li Peng ŝanĝis la decidon akcepti la studentojn kaj trompis ilin." Tiel ili ekscitis fortan malkontenton de la studentoj sur la placo kaj pluapaŝe akriĝis ilian kontraŭstaron al la registaro. Plenmano da insidemuloj, profitante de la anormala sento, diris: "Ni faris pacan peticion, sed la registaro tion malatentis. Ni telegrafu al la tuta lando por kuna striko." Sekve de tio okazis studenta striko, en kiun involviĝis 60 mil studentoj. En la studentan strikon involviĝis ankaŭ alilokaj studentoj.

La ĉi-foja tumulto kun profunda internacia fono kaj enlanda socia bazo koviĝis antaŭlonge. La morto de Hu Yaobang akcelis nur ĝian eksplodon.

Septembre de 1988 la Centra Komitato de KPC decidis reguligi la ekonomian medion kaj reordigi la ekonomian ordon por komplete profundigi la reformadon. Tion aprobis la vasta popolamaso kaj junaj studentoj. Ĝenerale dirite, la socia ordo kaj politika situacio tiam estis stabila. Tamen estas fakto, ke plenmano da homoj en KPC kaj en la socio komplotis unu kun alia kaj faris multajn anormalajn aktivadojn publikajn kaj sekretajn. Ili aktive respondis al la strategio de politikaj fortoj de la Okcidenta Mondo, kiuj intencis igi Ĉinion devii de la socialisma vojo kaj konduki ĝin sur la kapitalisman vojon.

Fine de 1988 kaj komence de 1989 okazis en Pekino iuj eraraj kaj eĉ reakciaj politikaj kunvenoj. Oni prezentis kolektivajn peticion, gluis dazibao-ojn kaj faris aliajn aktivadojn: Januare de 1989 Fang Lizhi, esploristo de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kune kun aliaj malfermis la tiel nomatan "novan klerigan salonon". Fang diris, ke tiaj kunvenoj prenis "tute kritikan sintenon kontraŭ la aŭtoritatoj"; "kun fortaj odoroj de pulvo", "oni devas agi", kaj "se okazos 3 sinsekvaj kunvenoj, oni manifestacios surstrate." Februare iuj

okazigis “amikan kunvenon”, “akceptan kunvenon”, sendis “kolektivian peticion”, kriis “batalu por demokratio”, postulis liberigi “politikajn malliberulojn”. Komence de marto en Qinghua-universitato kaj la Pekina Univesitato aperis dazibao-oj atakantaj Deng Xiaoping, prezidanton de la Milita Komisiono sub la Centra Komitato de KPĈ. Samtempe kun tio en altaj lernejoj de Pekino oni okazigis diversajn “studkunvenojn” kaj “diskutojn”. En la Pekina Universitato studento Wang Dan faris “demokratian salonon”, kiu donis jam 17 prelegojn en unu jaro. En kunveno iu publike deklaris “aboli unu-partian diktaturon, senigi la Komunistan Partion je la gvida posteno kaj renversi la nunan reĝimon”. Hongkonga ĵurnalo “Mingbao” komentariis, ke jam delonge ili deziris fari grandan aktivadon en la 70-a datreveno de la Movado de la Kvara de Majo por montri sian malkontenton kontraŭ la aŭtoritatoj.

La 24-an de aprilo la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ analizis la evoluon de la afero kaj unuvoĉe opiniis, ke elkoviĝis planita kaj organizita kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma politika batalo. La Konstanta Komitato postulis, ke la Pekina Komitato de KPĈ kaj la Pekina Registaro plene mobilizu la popolamason, gajnu la plejmulton kaj izolu la plejmalmulton por subpremi la tumulton kaj stabiligi la situacion kiel eble plej rapide. En la sekvanta tago Deng Xiaoping faris gravan paroladon, akre montrante, ke tio ne estas simpla studenta striko, sed politika tumulto por nuligi la gvidantecon de KPĈ kaj la socialisman sistemon. La 26-an de aprilo *Renmin Ribao*, organo de la Centra Komitato de KPĈ, publikigis ĉefartikolon kun titolo “Decideme batalu kontraŭ la tumulto”. La artikolo montris la karakteron de la tumulto kaj distingis la plenmanon da organizantoj de la tumulto disde la junaj studentoj. Post la publikigo de la artikolo, dank’ al admono al kaj interparolo kun studentoj iom malstreĉiĝis la situacio.

Sed ĝuste en la tempo, kiam la tumulto estis preskaŭ kvietigita, Zhao Ziyang, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de KPĈ, ŝanĝis sian sintenon al la afero. Kiam li vizitis Koreion, la Konstanta Komitato de la Centra Komitato de KPĈ telegrafe petis lian opinion. Li sendis respondan telegramon, en kiu li klare diris, ke li “tute aprobas la decidon de Deng Xiaoping pri traktado de la tumulto”. Post kiam li revenis la patrolandon la 30-an de aprilo, li refoje diris en la kunveno de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo, ke li aprobas la ĉefartikolon de la 26-a de aprilo pri determino de la eco de la tumulto, opiniante, ke la Konstanta Komitato bone traktis la studentan strikon en la pasintaj tagoj, sed posttagmeze de la 4-a de majo, kiam li akceptis ĉeestantojn de la Jarkunveno de Azia Banko, li faris parolon tute kontraŭan al la decido de la Konstanta Komitato, al la opinio de Deng Xiaoping kaj al la ĉefartikolo de *Renmin Ribao*. Tio montris, ke li komplete renversis la ĝustan juĝon de la Centra Komitato, ke plenmano da homoj jam kreis tumulton. Post plenenergia distrumpetado de *Renmin Ribao* kaj aliaj ĵurnaloj pri lia parolo estiĝis serioza konfuzo en la oficistaro kaj popolamaso kaj kuraĝiĝis la organizantoj de la tumulto.

Instigate de Zhao Ziyang kaj organizite de areto da insidemuloj, la ĉefoj de la kontraŭleĝaj organizoj “Aŭtonomaj Asocioj” de la Pekina Universitato kaj la Pekina Instruista Universitato denove deklaris strikon vespere de la sama tago. La strikon deklaris ankaŭ multaj aliaj lernejoj, tiel ke denove aperis manifestacio. Influante de Pekino, la situacio jam stabiliĝinta en aliaj provincoj denove serioziĝis.

Honestaj homoj eble demandus, kial la studentoj tiel serioze tumultis? Ĉu tion kaŭzis, ke la registaro ne komprenis ilin? Fakte ne. Tuj en la komenco de la tumulto la Partio kaj registaro laŭdis la patriotismon de la junaj studentoj kaj konfesis, ke ilia deziro pri akcelo de demokratio, profundigo de reformado, puno al ŝtatoficistoj-ŝakristoj kaj elradikigo de koruptiĝo estas tute akorda kun tiu de la Partio kaj registaro. La Partio kaj registaro deziris solvi tiujn problemojn laŭ demokratia vojo kaj leĝa sistemo. Sed tiu bona deziro ne ricevis grandan eĥon. La registaro esperis komuniki pensojn kaj akceli interkomprenon en diversaj kanaloj, diversaj tavoloj kaj diversaj formoj, dum la kontraŭleĝa studenta organizo elmetis rigorajn antaŭkondiĉojn, kvazaŭ ili farus politikan intertraktadon kun la Partio kaj registaro. Eĉ en tia cirkonstanco la Partio kaj registaro estis sufiĉe tolerema kaj sinrega, esperante plue teni la vojon de interparolo por eduki la popolamason kaj gajni ĝian plejparton.

Je la 2-a matene de la 13-a de majo la ĉefoj de la kontraŭleĝa Federacio de Pekinaj Altlernejaj Aŭtonomaj Asocioj proponis interparoli kaj post 2 horoj koncerna departemento de la registaro donis konsenton, sed post la tagiĝo ili nuligis la interparolon. Antaŭtagmeze de la 13-a de majo la koncerna departemento refoje informis ilin, ke la interparolo okazos la 15-an de majo. Ili unuflanke konsentis kaj aliflanke ĉikanis en la nombro de la ĉeestantoj de la interparolo. Unue ili proponis nomliston de 20 ĉeestantoj de la interparolo, sed post kiam la registaro akceptis la proponon, ili ŝanĝis sian opinion kaj volis 10-obligi la nombron de la ĉeestantoj, sed antaŭ ol la registaro faris sufiĉan pripenson, ili kritikis, ke “la registaro ne havas sincerecon por interparolo” kaj 4 horojn post kiam ili informiĝis pri la interparolo, ili haste publikigis “deklaron pri malsatstrikon” preparitan antaŭlonge kaj tiel komencis la grandskalan 7-tagan malsatstrikon de 3 000 homoj. De tiam ili okupis Tian’ anmen-placon. La malgrandnombraj organizantoj de la tumulto prenis la vivon de la malsatstrikantoj kiel vetaĵon kaj minacis la registaron per malicaj rimedoj. Pro tio la tumulto fariĝis pli serioza.

Demando: Kiujn rimedojn la registaro prenis, post kiam komenciĝis la studenta malsatstrikto? Ĉu mortis iu en la malsatstrikto?

Respondo: Dum la studenta malsatstrikto la Partio kaj registaro estis tre paciencaj kaj sinregaj kaj faris ĉion eblan. Antaŭ ĉio la laborantoj de la lernejoj, diversnivelaĵoj, inkl. de la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj, plurfoje vizitis la malsatstrikantojn sur Tian'anmen-placo kaj pacience admonis ilin. Due, la Ĉina Ruĝa Kruco rekviziis pli ol 100 ambulancojn, sendis centojn da medicinistoj al la malsatstrikto kaj elpetis 2 000 malsanulajn litojn de 52 hospitaloj por garanti la urĝan savadon kaj kuracadon de la studentoj, kiujn trafis ŝoko aŭ aliaj malsanoj. Trie, la registaro liveris diversajn objektojn por kiel eble plej multe mildigi la suferon de la malsatstrikantaj studentoj kaj garanti ilian sekurecon. La Partia Komitato kaj Popola Registaro de Pekino rekviziis kadrojn, laboristojn kaj aŭtojn por liveri, pere de la Ruĝa Kruco, al la malsatstrikantoj akvon, salon kaj sukerojn. La Medi-protekta Buroo servis al ili per akvumveturiloj, lavpelvoĵoj kaj mantukoj. La Medikamenta Kompanio alportis sufiĉe da kuraciloj kontraŭ sunfrapo, lakso ktp. La kompanio de nutraĵoj transportis sufiĉe da trinkaĵoj, pano ktp. Vendejoj donis 6 000 pajoĉapelojn. Petate de la Pekina Registaro, la Pekina Milita Regiono donis 1 000 vatitajn litkovrilojn por ŝirmi la malsatstrikantojn kontraŭ sunlumo en tago kaj malvarmo en nokto. Por la pureco de la malsatstrikto oni starigis provizorajn necesejojn. La stratpurigistoj purigis la malsatstriktojn en nokto. Antaŭvespere de la 18-a de majo, informiĝinte de veter-prognozo pri pluvo, la registaro pruntis 78 aŭtobusojn de la Trafika Kompanio kaj 400 tabulojn de la Materiala Buroo por ŝirmi la malsatstrikantojn de pluvo kaj malsekeco. En la 7 tagoj de la malsatstrikto neniu studento mortis de la malsatstrikto.

Demando: Kial tiel multaj loĝantoj de Pekino estis envolvitaj en la tumulton?

Respondo: Tiam plejparto de la loĝantoj de Pekino vidis nur la patriotismon de la junaj studentoj, sed ne sciis la fonon de la socio kaj la veron de la tumulto kaj samtempe ili estas malkontentaj pri la eraroj de la Partio kaj registaro en la laboro, malkontentaj pri la putriĝo de ŝtato-ficistoj kaj pro tio ili estis simpatiaj al la junaj studentoj.

Estas menciinde, ke en la tempo, kiam la evento iom post iom graviĝis, Zhao Ziyang ne nur ne faris necesan laboron, sed male, agitis la ĵurnalistan rondon kaj misgvidis la publikan opinionon. La 6-an de majo li diris al respondeculo pri propagando de la Centra Komitato de la Partio: "Pli multe raportu pri la studenta striko, pri la manifestacio. En tio ne estas granda risko." En la sama tago oni diskonigis lian instrukcion al la ĵurnalista rondo de Pekino kaj post tio li plurfoje faris aranĝon. *Renmin Ribao*, la Centra Televido kaj aliaj gazetoj tuj subtenis la manifestacion, sid- kaj malsatstriktojn kaj faris multajn kaj eĉ troigajn raportojn. Pro la erara influo de la publika opinio, de la 15-a de majo pli kaj pli multaj homoj manifestaciis por subteno. La nombro de la manifestaciantoj kreskis de dekmiloj al centmiloj, kaj krome 200 000 studentoj venis al Pekino de diversaj landpartoj por subteni la malsatstrikon. Manifestacio aperis ankaŭ en aliaj grandaj kaj iuj mez- kaj malgrandaj urboj. En tiuj tagoj oni havis la impreson, ke "kiuj staras ekster la manifestacio, ne estas patriotaj. Kiuj ne subtenas la malsatstrikon, ne zorgas pri la vivo de la studentoj." Estas senprecedencaj la nombro de la envolvitoj kaj la seriozeco de la tumulto.

Demando: Ĉu estas necesa la praktikado de milita leĝo en iuj lokoj de Pekino?

Respondo: Post kiam komenciĝis la malsatstrikto de studentoj en la 13-a de majo, la situacio de Pekino fariĝis pli kaj pli serioza, anarkiismo pli kaj pli grava, pluraj lernejoj paralizigis, la trafiko ĉesis en multaj lokoj, la partiaj kaj registaraj institucioj estis atakitaj, la socia sekureco ne garantiata, ĉio ĉi serioze damaĝis la produktadon, ĉiutagan laboron kaj normalan vivon de la pekinaj loĝantoj. La aŭtoritatoj devigite nuligis iujn aranĝojn por la mondfama renkontiĝo de la superaj gvidantoj de Ĉinio kaj Sovetunio, kio damaĝis la internacian aspekton de Ĉinio kaj ĝian renomon. Rezentantoj de la malsatstrikantaj studentoj sur Tian'anmen-placo diris, ke ili jam ne povas plu regi la situacion. Cetere, la situacio de Pekino infektis aliajn urbojn de la lando. En pluraj lokoj oni sturmis la tieajn gvidajn instituciojn de la Partio kaj registaro, okazis seriozaj kontraŭleĝaj detruoj. La fervoja trafiko en iuj lokoj estis rompita.

Ĉio ĉi montras, ke se la aŭtoritatoj ne aplikus efikan rimedon por tuj ŝanĝi kaj stabiligi la situacion de Pekino, fatalo falus sur la reformadon, pordmalfermon kaj estontecon de nia respubliko. Tamen la nombro de la policanoj en Pekino estis ne sufiĉa por konservi la socian ordon, tial la ĉina registaro decidis, per la rajtoj donitaj de la konstitucio, praktiki militan leĝon en iuj lokoj de Pekino ekde la 20-a de majo. Laŭ la ordono de la registaro la Ĉina Popola Liberiga Armeo eniris en la urbon por helpi la policanojn en plenumo de la tasko. Ĝi gardas gravajn instituciojn kaj ĉefajn vojkruciĝojn, ne intervenas en la ŝtatajn aferojn kaj socian ekonomian vivon. Ĝi ludas rolon de konservo de la socia ordo. Tio estas tute malsama ol milita kontrolo kaj elirmalpermeso. Faktoj jam pruvis, ke estas necesa la plenumo de la milita leĝo en iuj lokoj de Pekino por garanti la stabilecon de la ĉefurbo kaj de la tuta lando.

Demando: Kial la trupoj pafis dum la marŝo al Tian'anmen-placo en la 3-a de junio? Kiom da homoj tiam mortis kaj vundiĝis?

Respondo: En la 20-a de majo, kiam la dekreto pri milita leĝo estis publikigita, malmultege da aĉuloj trompe instigis studentojn kaj urbanojn, ke ili baru la trupojn ekster Pekino. Ili senĉese levis provokojn, ke la tumulto disvolviĝis en ribelon. Fronte al la serioza malhelpo, la trupoj montris sin ekstreme paciencaj kaj eltenemaj. Ili estis katenitaj ekster la urbo je 14 tagoj.

En la profunda nokto de la 2-a de junio okazis trafika akcidento en la urbocentro de Pekino. Malmultege da aĉuloj agitis utiligante la akcidenton. En la 3-a de junio, sub la agitado de fiuloj, iuj perforte halĝigis armeajn aŭtojn kaj forrabis pafilojn kaj kuglojn sur movoplenaj stratoj.

Nokte de la 3-a, komisiitaj trupoj marŝis al Tian'anmen-placo por ĝin malplenigi. Por eviti damaĝon al la urbanoj dum marŝado, la Pekina Popola Registaro kaj la Stabejo de la Trupoj Praktikantaj Militan Leĝon publikigis urĝan anoncon je duono post la 18-a horo, ke "ĉiuj urbanoj estu singardemaj, ne iru sur la stratojn, nek al Tian'anmen-placo. La laboristoj persistu en laboro, la urbanoj restu hejme, por esti sekuraj". La anonco estis fojon post fojo disaŭdigita de radio, televizio kaj aliaj kanaloj.

Ĉirkaŭ la 22-a horo de la 3-a, la komisiitaj trupoj eniris la urbon unu post alia. Sed ĉe la gravaj vojkruciĝoj ili renkontis fortan reziston. Eĉ tiam la trupoj ankoraŭ sin montris ekstreme eltenemaj. La aĉuloj morte malamantaj la popolan armeon, utiligante ilian eltenemon, faris kruelaĵojn.

En tiuj malpacaj tagoj la aĉuloj detruis kaj difektis 1 280 aŭtojn armeajn, policajn kaj publiktrafikajn, inter kiuj estis 1 000 armeaj aŭtoj kaj 60 kirasaŭtoj, 30 policaj aŭtoj, 120 aŭtobusoj kaj trolebusoj kaj 70 alispecaj aŭtoj. Pli ol 6 000 personoj el la armeo, la armita polico kaj la publiksekura polico estis vunditaj kaj dekoj mortigitaj.

Seriozaj estis la vundiĝo kaj morto por la Trupoj Praktikantaj Militan Leĝon. Jam estis malfacile toleri plu la barbaraĵojn. Por elhaki al si vojon, la trupoj pafis supren por averto. Sed la atako de la aĉuloj ne ĉesis. En tia stato la trupoj devigite faris rebaton kaj pafmortigis nombron da aĉuloj. Dum tio iuj el la rigardantaj pasantoj estis vunditaj aŭ pro kolizio kontraŭ aŭtoj kaj interpuŝiĝo de homamasoj aŭ pro sencelaj kugloj. Aliaj estis vunditaj aŭ mortigitaj de pafoj de aĉuloj. Statistiko raportis, ke vundiĝis pli ol 3 000 civiluloj kaj mortis pli ol 200 inkl. 36 studentojn. Inter tiuj personoj estis apaĉoj, civiluloj, medicinistoj plenumantaj taskon ĉeloke kaj laborantoj penantaj por konservi la socian ordon. Nun la registaro estas serioze faranta aranĝon por la mistrafitaj civiluloj kaj laborantoj plenumantaj taskon.

Demando: Ĉu prava estas la diro "sanga amasbuĉado sur Tian'anmen-placo"?

Respondo: "Voĉo de Usono" mensogis kaj iuj maliculoj disvastigadis la mensogojn, ke post la eniro en la urbon la trupoj faris "sangan amasbuĉadon sur Tian'anmen-placo", ke "miloj kaj eĉ dekmiloj da homoj falis en sango". Tian'anmen-placo estas areo ĉirkaŭita de Tian'anmen-pordego en nordo, la Popola Halo en okcidento, la Historia Muzeo en oriento kaj la Memorhalo de Mao Zedong en sudo. La Monumento de Popolaj Herooj impone staras en la sudo de la placo. La fakto estis tia:

Post la eniro de la trupoj en la placon, je duono post la 1-a horo de la 4-a de junio, la Pekina Popola Registaro kaj la Stabejo de la Trupoj Praktikantaj Militan Leĝon publikigis urĝan anoncon: "Ĉi-nokte en la ĉefurbo okazis serioza kontraŭrevolucia ribelo", "la civiluloj kaj studentoj sur Tian'anmen-placo tuj forlasu la placon, por ke la trupoj povu plenumi la taskon." La anonco estis ripetade laŭte disaŭdigita dum pli ol 3 horoj. Tiam la sidostrikantaj studentoj jam kolektiĝis ĉirkaŭe de la monumento. Ĉirkaŭ la 3-a horo, post interkonsiliĝo, ili elsendis delegitojn por informi la trupojn, ke ili volas mem retiriĝi el la placo. Komandantoj de la trupoj tuj konsentis ilian peton. Je duono post la 4-a estis disaŭdigita la sciigo de la stabejo de la trupoj: "Nun komenciĝas malplenigo de la placo. Ni konsentas la peton de la studentoj pri retiriĝo." Samtempe kun tio oni disaŭdigis la anoncon de la Pekina Popola Registaro kaj la Stabejo de la Trupoj Praktikantaj Militan Leĝon pri tuja enmeto de Tian'anmen-placo en ordon. Aŭdinte la disaŭdigon, la miloj da studentoj, kun siaj flagoj kaj slogan-rubandoj, forlasis la placon ĉirkaŭ la 5-a, en vicaro borderita per homaj ĉenoj el studentoj. La trupoj lasis al la studentoj larĝan koridoron sudoriente de la placo, por ke ĉi tiuj glate kaj sekure eliru. Sed parto de la studentoj ankoraŭ insiste restis surloke, kaj la trupoj, laŭ la ordono de la anonco, perforte pelis ilin el la placo. Je duono post la 5-a la placo fariĝis malplena. Neniu el la studentoj sidostrikantaj sur la placo, inkluzive de tiuj perforte elpelitaj, mortis dum la malplenigado de la placo.

Komponisto Hou Dejian, kiu la lasta forlasis la placon matene de la 4-a de junio, vidis neniun el la studentoj, civiluloj kaj soldatoj mortigita dum la malplenigado de la placo, nek tankojn aŭ kirasaŭtojn veturantaj rekte sur homamasojn.

Demando: Ĉu "blanka teroro" regis en Pekino post la 4-a de junio? Ĉu la sekureco de pekinanoj kaj

fremdlandanoj estas garantiata?

Respondo: Post subpremado de la ribelo en la 4-a de junio rapide normaligis la situacio en Pekino. En la mezo de la monato renormaligis la socia ordo de Pekino: Sur la stratoj aŭtoj multas kiel antaŭe, la vendejoj rekomencis funkciadon kaj la pasantoj montris trankvilan mienon. Post kompleta renormaligo de la urba trafiko en la 12-a de junio la fabrikoj kaj oficejoj rekomencis sian laboron. Multaj fabrikoj, inkluzive de tiuj starigitaj per ĉina-alilanda kapitalo, neniam ĉesis funkcii dum la subpremado de la ribelo. La pekina flughaveno neniam tagon estis fermita. La Imperiestra Palaco estis remalfermita al la publiko kaj turistoj venis al Pekino grupojn post grupoj. Revenis unuj post aliaj la fremdlandaj komercistoj forveturintaj pro la evento. Ekde la unua tagdeko de aŭgusto la superaj lernejoj en Pekino unu post alia komencis novan semestron, kaj la plej malfruaj en oktobro.

Kvankam parto de Pekino estas ankoraŭ sub la kontrolo de la armeo, tamen multe reduktigis la nombro de la kontrolaj trupoj. Ili neniam malhelpis la vivon de la urbanoj. Krom patrolado, ili ankaŭ laboris sur la konstruejoj de stadionoj por la Azia Sportkunveno, transportis per siaj kamionoj grenon por grenvendejoj kaj helpis balaistojn forporti rubon. Iuj trupoj sendis kuracistojn por medicina konsultigo por urbanoj aŭ soldatojn por ilia senpaga hartondo, aŭ por senpaga riparo de iliaj bicikloj, televidiloj kaj magnetofonoj. Siavice urbanoj venis al la kantonmentoj por esprimi dankon. La trupoj kaj la urbanoj vivas en harmonio. La sekureco ĉu de pekinanoj, ĉu de fremdlandanoj, estas absolute garantiataj, nur se ili obeas la leĝon.

Demando: Ĉu la ĉina registaro punos la studentojn, kiuj manifestaciis, sidostrikis au/ malsatstrikis?

Respondo: La registaro ne punos tiujn, kiuj ne malobeas la leĝon. Ĉefministro Li Peng solene deklaris en la 19-a de majo, ke la patriotismo de la vastaj studentaj amasoj estos certe protektata, ili estos klare distingitaj disde malmultege da aĉuloj provokantaj la tumulton kaj ili ne estos punataj pro siaj tro radikalaj paroloj kaj faroj. Krome, la Partio kaj registaro daŭrigos en pli multaj niveloj, pli multaj kanaloj kaj pli multaj formoj la interparolon kun studentoj kaj personoj de diversaj tavoloj de la socio, inkluzive de studentoj partoprenintaj en manifestacio, sidostriko kaj malsatstriko, por aŭs kulti kritikojn de diversaj flankoj. La registaro donos klaran respondon al la bonaj postuloj de la studentoj. La Partio kaj registaro atente aŭskultos kaj konsentos iliajn bonajn kritikojn kaj konsilojn.

Antaŭ nelonge la ĝenerala sekretario de KPCĜ Jiang Zemin kaj aliaj partiaj gvidantoj kunsidis kun profesoroj kaj studentoj de Qinghua-universitato, la Pekina Universitato kaj la Ĉina Popola Universitato, atente aŭskultis iliajn kritikojn kaj konsilojn. Li ripetade trankviligis la studentojn kun promeso, ke la Partio kaj registaro ne punos ilin pro iliaj tro radikalaj paroloj kaj faroj.

Ĉe la komenciĝo de la nova semestro la universitatoj donis al la studentoj lecionojn, kiujn ili forlasis en la pasinta semestro, kaj samtempe kun tio aranĝis diskursojn kaj diskutojn, por ke ili klare konu la veron de la tumulto kaj profundigu sian ideologian konon.

Demando: Kiel ni au/dis, dum la tumulto la popolo plej multe plendis kontraŭ/ putriĝo kaj ŝakrado de ŝtatoficistoj. Kiajn rimedojn la registaro alprenis por ilin forigi?

Respondo: En julio en plena sesio de la Politika Buroo de CK de KPCĜ estis diskutita kaj aprobita la "Decido de CK de KPCĜ kaj la Ŝtata Konsilantaro pri la Baldaŭa Solvo de Kelkaj Problemoj Interesantaj la Popolon". Tio esprimis la firman volon de la Partio kaj registaro en senindulga forigo de putreco kaj en ekzemplodono por honesta sindonemo kaj modesta vivo.

La sep plenumotaj aferoj en la decido estas:

1. Pluaparte prienketi kaj reordigi la kompaniojn. La gravito de tiu laboro estas fermi la superflujajn kompaniojn kaj financajn kompaniojn en la cirkula kampo, kiuj entreprenas komercon, eksteran komercon kaj materialan provizon. La prienketado kaj reordigado komenciĝos de la kompanioj rekte sub la Ŝtata Konsilantaro. Raporto pri enketado pri la kompanioj estos kiel eble plej baldaŭ publikigita.

2. Sencede malpermesi al la gefiloj de altrangaj kadroj entrepreni komercon. Tio komenciĝos de la membroj de la Politika Buroo kaj Sekretariejo de CK de KPCĜ kaj tiuj de la Konstanta Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro. Iliedz(in)oj, gefiloj kaj bogefiloj ne devas entrepreni komercon en la cirkula kampo, nek ofici aŭ kumule ofici en la kompanioj de la cirkula kampo. La ŝtataj gvidantoj ne devas uzi sian povon por favori siajn parencojn kaj amikojn per privilegiaj kondiĉoj.

3. Nuligi la privilegian provianton por ŝtataj gvidantoj. La varprezoj en la kantino de privilegia provianto estos samaj kiel tiuj por la popolanoj. La prezodifino kaj entreprenado de la kantino estos kontrolataj de la administracioj de prezaro, industrio kaj komerco.

4. Disdoni aŭtomobilojn al gvidantoj tute laŭ la difino kaj severe malpermesi importi fremdlandajn aŭtomobilojn (escepte de tiuj laŭ la longtempaj komercaj interkonsentoj subskribitaj inter registaroj kaj tiuj laŭ la teknik-komercaj kontraktoj sankciitaj de la ŝtato). La membroj de la Politika Buroo kaj Sekretariejo de

CK de KPCĉ kaj tiuj de la Konstanta Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro senescepte uzu aŭtomobilojn enlande produktitajn.

5. Severe malpermesi regali kaj donaci el la ŝtata kaso. La membroj de la Politika Buroo kaj Sekretariejo de CK de KPCĉ kaj tiuj de la Konstanta Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro ne devas regali enlandajn gastojn el la ŝtata kaso; kiam ili venas al malsuperaj kaj bazaj oficejoj kaj entreprenoj, ili devas preni labor-manĝon, kies kosto estu tute konforma al la difino. Ili ne devas akcepti donacojn.

6. Rigore ekzameni la necesecon de vizito de gvidantaj kadroj al aliaj landoj. Rigore observi la difinojn pri vizito al aliaj landoj. Tia vizito de kadroj super la rango de provincestro aŭ ministro devas esti necesa pro la ŝtata afero aŭ ilia ofico. Ili ne devas iri eksterlanden laŭ invito de fremdlanda entreprenisto aŭ ĉina entrepreno eksterlanda kaj ne devas iri eksterlanden sub la preteksto de esplorado por fari viziton nenecesan por ilia ofico kaj nekonforman al ilia rango kaj profesio.

7. Severe kaj serioze prienketi kaj puni malversacion, koruptiĝon kaj spekuladon, precipe tiujn en granda sumo. Daŭre akcenti la principon "ĉiuj estas egalrajtaj antaŭ la leĝo". Malkaŝi kaj puni la propetantojn kaj kaŝantojn.

Kelkaj el la supre menciitaj aferoj estas praktikataj, por la ceteraj la koncernaj departementoj estas komisiitaj ellabori detalajn difinojn, kiujn oni praktikos post la sankcio de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPCĉ kaj la Ŝtata Konsilantaro.

Demando: Ĉu ŝanĝiĝos la politiko de reformado kaj pordomalfermo?

Respondo: La ĉinaj plej superaj gvidantoj plurfoje substrekis ĝin. Deng Xiaoping, prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPCĉ, diris en la 9-a de junio: "Ĉu eraris la principo de reformado kaj pordomalfermo? Ne. Kiel ni povus havi la nunan situacion sen reformado kaj pordomalfermo? Dum la lastaj dek jaroj multe boniĝis la vivo de la popolo. Ni povas diri, ke ni paŝis sur pli altan ŝtupon." "Ni persistos en la fundamenta linio, principo kaj politikoj, kiujn ni ellaboris antaŭe, persistos sendevie." "Ne ŝanĝiĝos la fundamenta linio, la fundamentaj principo kaj politikoj."

Ĉefministro Li Peng emfazis en sia parolo en la 2-a de septembro: "Estos daŭre praktikataj la rimedoj de reformado kaj pordomalfermo publikigitaj antaŭ la Kvara Plena Sesio de la 13-a CK de KPCĉ, se ili estis diskutitaj kaj aprobitaj de la Centra Komitato aŭ la Ŝtata Konsilantaro, se la Ŝtata Konsilantaro ellaboris por ili regularon kaj jurojn, aŭ se la Tutlanda Popola Kongreso ellaboris por ili leĝojn."

Demando: Ĉu la ĉina registaro indulgos siajn studentojn, kiuj manifestaciis eksterlande?

Respondo: Certe. La 12-an de julio ĉefministro Li Peng diris al multaj ĉinaj diplomaciaj delegitoj: "La Partio kaj registaro ne punos la studentojn, kiuj manifestaciis kaj parolis tro radikale tial, ke ili vivas malproksime de la patrio, estas influataj de la okcidenta ĵurnalismo kaj ne konas la tutan aferon enlandan. Ili devas mem ĉerpi la lecionon, diligente studi kaj reveni por servi al la patrio post fino de la studo."

Demando: Ĉu ĉinaj esperantistoj estis envolvitaj en la tumulton? Ĉu la registaro ankoraŭ fidos la esperantistojn, kiuj manifestaciis por subteni la malsatstrikantajn studentojn? Ĉu ili povos daŭre korespondi kun eksterlandaj samideanoj?

Respondo: Parto de la ĉinaj esperantistoj estis envolvita en la tumulton. Se ili ne agis kontraŭleĝe, la registaro ne punos ilin. Nun ili daŭre laboras sur sia posteno. Dank' al diskutado kaj studado ili ekkonis la tutan aferon, profundigis la konon kaj laboras gajhumore kiel antaŭe. La registaro montr' nenian suspekton pri ili. Korespondo estas unu el la rajtoj de la civitanoj kaj protektata de la konstitucio. Ĝi kompreneble la ĉinaj esperantistoj ne estas esceptitaj.

Demando: Ĉu la ĉina registaro daŭre subtenos la Esp-movadon? Ĉu la enhavo de "El Popola Ĉinio" estos ŝanĝita?

Respondo: La ĉina registaro subtenos la Esp-movadon kiel antaŭe. Tio estos neŝanĝebla. En la tria tagdeko de junio s-ro Yosimi Umeda, tiama vicprezidanto de UEA, oficevojaĝis al Ŝanhajo. Kiam li intervidiĝis kun vicurbestro de Ŝanhajo, li estis informita, ke la Esp-movado de Ĉinio estos ĉiam subtenata kiel antaŭe. Tion pruvis la fakto. Malgraŭ la tumulto kaj ribelo ĉinaj esperantistoj kiel antaŭe partoprenis en la 74-a UK en Britio. Asistanto de la ĝenerala sekretario de ĈEL kaj vicĉefredaktorino de EPCĉ ĉeestis la UK kaj kunsidis kun pli ol 200 niaj legantoj, kiuj donis bonajn konsilojn en multaj flankoj por plibonigi la gazeton. La redakcio studis kaj studos iliajn kritikojn kaj proponojn, por ke la gazeto aperu en 1990 kun pli bela aspekto kaj pli riĉa enhavo.

Paderborn de FR Germanio kaj ĉeestis la jarkunvenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. En tiuj lokoj mi renkontis d-ron Maxwell, kiu laboras en BSO. Li proponis, ke mi kunlaboru kun BSO por esplori maŝinan tradukadon de la ĉina lingvo. Post reveno, mi tuj konsiliĝis kun Honfan, li konsentis funkcii kiel konsilanto pri Esperanto (pontolingvo). Malfeliĉe, nelonge post fino de la vortara kompilado, li malsaniĝis de troa laciĝo, sekve de tio la komiso estis ne plenumita.

El la supre diritaj aferoj oni povas vidi influon kaj rolon de Honfan en la Esp-movado. Mi pensis, ke la Esp-movado kiel granda magneto kaj la maljunaj esperantistoj kiel elementoj de magneta kampo altiras multajn konatajn aŭ nekonatajn, junajn aŭ maljunajn samideanojn en la vicaron de Esperanto. Sendube, s-ro Honfan estis unu el la eminentaj maljunaj erudiciuloj, kiuj diligente kaj silente laboris dekojn da jaroj por Esperanto.

Mi vidis s-ron Honfan lastafoje, post kiam li elhospitaliĝis post kuirado de koronaria kormalsano. Mi kaj mia edzino vizitis lin en lia hejmo, li tre ĝojis pro pliboniĝo de sia sanstato, sed bedaŭris, ke li ne povos daŭre labori kiel antaŭe. Mi konsolis al li multe ripozi. Je la adiaŭo li ĝoje donacis al mi "Esperanto-Ĉina Vortaro" kaj faris sur ĝi sian subskribon. Ekster mia atendo, tio fariĝis la lasta memorajo.

De tiam mi okupiĝis pri iu esplora laboro. Post finiĝo de laboro, kiam mi intencis denove viziti s-ron Honfan, mi subite ricevis malĝojigan informon pri lia forpaso. Kun profunda bedaŭro, mi kun mia edzino veturis al la Revolucia Tombejo Babaoshan por adiaŭi lin. Mi silente kaj longtempe rigardis lian serenajn vizaĝon, li restis tiel modesta, serioza kaj intima. Tiam mi sentis min kvazaŭ ne en adiaŭo al li, sed, ke li irus al eterne viva mondo, kaj lia spirito kun perla brilo kaj tera modesto ĉiam vivos en nia koro. ■

Karmemore al s-ro Honfan

de EPC-raportisto



HONFAN, redakta konsilanto de "El Popola Ĉinio", honora konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de "Esperanto-Ĉina Vortaro", forpasis pro miokardia infarkto en la 31-a de julio 1989 en Pekino en la aĝo de 79 jaroj.

Jam en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Honfan ellernis kaj aktive disvastigis Esperanton. En 1950 li kunfondis EPC. En la pasintaj pli ol 30 jaroj li ĉiam diligente kaj serioze laboris kaj multe kontribuis por la ĉina E-movado kaj diskonigo de Ĉinio al aliaj landoj.

En 1983 li emeritiĝis kaj prenis sur sin redaktadon de "Esperanto-Ĉina Vortaro" kun nekredebla energio. Post lia 6-jara laborado fine aperis la vortaro kun 2 milionoj da ideogramoj.

Antaŭtagmeze de la 10-a de aŭgusto pli ol 200 homoj, inkl. la personaron de la redakcio de EPC, famajn ĉinajn esperantistojn Ĵelezo kaj Chen Yuan, prezidanton de la societo "Amikoj de Esperanto" s-ro Luo Jun kaj amikojn de Honfan, funebre adiaŭis lin en la Revolucia Tombejo Babaoshan. ■

Forpasis S-ro Miyamoto Masao

S-ro Miyamoto Masao (1913-1989), membro de Akademio de Esperanto, honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj konsilanto de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj,

forpasis la 12-an de julio 1989, pro miokardia infarkto post la operacio de stomaka kancero.

Ni esprimas kondolencon al liaj familianoj.

ESP-NOVAĴOJ

● Por akceli Esperantan turismon, plifortigi interkomprenon kaj amikecon inter ĉinaj kaj ali-landaj esperantistoj, la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina Amikeca kaj Turista Hotel-grupo decidis kune organizi vizitgrupojn de EPĈ-amikoj al Ĉinio per favora kosto ekde 1990. Legantoj de EPĈ kaj membroj de UEA, kiuj veturos al Ĉinio por turismo, ofico, vizito al parencoj kaj amikoj, ĝuos rabaton en hoteloj sub la Ĉina Amikeca kaj Turista Hotel-grupo kun karto de EPĈ-leganto kaj membrokarto de UEA. La hotel-grupo kun 17 hoteloj kaj turismaj servoj sub si certe kontentigos la bezonon de diverslandaj turistoj. Ĝiaj hoteloj kun 13 000 litoj troviĝas en diversaj multvizitataj urboj.

● La Kvara Plasta Fabriko de Yantai, Shandong, Ĉinio, decidis doni 20 000 juanojn al EPĈ por la 40-a datreveno de la naskiĝo de la revuo. Kiel fabriko de plasta membrano sub la Ĉina Ministerio de Malpeza Industrio, ĝi kun avangardaj ekipaĵoj kaj perfektaj kontroliloj produktas landfamajn varojn. Sun Naijun, estro de la fabriko, diris: "Dum longaj jaroj EPĈ faris multajn utilajn laborojn por akceli la ekonomian, scienc-teknikan kaj kulturen interŝanĝojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĝi meritas la gratulon kaj subtenon." Li deziris, ke EPĈ faru pli kaj pli multe da fruktodonaj laboroj.

● Laŭ la interkonsento de Radio Pekino kaj Radio Polonia pri interŝanĝo de redaktoroj, du raportistoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino faris unu-monatan esploron pri E-movado en Pollando. Ili vizitis Varsovion, Polonion, Bydgoszcz, Bjalistokon, Krakovon k.a. kaj akiris profundan konon pri la tiea E-movado kaj konigis al ili la ĉinan E-movadon. Ili estis varme bonvenigitaj kaj amike akceptitaj de polaj samideanoj.

● La 20-an de aprilo, 1989, fondiĝis la Luoyang-a Junulara E-asocio, Henan-provinco. Nun la asocio havas 89 membrojn. Antaŭ ĝia fondiĝo, junulara E-Asocio tro-



Raportisto de EPĈ (la dua de dekstre) konigas EPĈ al respondeculoj de la plasta fabriko



Organizantoj de la 3-a Esp-Tago de Staszow, kiu okazis de la 5-a ĝis la 7-a de majo 1989

viziis en 9 urboj de Ĉinio.

● De la 12-a ĝis la 21-a de junio 1989 okazis en Poprad (ĈSSR) la Unua Terminologia Seminario de TEC. Ĝin partoprenis 19 personoj el 9 landoj (Aŭstralio, Aŭstrio, ĈSSR, GDR, FRG, Hungario, Jugoslavio, Kanado kaj Nederlando). Diskutoj kaj interkonsentoj pri bazaj konceptoj de la terminologia laboro inter la organizantoj de tiu laboro estis la ĉefa celo de la aranĝo.

● La ĉi-jara Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST) okazis de la 7-a ĝis la 9-a de julio en Straznice (ĈSSR). Honore al la 150-jariĝo de fervojo en Ĉeĥoslovakio la ĉeftemo estis "Trafiko". 14 el la prelegoj traktis la temon, tamen ankaŭ granda atento estis dediĉita al terminologio kaj al la estonta eventuala kunlaboro inter IFEF kaj TEC.

● La distrikta estraro de Lejpcigo de la Agrikultura Ekspozicio de GDR invitis esperantistojn el la tuta mondo al la esperantista semajnfino enkadre de GDREA. De la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989

kunvenis 250 esperantistoj el 11 landoj kaj 8 fakaj prelegoj en Esperanto estis faritaj, interalie pri "Nutraĵo el la maro", "Envazaj miniaturaj pejzaĝoj", "Abelobredado kiel mia hobbio", "Pejzaĝoj post karbominado", "Redaktado de faka ĵurnalo" "Forstmastrumado", "Vivtenado de arbaroj" kaj "Medioprotektado".

● Nun regule aperas la gazeto "SEN LIMOJ", oficiala organo de Venezuela E-Unuiĝo, kiu raportas pri Esperanto-vivo kaj diversaj aspektoj de Venezuelo. Por ricevi ĝin dum la tuta jaro kontraŭ ok internaciaj respondkuponoj turnu vin al: Venezuela E-Unuiĝo, David G. Valecillos V., Calle 79 N-ro 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

● La eldonaĵoj "La atesto de Jozefo Smith" kaj "Esperanta mormonaro, Kajero 17" estas tuj haveblaj kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj por kovri sendokoston, ĉe la jena adreso: Por-Esperanta Mormonaro, p/a Paul R. Kern, 28 rue Haute Colline, Beaŭfays, Belgio, B-4950.

Malfacila problemo por element- kaj mez-lernejoj en Ĉinio

de FENG HUA

EN la lastaj dek jaroj la fundamenta edukado de Ĉinio stabile progresis. Nun 97 procentoj de la lernoagaj infanoj vizitas lernejojn, kaj 1 326 gubernioj, t.e. 66.8 procentoj de la gubernioj de Ĉinio, jam popularigis la elementan edukadon. Sed samtempe kun tio, la fundamenta edukado ankaŭ alfrontas multe da seriozaj problemoj.

Respondeculo de la Eduka Komisiono de Ĉinio lastatempe parolis kun ĵurnalistoj kaj montris, ke en la lastaj du jaroj pli-malpli kreskis la nombro de lernoĉesintoj en la element- kaj mez-lernejoj. Tia fenomeno estis des pli serioza en la regionoj, kie var-ekonomio prosperas. Laŭ statistiko, la totala nombro de lernoĉesintoj en la elementaj lernejoj atingis 4.28 milionojn, t.e. 3.3 procentoj de la elementlernejoj, kaj tiu de lernoĉesintoj en la malsuperaj mezlernejoj 2.87 milionojn, t.e. 6.9 procentoj de la mezlernejoj. En Fujian(Fuĝjan)-provinco, kie var-ekonomio sufiĉe disvolviĝas, la nombro de lernoĉesintoj en la mezlernejoj atingis 130 000, t.e. 14.3 procentoj de la mezlernejoj.

Eble oni ne komprenas, kial aperis tiu fenomeno en la eduka kampo en la tempo, kiam Ĉinio disvolviĝas diversflanke dank' al la reformo kaj pordomalfermo.

La respondo estas facile trovebla. Jen faktoj: laŭ gazetara raporto, el la dekmilionoj da element- kaj

mez-lernejoj, kiuj ĉesis lerni en 1986 kaj 1987, 75 procentoj fariĝis laboristoj, komercistoj kaj etvendistoj. Foje, en Minhou-gubernio de Fujian-provinco, oni trovis 322 infan-laboristojn kun aĝo de malpli ol 16 jaroj. El ili 107 estis diplomitoj el element-lernejo, 51 ne finis lernadon en tia lernejo kaj 164 analfabetoj. En iu distrikto de la gubernio Qingzhen (Ĉingĝen), Guizhou(Gujĝoŭ)-provinco, troviĝas preskaŭ cent karbominejoj kaj ĉie en ili vidiĝas infan-laboristoj kun aĝo de nur 15 jaroj. Iliaj patroj fiere diras al aliaj: "Mia filo povas perlabori 6-7 juanojn ĉiutage por mi." El tio troveblas, ke la supre menciita fakto kaŭziĝas, unue, ĝuste pro vasta dungado de infan-laboristoj fare de kolektivaj

kaj privataj entreprenoj kun celo gajni pli da profito kaj pro tio, ke iuj gepatroj devigas siajn infanojn ĉesi lerni kaj anstataŭe labori, komerci aŭ sin okupi pri dommastumo.


Due, tion kaŭzis la neracia socia distribuado kaj inversa aranĝo de laborpago por intelektuloj kaj fizik-laborantoj. Iu geedza paro estas vicprofesoroj kaj instruas en la Zhejiang(Ĝeĝjang)-a Universitato. Ili havas tri gefilojn. Pro malalta salajro ili havis nenian altklasan meblon, krom ŝrankoj plenaj de libroj. Post kiam iliaj du filoj diplomitiĝis el altlernejo, la vivkondiĉoj neniom pliboniĝis. Antaŭ kelke da jaroj ilia filino finis lernadon en mezlernejo kaj eklaboris

Geknaboj post ĉeso de lernado





Nova domo de elementa lernejo



Senkovra lernejo en vilaĝo

kiel asistantino de departementa direktoro de luksa hotelo en Hangzhou (Hangĝou). En kelke da jaroj ŝi aĉetis por sia hejmo koloran televidilon, fridujon kaj novtipan meblaron. Pro tio la maljunaj geedzoj ĉiam sentas sin fieraj. La neracia socia distribuado rekte kaŭzas la reaperon de la vidpunkto "Klerigo utilas al nenio", kiu furoris antaŭ dekelkaj jaroj. Kaj malvarmiĝis la "ardo de klerigo" kaj "ĉaso de multa scio" aperintaj antaŭ kelke da jaroj. Krome, aperis ankaŭ stranga fenomeno: Instruistoj ne volas instrui nek permesas al siaj gefiloj sin okupi pri

instruado kaj kuracistoj ne volas fari kuracon nek permesas al siaj gefiloj praktiki medicinon.

Trie, en la eduka laboro estas iuj problemoj, urĝe solvendaj. Ekz., mankas poreduka kosto, estas malmultaj lernejoj, tial multaj lernantoj ne povas viziti pli altajn lernejojn. Krome, en iuj lokoj la edukaj gviddepartementoj prenas proporcion de sukcesintoj en ekzamenoj eniraj al pli altaj lernejoj kiel la normon de bona aŭ nebona funkciigo de lernejo. Tial en instruado oni zorgas nur pri nemultaj bonaj lernantoj kaj ne turnas atenton al la aliaj lernantoj. Tiu fenomeno

montriĝas pli serioza en la vasta kamparo de Ĉinio. Post la diplomigo el element- aŭ mez-lernejo multe da geknaboj kaj gejunuloj perdas la ŝancon plue lerni pro la drasta konkuro en la ekzamenoj eniraj al pli altaj lernejoj. La lernantoj kun malespero pri la ŝanco preferas helpi siajn gepatrojn en la fizika laboro aŭ serĉi okupon aliloke. Eĉ troviĝas tia malsupera mezlernejo en Yunmeng-gubernio, Hubei-provinco, kiu apenaŭ funkcias pro la lernoĉeso de grandnombraj lernantoj.

Kvare, la enhavo de lernolibroj ne kongruas kun la reala nivelo de lernantoj kaj edukaj metodoj estas stereotipaj, kiuj multe malhelpas la ĉiuf flankan disvolviĝon de lernantoj, ke iuj el ili ne volas kaj eĉ ĉesigis lernadon. Iu lernoĉesinto de Guangxi (Gŭangŝji) skribis al ĵurnala redakcio, "Mi memvole forlasis la lernadon, en la lernejo mi lernis mezbone. Mi pensas, ke la scioj akiritaj en la lernejo dum dek jaroj estas utiligeblaj en nur tri tagoj de la ekzamenoj por eniri altlernejojn. La lernejo ne multe helpis al mi, kaj mi ne volis vane pasigi la tempon en ĝi nek malesperigi miajn instruistojn."

Krome, iuj lernejoj postulas multe da pagoj de la lernantoj, kio devigas la lernantojn kun ekonomia malfacilo ĉesigi lernadon. Iuj homoj maltrankviliĝas pri la paŝo-postpaŝe praktikota politiko, ke la ŝtato ne plu donos okupojn al diplomitoj el altlernejo kaj la lastaj devos mem serĉi ilin por si. Pro tio ŝanceliĝas ilia fido al lernado.


La supre menciitan fenomenon nepre sekvas granda nombro da novaj analfabetoj. Laŭ statistiko, ĉiujare en Ĉinio aperas du milionoj da novaj analfabetoj. Unesko publikigis septembre de 1988, ke en la mondo troviĝas 880 milionoj da analfabetoj kun aĝo de pli ol 15 jaroj. La nombro de ĉinaj analfabetoj atingis 229 milionojn, t.e., kvaronon de la totala nombro de la mondo kaj trionon de tiu de Azio. Tio serioze malhelpas la altiĝon de la kvalito de la ĉinaj nacio kaj la-

boruloj kaj malrapidigos la socialisman modernigon de Ĉinio.

Por popularigi la elementan kaj mezgradan edukon kaj bremsi la kreskadon de la nombro de anal-fabetoj, en 1986 la ĉina registaro publikigis "Leĝo de Deviga Edukado de la Ĉina Popola Respubliko". Lastatempe, ses ŝtataj departementoj pri laboro, persona afero, eduko k.a. kune publikigis "Anonco pri Malpermeso de Dungo de Infanlaboristoj". Tio ja estas unu el la paŝoj por bremsi lernoĉeson de lernantoj. Tamen nur kiam la registaro, diversaj sociaj rondoj, familioj kaj lernejoj strikte observos la leĝon kaj havigos al si la koncepton fari devigan edukon laŭleĝe, oni povos radikale bremsi la lernoĉeson de element- kaj mezlernejoj. Videble, por tio oni devas iri sufiĉe longan kaj malfacilan vojon.

Krome, oni devas plibonigi ankaŭ la edukajn formojn kaj enhavon de element- kaj mezlernejoj laŭ la bezono de realo.

Nun la koncernaj departementoj de diversaj lokoj klopodas ĉiamaniere por bremsi la lernoĉeson de



Leciono en mezlernejo

element- kaj mezlernejoj, kaj iuj akiris jam unuapaŝan sukceson. Koncernaj departementoj de Guangdong-provinco kunlabore faris kontrolon tra la tuta provinco. Ili kontrolis 50 mil entreprenojn kaj maldungis 3 200 infanlaboristojn, kaj samtempe, ili plifortigis la superregon super la entreprenoj.

La urbo Jinzhou (Ĝinĝou) de Liaoning-provinco aktive pliboni-

gas la instruadon en la malsuperaj mezlernejoj. Oni instruas praktikajn teknikojn al la mezlernejoj de la kamparo. En la urbo oni organizas scienc-teknikajn grupojn kaj okazigas elementajn profesiajn kursojn kaj teknikajn kursojn por diplomigintoj de malsuperaj mezlernejoj. Ĉio ĉi estas bonvena al lernantoj kaj iliaj gepatroj. Nun la procento de lernoĉesintoj de la malsuperaj mezlernejoj en Jinzhou reduktiĝis de 9.5% al 3.9%. ■

EPĈ anoncas novajn servojn

En la pasintaj jaroj, pro la praktikado de la politikoj de reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio kaj pli kaj pli vasta aplikado de Esperanto en multaj kampoj, nemalmultaj el niaj legantoj petis nin peri por ili aĉeton de ĉinmedicinaj medikamentoj, poŝtmarkoj, produktaĵoj de Ĉinio, aŭ aperigi iliajn anoncojn, reklamojn k.a. Responde al tio ni decidis komenci en la unua de decembro de 1989 tiujn servojn kontraŭpage kaj renovigi la anonctarifon. Jen la tarifo:

I. Por korespondanonco

2 internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj (50% da rabato ni donas al Esperantaj organizoj kaj niaj perantoj)

II. Por perado de aĉeto

20% de la kosto por la aĉetaĵoj kiel makleraĵo

III. Por Esperantaj anonco kaj reklamo

1 paĝo nigra-blanka 400 USD, 1/2 p. 250 USD, 1/4 p. 130 USD, 1/8 p. 70 USD, 1/16 p. 40 USD.

IV. Por komerca reklamo

1 paĝo kolora dorskovrila 1700 USD, 1/2 p. 900 USD,

1 p. interna kolora 1500 USD, 1/2 p. 800 USD,

1 P. interna nigra-blanka 700 USD, 1/2 400 USD.

La varbintojn de reklamoj ni rekompencos per 10% de la enspezo.

Bonvolu sendi vian pagon al:

El Popola Ĉinio, 24 Baiwanzhuang Rd.

P/A BANK OF CHINA (Head Office),
Beijing, China




Preĝejo de la Ortodoksa Orienta Eklezio konstruita en 1931



Religiaj konstruoj en Ŝanhajo

Fotoj de AN ZHAO


Moskeo konstruita en 1341-1370





Longhua-templo de budhismo konstruita en 1064


Ŝanhajo estas la plej granda urbo de Ĉinio. Jam antaŭlonge taoismo, budhismo, islamo, katolikismo, kristanismo kaj la Ortodoksa Orienta Eklezio estis enkondukitaj en la urbon kaj tie oni starigis multajn religiajn konstruaĵojn. La ĉina registaro protektas la liberecon de religia kredo. Nun en Ŝanhajo estas pli ol 20 temploj kaj preĝejoj konstruitaj en malsamaj periodoj. Ili en diversaj stiloj prezentas la kulturojn kaj arkitekturojn de Ĉinio kaj Eŭropo.



Katolika katedralo konstruita en 1935

Katedralo de kristanismo konstruita en 1869

Baiyun-templo de taoismo konstruita en 1882



● La ĉina registaro decidis en la lasta tempo plenumi la jenajn sep taskojn: unue, pluapaŝe ordigi kompaniojn; due, absolute malpermesi al la gefiloj de la altrunguloj fari komercon; trie, ĉesi liveri al la gvidantoj malgrandan kvanton da specialaj manĝaĵoj; kvare, laŭregule disponigi aŭtojn kaj severe malpermesi importi personaŭtojn; kvine, severe malpermesi fari festenon kaj donacon; sese, severe limigi la gvidantojn je vojaĝo eksterlanden; kaj sepe, serioze kontroli kaj trakti kazojn pri malver-

sacio, koruptiĝo, ŝakrado k.a., precipe gravajn kazojn.

● En 1988 la totala financa enspezo de Ĉinio estis 262.802 miliardoj da juanoj, la totala elspezo estis 270.657 miliardoj da juanoj kaj la financa deficitito estis 7.85 miliardoj da juanoj.

● Somere la provincoj Sichuan, Anhui kaj Jiangxi de Ĉinio estis atakataj de inundo kaj kot-ŝtona fluo. La japana registaro kaj Finnlanda Ruĝa Kruco donacis al ili respektive 2 milionojn da usonaj

dolaroj kaj 300 000 finnajn markojn (ĉ. 70 000 usonajn dolarojn).

● Granda arbar-fajrestinga aeroplano, transformita de la Aeroplana Kompanio de Harbin, nordorienta Ĉinio, sukcesis en provflugado. Ĝi povas ekflugi kaj surakviĝi sur grandaj kaj mezgrandaj akvorezervejoj aŭ vastaj lagoj. Dum ĝia glitado sur la akvosurfaco ĝia akvocisterno povas pleniĝi post 15 sekundoj. Ĝi ellasas akvon 30-50 metrojn super la tero kaj fluigas 8 horojn senhalte.

● De januaro ĝis junio la entreprenoj, por kiuj alilandaj komercistoj investis en Ĉinio, importis varojn valorantajn 3.71 miliardojn da usonaj dolaroj, je 65% pli multe ol en la sama periodo de 1988, i.a. la investo de importitaj ekipaĵoj kaj aliaj objektoj kreskis je 30% kaj atingis 1.62 miliardojn da usonaj dolaroj.

● Naskiĝis la unuaj 12 virinkorpaj modeloj de la tria generacio, faritaj de Ĉinio. Surbaze de la unuageneraciaj virinkorpaj modeloj kun internaĵoj kaj la duageneraciaj korpaj modeloj plie kun artefaritaj ostoj, oni aldonis al la korpaj modeloj de la tria generacio 6 pelvokavajn internaĵojn, kiaj utero, ovario, salpingoj kaj vagino, iujn histojn, kiaj muskoloj, graso kaj haŭto, kaj artefaritajn ostojn el altfosforo, altkalcio kaj aliaj du histomaterialoj. Tiaj korpaj modeloj kun organoj forme identaj kun la veraj homaj organoj jam atingis la internacian avangardan nivelon en iuj flankoj.

● Ĉina sciencisto Qian Xuesen (Ĉjan Ŝjuesen) akiris Medalon de Willard F. Rockwell Jr en la Internacia Konferenco de Teknikoj kaj Teknika Interŝanĝo okazinta en la 29-a de junio 1989 en Nov-Jorko. La premio estis starigita de la Internacia Politeknika Instituto en 1982 kiel la plej alta premio. Ĝi estas donita ĉiujare al maksimume 3 personoj, kiuj ĝuas tre altan pres-

Domoj detruitaj de uragano en Sichuan



La Ekspozicio pri Konado de Aideso aranĝita de la Simpozio





La ora medalo kaj atesto por la horloĝo "Polusa Stelo"

tigon en la internaciaj natursciencaj rondoj. Samtempe iliaj nomoj eniras en la nomaron de mondi-velaj sciencistoj kaj inĝenieroj.

- Chen Minzhang, ministro de la Sanprotekta Ministerio de Ĉinio, diris, ke preventi kaj regi la

eniron, estiĝon kaj disvastiĝon de aideso jam fariĝis unu el la gravaj taskoj de la ĉina higiena laboro. Ĝis la 27-a de julio de la kuranta jaro Ĉinio faris seroekzamenojn al 110 000 homfojoj en la endanĝerigitaj homamasoj kaj trovis 26 infektitojn de aidesa viruso.

- En la Internacia Virina Flugpilka Konkurso en la 26-a de julio en Moskvo la Ĉina Virina Flugpilka Teamo venkis la sovetian teamon per 3:2 kaj gajnis la ĉampionecon de la grava internacia konkurso per venko en ĉiuj 5 matĉoj. La kuba teamo gajnis la duan lokon, la sovetia kaj japana — la trian kaj kvaran respektive.

- En la 9-a Printempa Internacia Foiro okazinta maje en Bulgario la horloĝo kun marko Polusa Stelo de la urbo Yantai, Shandong-provinco, gajnis la unuan internacian oran medalon por modernaj horloĝoj de Ĉinio — oran medalon por maŝinaj kaj kvarc-elektronaj horloĝoj. Post tio ĝi gajnis denove oran medalon en la Internacia Foiro en Pekino kun parto-

preno de pli ol 30 landoj kaj regionoj, inkl. Usonon, Sovetunion kaj Japanion. Tio estas la ununura ora medalo aljuĝita de la horloĝaj entreprenoj en la foiro.

Jam en la 30-aj jaroj la maŝinaj horloĝoj kaj vekhorloĝoj kun marko Polusa Stelo famiĝis en kaj eksterlande. Post sia fondiĝo en 1987 la Entrepreno-Grupo de Horloĝo Polusa Stelo grandskale enkondukis kaj renovigis teknikojn kaj disvolvis serion da novaj kvarcaj horloĝoj. Nun ĝi jam havas 8 seriojn kun pli ol cent specoj kaj per tio fariĝis la plej granda produktabazo de maŝinaj kaj kvarcaj horloĝoj en Ĉinio, kaj ankaŭ estas la unua bazo de Ĉinio por eksporto de horloĝoj.

E La brita gazeto "Bankisto" lastatempe publikigis nomliston de 1 000 grandaj bankoj de la mondo. Laŭ kapitalo la Ĉina Banko okupas la 12-an lokon. Kiel ŝtata faka banko pri fremdaj valutoj kaj ekstera komerco ĝi jam kolektis por la ŝtato dekojn da miliardoj da usonaj dolaroj en la lastaj dek jaroj.

- En la lasta tempo ĉinaj arkeologoj, en la kuna esplorado kun kanadaj arkeologoj, unuafoje malkovris fosilian dinosaŭron en la nordpolusa regiono. Laŭ takso de fakuloj, la fosilio ekzistis jam 70 milionojn da jaroj.

- Lastatempe Ĉinio trovis grandan nombron da glaci-tera spato en Sichuan, Guangxi, Jilin, Guizhou kaj Shaanxi. Glaci-tera spato estas mineralo kristala, romb-forma kaj nepre uzata por la astronautika industrio. Ĉiu kg. da tia spato valoras 50 000 usonajn dolarojn, pli multekosta ol oro.

- Lastatempe teoria grupo pri "latenta produkta forto de teraj riĉfontoj de Ĉinio kaj ĝia loĝantŝarĝa kapablo" faris esploran raporton, kiu montras, ke la maksimuma ŝarĝokapablo de la ĉina tero estas 1.5-1.6 miliardoj da loĝantoj. Ŝanhajo estas unu el la superŝarĝitaj regionoj.

Bruno Vogelmann

montras solvojn por multaj nuntempaj problemoj en sia verko

LA NOVA REALISMO

La konsekvenco de la Nova Pensado

Robert Jungk, mondkonata futurologo:

"Tio estas la mondkoncepto de la estonteco."

El la enhavo:

- 1 la esenco de la Nova Pensado kun siaj reguloj
- 2 la 47 tezoj de la Nova Realismo
- 3 unueco de religio kaj ateismo
- 4 la senceco de la vivo

Havebla ĉe ĉiuj E-librovendejoj. Bindita 224 p.
Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen-Belgio



Malnova kliento

Klientoj



Privataj frizejoj en Pekino


Nun en Pekino funkcias centoj da privataj frizejoj, kiuj lokiĝas ĉe movoplenaj stratoj kaj faras la urbon des pli vigla.

La frizejoj plejparte estas bele dekoraciitaj. Ili estas ekipitaj per pordo el bruna vitro kaj montrofenestro kun buntaj kosmetikaĵoj. Antaŭ la pordo estas okulfrapa reklamo kaj la lamplumo en la frizejoj estas milda kaj agrabla.

Antaŭe pekinanoj devis iri al frizejoj funkciigataj de la ŝtato. Tie ili vicatendis longe kaj revenis kun eksmoda hararanĝo. Tio tre malkontentigis ilin. Luj do ekfunkciigis privatajn frizejojn, en kiuj laboras emeritaj frizistoj el famaj ŝtataj frizejoj kaj eminentaj frizistoj el Kantono kaj Jiangsu. Eĉ iuj barbiroj rezignis sian oficon por funkciigi tiajn frizejojn.

La frizistoj bone servas, kaj la klientoj povas elekti por si plaĉan hararanĝon. Ĉiutage la frizistoj laboras longe, kio multe oportunas al la klientoj.

Kompreneble, la frizejoj postulas altan pagon, tamen multaj pekinanoj, precipe knabinoj, volonte sin turnas al privata frizejo. Ili diras: "Indas pagi pli da mono por bela hararanĝo!" Tial la privataj frizejoj estas multe vizitataj.





En privata frizejo



Privata frizejo ĉe strato



“Ĉu vi kontentas?”

VOJAĜO EN SUDA HENAN (I)

Teksto de CHEN BAOHE

Fotoj de HUANG LUKUI

DE la 29-a de majo ĝis la 10-a de junio 1989 ni 8 raportistoj de malsamaj redakcioj en Pekino kune vizitis la sudan parton de Henan-provinco. Ĉie ni vidis la ŝanĝigon kaŭzitan de reformado en Henan.

RIĈA RIKOLTO ANTAŬVIDEBLA

En la tagmezo de la 29-a de majo ni atingis Zhengzhou (Ĝengĝoŭ), la ĉefurbon de Henan. Iom ripozinte tie, ni aŭte veturis suden al Xuchang (Ŝjuĉang).

Zhengzhou distancas de Xuchang je 120 km. Landvojo interligis ilin. Ĝi estas bonkvalita, kun larĝo de pli ol 20 m., tial aŭtoj stabile veturas sur ĝi. Tiam maturiĝis tritiko. Ambaŭflanke de la vojo estas

vilaĝoj ĉirkaŭitaj de verdaj arboj kaj plejparte oraj tritikkampoj etendiĝantaj malproksimen. Loka akompanantino diris al ni, ke ĉi-jare bone kreskas tritiko en Henan. Se ne okazos natura katastrofo, riĉa rikolto estos senduba.

Henan estas unu el la gravaj grenproduktaj regionoj de Ĉinio. Same kiel en aliaj agrikulturaj regionoj de la lando, la agrikultura produktado en Henan multe disvolviĝis en la 10 jaroj de la reformado, tamen ĝi ankoraŭ dependas de la naturo, kaj vetero ankoraŭ grave influas la grenan produktokvanton.

Ni informiĝis, ke en la unua duono de la kuranta jaro okazis en Henan katastrofoj de ventego, fiinsektoj kaj hajlo, kiuj plagis ĉ. 10% de la kampoj de Henan. Tamen la procento ankoraŭ ne povis influi la

grenproduktadon de la tuta provinco. Kaj plie, laŭ veter-prognozo, plejparto de la agrikulturaj regionoj de Henan en la venonta tempo ne suferos de malbona vetero. Tial ĉiuj lokanoj, kiujn ni renkontis, estis plenaj de fido al riĉa rikolto en la somero.

ANTIKVA URBO XUCHANG


Post du horoj da veturo suden per aŭto ni venis al Xuchang.


Xuchang estas fame konata antikva urbo. En la lastaj jaroj de la Orienta Han-dinastio, ĉ. la jaro 200 p.K., ĝi jam estis grava urbo kaj ĉefstabejo de la fama ĉina politikisto kaj strategiisto Cao Cao por starigi feŭdan separatisman reĝimon. En Ĉinio estas la historia romano "Tri Regnoj", kiu rakontas epizodojn en tiu periodo. La romano estas konata de ĉiuj ĉinaj familioj, tial Xuchang ne estas fremda.

Ni proksimiĝis al la urbo. Ambaŭflanke de la ŝoseo estas rikoltota tritiko kaj prosperaj paŭlovnioj, sed neniu signo montris, ke Xuchang estas urbo kun historio de ĉ. 2 000 jaroj. Tio iom malesperigis nin. Kaj lokanoj klarigis, ke en la antikveco Xuchang estis ĉiam probatalata de militistoj, ĉar ĝi estis strategie grava loko. Plejparto de ĝiaj antikvaj konstruaĵoj estis ruinigita. Kvankam oni povas trovi malmultajn iliajn ruinojn, tamen ili tute perdis sian antaŭan belecon.

Sed sub la tero de Xuchang kuŝas nekalkuleblaj historiaj objektoj. En la Muzeo de Xuchang finkonstruita en januaro 1988 ni vidis grandan nombron da elterigitaj historiaj objektoj el ŝtono, fajenco, porcelano, bronzo kaj aliaj metaloj. La direk-

Parto de Pingdingshan-karbominejo





En parko de Pingdingshan

torino de la muzeo diris al ni, ke en Xuchang oni jam prifosis dekojn da gravaj Han-dinastiaj tomboj kaj elterigis multajn valorajn objektojn, kaj ke ĉie tie ĉu en la vilaĝoj ĉu en la urbetoj, oni povas vidi brikojn kaj tegolojn de Han-dinastio.

La vorto “prospero” eble ne taŭgas por priskribi Xuchang. Tamen la urbo jam eniris en novan stadion de disvolviĝo.

La Xuchang-a Relajso-fabriko okupas gravan lokon en la ĉinaj entreprenoj de aparatoj. Tio estas unu el la signoj, ke Xuchang ĝuste troviĝas en nova historia stadio. La fabriko kun 3 000 laboristoj produktas ĉefe kompletojn da protektaj, regaj kaj aŭtomataj elektraj ekipaĵoj. Ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en 12 landoj kaj regionoj. En la pasinta jaro la fabriko enkondukis novajn teknikojn de Siemens-kompanio de FR Germanio kaj BBC-kompanio de Svisio kaj ĝemeliĝis kun iu relajsa fabriko de Usono. Ĝia estro Wang Guobin diris al ni: “Ni esperas akceli reformadon de la produktado kaj administrado de nia fabriko per interŝanĝo kun entreprenoj de aliaj landoj.” Li aldonis: “Nia slogano estas doni unuagradajn produktaĵojn.”

En la lastaj jaroj la ekstera komerco de Xuchang disvolviĝis rapide. Nun en la urbo troviĝas 7 kompanioj de importado kaj eksporto kaj unu grupo de aŭtistoj por ekstera komerco. La eksportaĵoj havas 11 kategoriojn kaj 109 specojn, inkl. tekstilaĵojn, vestojn, brutajn produktaĵojn, mangaĵojn, tabakon,

porcelanaĵojn kaj elektrajn aparatojn, el kiuj porcelanaĵoj de Yuxian-gubernio estas plej ŝatataj pro siaj eminenta arto, belaj koloroj kaj alta kvalito. Lastjare Xuchang kune kun aliaj landoj starigis 6 entreprenojn por fari medikamentojn kaj vestojn kaj prilabori grenon kaj mielon. En 1988 la eksportaĵoj de Xuchang valoris 21.1 milionojn da usonaj dolaroj.

KARBO-URBO PINGDINGSHAN

Posttagmeze de la 31-a ni veturis al la karbo-urbo Pingdingshan sudokcidente de Xuchang.

Proksime al Pingdingshan la tero iom ondiĝas. En la kamparo kreskis ore flava tritiko kaj vicoj da verdaj arboj. Ambaŭflanke de la ŝoseo kamparanoj estis rikoltantaj tritikon. En vasta tritikkampo ni vidis kombajnnon, ununuran grandan agrikulturan maŝinon prezentitan al niaj okuloj dum nia vojaĝo.

Post kiam oni ekpraktikis la politikon de familia laŭkontrakta terkulturo en la ĉina kamparo antaŭ 10 jaroj, la produktokvanto de greno kreskis rapide. Tamen limake progresis la agrikultura mekanikigo en Ĉinio kaj la agrikultura produktado devas esti plenumita ĉefe de homoj. Kaj tia laŭkontrakta terkulturo en ia senco malhelpas uzon de grandaj agrikulturaj maŝinoj. Antaŭ nelonge la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio refoje akcentis pliprofundigon de reformado de agrikulturo. Se sur la nuna bazo oni pluapasaŭzos efikan


novan rimedon por la ĉina agrikulturo, la ĉina gren-produktado certe impetos.

La aŭto portis nin en la urbon. Komence ni ĉiuj miris, ke la karbo-urbo estas tiel pura, precipe ĝiaj stratoj. Ambaŭflanke de ili staras paŭlovnioj kaj post la paŭlovnioj — belaj loĝdomoj. Ĉio ĉi estis laŭdita de ni ĉiuj.

La urbo ricevis sian nomon pro monto kun ebena pinto situanta nordokcidente de ĝi. En 1955 oni establis tie la Pingdingshan-an Minan Buroon kaj komencis konstrui la plej grandan karbominejon en Henan-provinco. Post dekoj da jaroj la buroo posedas 14 minojn kaj pli ol 100 000 ministojn.

La 55-jara estro de la buroo estis studento diplomita en la 50-aj jaroj. Li diris al ni, ke la minejo longas pli ol 70 km. en la orienta-okcidenta direkto kaj etendiĝas tra tri gubernioj. Ĝia karbo estas de ĉiuj specoj kaj bona kvalito, kun rezervokvanto de 8 miliardoj da tunoj. La minejo liveras karbon ĉefe al grandaj elektrejoj en orienta kaj centra Ĉinio, al la Wuhan-a Ŝtala Kompanio, 8 grandaj konstrumaterialaj fabrikoj en sudorienta Ĉinio kaj al lokomotivoj. En 1985 la minejo komencis fari reformadon de ekonomia sistemo kun laŭkontrakta laboro kiel la ĉefa, kio pluapasaŭz akcelis la produktadon. En 1988 la buroo produktis 17.88 milionojn da tunoj da karbo, malpli multe nur ol la plej granda ĉina mina buroo Kailuan.

En la lastaj jaroj la magistrato donis grandan atenton al konstruado de la urbo kaj forigo de polucio. Ĝi konstruis loĝdomojn kun plankareo de milionoj da kvadrataj metroj, larĝigis stratojn, koncentre hejtis la domojn kaj ebligis al 80% de la loĝantoj uzi gason por kuirado. Tio ne nur oportunigis la vivon de la laboristoj, sed ankaŭ reduktis la polucion kaŭzitan de tio, ke en institucioj, entreprenoj kaj loĝdomoj oni hejtis ĉambrojn kaj kuiras mangaĵojn per karbo. Laŭ plano, en la komenco de la venonta jaro ĉiuj familioj de Pingdingshan uzos gason kiel brulaĵon. ■




Antaŭ bakado de porcelanaĵoj



En la Xuchang-a Relajso-fabriko

En teksejo de Pingdingshan



Sidejo de la Shaanshan-a Asocio de Samprofesiuoj



Romanoj de Ming-dinastio (II)

de MEI ZHI

POST publikigo de la romanoj “Tri Regnoj” kaj “Ĉe la Akvo-rando”, la romana verkado de Ming-dinastio stagnis pli ol cent jarojn. En la meza periodo de Ming-dinastio aperis “Pilgrimado al la Okcidento”, verkita de Wu Cheng'en, kio rompis la silenton de romana verkado.

“Pilgrimado al la Okcidento” estas la plej eminenta verko el la ĉinaj mitaj romanoj. Ĝi priskribas pilgrimadon de Bonzo Tang, liaj disĉiploj Sun Wukong, Zhu Bajie (Ĝu Baĝje) kaj Sha Wujing (Ŝa Uĝing) al la Okcidento por peti budhismajn sutrojn. Survoje ili venkis diversajn demonojn, spertis multajn malfacilojn kaj fine akiris verajn sutrojn. En la romano la aŭtoro prezentis buntan mitan mondon en grandioza strukturo, per riĉaj imagoj kaj mirigaj intrigoj. La romano markis, ke la romantikisma literaturo en Ĉinio atingis novan etapon.

La pilgrimado de Bonzo Tang al la Okcidento por peti sutrojn estis historia fakto. En la regperiodo de la imperiestro Taizong (627-650 sur la trono) de Tang-dinastio, juna bonzo Xuanzang (t.e. Bonzo Tang) sole iris al Tianzhu (la nuna Hindio) por peti sutrojn. Li revenis en la patrolandon post 17 jaroj. Por la pilgrimado li iris dekmilojn da kilometroj. Tiu heroaĵo estigis multajn ekstravagancajn legendojn inter la popolo, kiuj ju pli cirkulis, des pli malproksimiĝis de la historiaj faktoj. Kiam Wu Cheng'en prenis plumon por verki la romanon, tiuj legendoj cirkulis jam pli ol 700 jarojn, tial ne estis hazarda la naskiĝo de la romano en tiel granda skalo.

Dank' al zorgema teksado kaj subtila polurado de Wu Cheng'en, la herooj en la romano fariĝis vivecaj kaj elvokivaj. La aŭtoro brile bildigis la batalojn de Sun Wukong kontraŭ dioj kaj demonoj. La ĉefa heroo de la romano Sun Wukong brile prezentita estas literatura figuro, fame konata kaj ŝatata de la ĉinoj. Li estis simi-reĝo naskita el krevinta ŝtono kaj vivis senĝene kun grupo da simioj en la Akvokurtena Kaverno sur la Monto de Floroj kaj Fruktoj. Poste li disĉipliĝis al dio kaj lernis de tiu 72 metamorfozojn kaj flugan transkapiĝon de 54 000 km. Li malordigis la drakan palacon kaj deprenis magian maro-kvietigan kolonegon kiel sian armilon. Li faris malordojn en la subtera mondo, forstrekis sian no-

mon el la morto-decida libro por vivi eterne. Li ribelis kontraŭ la ĉiela palaco, kio montris, ke li estas ribelema kaj aŭdaca. Eĉ antaŭ la Ĉiela Imperiestro li sin nomis maljuna Sun, tute neglektante la superan aŭtoritatecon de la Ĉiela Imperiestro. Li ŝtelmanĝis ĉielajn persikojn de festeno far la Edzino de la Ĉiela Imperiestro. Poste, kiam li informiĝis, ke en la nomlisto de la invititoj al la festeno ne estas lia nomo, li faris ribelon kontraŭ la ĉiela palaco, kion ne povis subpremi eĉ la ĉielaj soldatoj kaj generaloj. Poste, li, superruzite, estis kaptita kaj jetita en la alkemian fornon de Laojun (Laŭĝjun), supera dio de taoismo. En la forno li estis bruligata 49 tagojn, tio tamen havigis orajn pupilojn al lia okulparo, kiu povas distingi homojn de demonoj. Li elsaltis el la forno kaj anoncis: “Se la Ĉiela Imperiestro ne cedos sian palacon, mi certe ribelos tiel, ke li neniam estos trankvila!”

La Ĉiela Imperiestro fine invitis Gotamon al si



kaj tiu premis Sun Wukong sub monton. Li estis liberigita post 500 jaroj, kiam Bonzo Tang pilgrimis al la Okcidento. Li konvertiĝis al budhismo, fariĝis bonzo kaj disĉiplo de Bonzo Tang kaj protektis tiun en pilgrimado al la Okcidento. Li brave kaj sagace venkis ĉiujn monstrojn, trapasis 81 danĝerojn kaj fine atingis la Okcidenton kune kun sia majstro kaj akiris la sutrojn. Sun Wukong plurfoje transformiĝis en insekton kaj flugis en demonan neston por gvati. Kelkfoje li eĉ eniris en la ventron de demono kaj suferigis tiun ĝis ties kapitulaco. Li trifoje batis la skeletospiriton. En la kriza momento de la morto de Bonzo Tang, Sun Wukong transformiĝis en la patronon de la skeletospirito kaj iris al ŝia festeno kaj elsavis la majstron. Ĉe la Fajra Monto, utiligante la ĵaluzon de la Fer-ventumila Monstrino, kiu estis forlasita de sia edzo, sed ne forgesis la antaŭan amon, li transformiĝis en la figuron de ŝia edzo, defraŭdis la flamoestingan Fer-ventumilon. Li estingis la incendion kaj transpasis la monton, kiu iam baris ilian vojon al la Okcidento.

Zhu Bajie estas grava akcesora rolo en la romano. Origine li estis ĉiela dio marŝalo Tianpeng, kiu malpromociite venis al la homa mondo pro amindumo al feino post ebriiĝo, sed li renaskiĝis en homon kun porka kapo. Li estas kruda, impertinenta, manĝema kaj maldiligenta, kiel porko. Li, tre forta, faris ĉiujn pezajn kaj malpurajn laborojn survoje al la Okcidento. Li, voluptama kaj saĝumema, ofte estigis komikaĵojn. Ekz., tiklita de la belo de knabinoj, li avidis edziĝi, sed estis mistifikita de Sun Wukong kaj alligita al arbo. Li ŝtelis senmortigajn fruktojn, sed englutis ilin sen percepti la guston. Survoje al la Okcidento li sekrete akumulis monon, ŝanĝis ĝin en arĝentan ingoton, kiun li kaŝis en sian oreilon, sed tion malkaŝis Sun Wukong. Tiuj teatraj intrigoj havigis grandan ĝojon al la danĝera kaj malfacila vojaĝo.

La romano estas plena de ekstravagancaj fantazioj. Tie troviĝas la Flusabla Rivero, kie ne povas flosi eĉ anseraj plumoj, kaj la Fajra Monto, kie fandiĝas homo eĉ kun kupra kapo kaj fera korpo. Tie kreskas diaj arboj, kies fruktoj dearbiĝas je ektuŝo de metalaĵo, velkas de ligno, dissolviĝas de akvo kaj cindriĝas de fajro. Kiam ili falas sur grundon, ili tuj malaperos en la teron. Tie vidiĝas Fer-ventumilo, kiu povas blovi homon for je 42 000 km kaj esti malgrandigita en la grandecon de abrikota folio kaj metita en la buŝon. En la romano troviĝas diversaj demonoj kaj monstroj. Ili, plejparte magie fortaj, tiranas en sia loko kaj kruele traktas ĉiujn vivaĵojn. Ekz., la Leono-Demono povas unufoje engluti 100 000 ĉielajn soldatojn, la Ruĝa Knabo ŝprucigas diablan fajron neestingeblan per akvo...

Dank' al la mita romano "Pilgrimado al la Okcidento" kaj disvolviĝo de presarto, ĉinaj romanoj eniris en la disfloran periodon. En la daŭro de cent jaroj aperis grandnombraj romanoj, el kiuj 60 legiĝas eĉ hodiaŭ. Plejparto de ili estas historia. Influate

de "Pilgrimado al la Okcidento", furoris romanoj pri monstroj en la meza periodo de Ming-dinastio. Tiuj romanoj ne estas altnivelaj, tamen havas sian lokon en la historio de la klasikaj romanoj de Ĉinio. Ili prezentis al la romana verkado multajn temojn, akumulis spertojn kaj pretigis necesajn kondiĉojn por daŭra prospero de la romana verkado.

Inter la romanoj en la meza periodo de Ming-dinastio, "Jin Ping Mei" (Ĝin Ping Mej) estis grandinflua verko. Ĝi estis verkita de literaturisto memstare, sed ne surbaze de popolaj legendoj. Diferenca de la aliaj historiaj kaj mitaj romanoj, ĝi temas pri familia vivo. Ĝi prezentas ne legendajn heroojn, nek diojn, demonojn kaj fantomojn, sed ordinarajn gevirojn en la meza socitavolo kaj ilian ĉiutagan vivon. Kvankam en la romano legiĝas nuda priskribo pri seksa vivo, kio iagrade obscenigis la verkon, tamen ĝi ĉefe prezentas la homajn interrilatojn en la tiama socio. Ĝi estis tute aparta en la ĉinaj klasikaj romanoj. La similan romanon oni ne sciis antaŭe. Nun oni scias nenion pri ĝia aŭtoro kaj ties historio, tamen laŭ la flujaj kaj abundaj dialektoj de Shandong-provinco en la romano kaj la kaŝnomo de aŭtoro, Xiao Xiaosheng (Ŝjaŭ Ŝjaŭŝeng) de Lanling, la aŭtoro probable estis Shandong-provincano, ĉar Lanling estas en Shandong.

La ĉefa heroo de la romano Ximen Qing (Ŝjimen Ĉing) estis filo de malprosperinta bienulo. Li iom post iom potenciĝis kaj fariĝis ŝtatoficisto. Li do tiranis en sia hejmloko. Li havis edzinon kaj du kromedzinojn, sed daŭre diboĉis ekstere. Foje, en tetrinkejo li renkontis Pan Jinlian (Pan Ĝinljan), edzinon de flan-vendisto Wu Da, kaj tuj enamiĝis en ŝin. Li do murdis Wu Da, komplotante kun Pan, kaj prenis ŝin kiel sian kromedzinon. Iom poste, li kromedzinigis al si alian virinon Li Ping'er. Li seksumis ankaŭ kun sia servistino Chunmei. Li fine mortis de ekscesa diboĉado, kaj sekve de tio falis lia familio. Pan Jinlian estis forpelita kaj mortigita de Wu Song, frato de Wu Da. Post la morto de Ximen Qing, lia edzino Wu Yueniang (U Jüenjang), naskis filon, kiu bonziĝis poste.

La romano estas plena de vivetoso. Pere de la socia aktivado de Ximen Qing, ĝi montris la nigran kaj putran realon en la socia vivo, kiaj la despotado kaj tiranado de eŭnukoj kaj altrangulo kaj ĉantaĝo de kanajloj. En priskribo de la ruza rabado de Ximen Qing k.a. kaj ilia diboĉa vivo, la aŭtoro malkaŝis ilian degeneradon. La aŭtoro brile bildigis artajn figurojn de la ĉefaj personoj de la romano. Ximen Qing komplotis kun la feŭda registaro kaj senbride diboĉis. Li estis feroĉa kanajlo, kiu "murdis homon kaj ĝuis ties funebran procesion". Pan Jinlian estis virino malĉasta kaj temerara. Por sin kroĉi al Ximen Qing, ŝi murdis sian edzon. Ŝi en ĉio obeis Ximen Qing kaj koketis al li. Inter la edzinoj de Ximen Qing Pan estis ruza kaj tirana. En la familio de Ximen oni malamis ŝin, sed ne kapablis superi ŝin. En la detala priskribo, la aŭtoro vive bildigis virinon

en anormala psiko. Krome, la aŭtoro bildigis multajn popolanojn kaj friponojn, vivantajn en la socia fundo, kiaj sklavo, sklavinaj, putinoj, geaktoroj, bonzoj, monaĥinoj, taoistoj, svatistinoj, fiagaj helpantoj kaj friponoj. En la granda skalo li detale priskribis ilian spiritan kaj materian vivon. Tio estas

elstara kontribuo de la aŭtoro.

La romano havas ankaŭ iujn mankojn. Ekz. en seksa priskribo legiĝas tute malkaŝa detalo kaj eĉ troiga, pro kio oni hontas finlegi ĝin. Ĝuste tio kaŭzis, ke tiu granda literatura verko ne povis esti legata de la vastaj popolamasoj dum multaj jaroj. ■

EL LA ROMANO "PILGRIMADO AL LA OKCIDENTO"

Malordigo de la Persika Festeno Ekribelo kontraŭ la ĉiela kortego

(Mallongigo de la 5-a ĉapitro)

LA Granda Sanktulo Sun Wukong esence estis simio kaj tute ne havis komprenon pri rango. Li neniam pensis pri la enspezo kaj nur senfare sidis sur la posteno. Servate de du feoj en la Sanktula Domo, li neniam faris krom manĝi kaj dormi. Li, pri nenio zorganta kaj tute libera, ofte ekskursis kaj vizitis amikojn. Li senceremonie nomis ĉiujn diojn sur la ĉielo fratoj kaj ofte faris kapricajn vojaĝojn, jen orienten, jen okcidenten, veturante per nuboj.

Iun matenon, kiam la Ĉiela Imperiestro kunvokis siajn korteganojn, iu el ili elpaŝis por fari raporton. Li adorkliniĝis kaj raportis: "Nun la Granda Sanktulo pri nenio okupiĝas, ĉien vagas kaj nomas ĉiujn amikojn. Mi timas, ke li denove faros teruraĵon pro enuiĝo. Ĉu ne estus konsiderinde taski lin per ia laboro, por ke li ne faru ĝenaĵojn." La Ĉiela Imperiestro konsentis kun li kaj tuj sendis venigi Sun. La simio-reĝo venis en ĝojo kaj demandis: "Via moŝto, ĉu vi volas promocii min?" La Ĉiela Imperiestro diris: "Vi estas senlabora, kaj mi volas taski vin per ia laboro. Vi prizorgu la Persikan Ĝardenon." La Granda Sanktulo ĝojiĝis, diris dankon kaj foriris.

Li tuj venis al la ĝardeno por pririgardi. La gnomo de la ĝardeno baris al li la vojon. La sanktulo diris: "La Ĉiela Imperiestro komisiis al mi la administradon de la Persika Ĝardeno kaj nun mi venas por pririgardi." La gnomo tuj riverencis al li kaj kunvokis ĉiujn laborulojn de la ĝardeno. Tiuj adorkliniĝis al Sun kaj kondukis lin en la ĝardenon. En la ĝardeno la frondoj de la persikarboj estis plene kovritaj de floroj kaj peze klinitaj de abundaj fruktoj. La sanktulo pririgardis kaj demandis: "Kiom da arboj en la ĝardeno?" La gnomo respondis: "Sume 3 600. La 1 200 arboj de la unuaj vicaj donas malgrandajn florojn kaj fruktojn, kaj la fruktoj maturiĝas en tri mil jaroj. Kiu manĝos tian persikon, tiu fariĝos feo. La 1 200 arboj de la mezaj vicaj donas pli multajn florojn kaj la fruktoj maturiĝas en ses mil jaroj. Kiu manĝos tian frukton, tiu povos flugi kaj fariĝos eterne juna kaj senmorta. La 1 200 arboj de la

postaj vicaj donas fruktojn kun purpuraj vejnoj kaj helflava kerno en naŭ mil jaroj. Kiu manĝos tian frukton, tiu vivos eterne kiel la ĉielo kaj la tero." Tion aŭdinte, la Granda Sanktulo ekstaziĝis de ĝojo kaj tuj nombris la arbojn, pririgardis la konstruaĵojn en la ĝardeno kaj reiris en sian domon. De tiam li iris al la ĝardeno unu fojon en ĉiu 3-5-a tago kaj ne plu vagis ien ajn, nek vizitis amikojn.

Iun tagon li trovis, ke duono de la fruktoj jam maturiĝis, kaj li tre volis frandi freŝan frukton. Sed lin ĉiam sekvadis la gnomo, laboruloj kaj oficistoj, kio tre ĝenis lin. Li do turnis sin al la sekvantaro: "Vi iru atendi ekster la pordo, mi volas iom ripozi en la kiosko." Eliris la sekvantaro. Li demetis la kostumon, grimpis sur arbon, deprenis plurajn grandajn persikojn kaj ekmanĝis sidante sur branĉo. Post la ĝuo li salte dearbiĝis, sin revestis, envokis la sekvantaron kaj revenis en sian loĝejon. Poste, en ĉiu dua aŭ tria tago li ripetis la frandon.

Iun tagon la edzino de la Ĉiela Imperiestro intencis fari "Persikan Festenon" en sia loĝejo Yaochi kaj sendis sep feinojn al la ĝardeno por pluki persikojn. La sep feinoj atingis la ĝardenon kaj vidis, ke la gnomo kaj kelke da laboruloj estis gardantaj la ĝardenon. La feinoj diris al ili: "Ni venas laŭ la ordono de la imperiestredzina moŝto por kolekti persikojn bezonatajn de festeno." La gnomo diris: "Pardonon. Nun la ĝardeno estas administrata de la Granda Sanktulo, kaj por via eniro ni devas peti lian permeson." "Kie la sanktulo?" "Li ripozas en la kiosko." "Ni iru trovi lin por ne malfruigi la aferon." Ili do eniris sekvante la gnomon. Sed ili ne trovis la sanktulon en la kiosko kaj vidis nur liajn vestojn. Ili serĉis kaj serĉadis, sed nenie trovis. Fakte la sanktulo frandis persikojn, sin malgrandigis en figuron 2-colan kaj endormiĝis sur ombrata branĉo. La sep feinoj maltrankviliĝis: "Ni estas grave komisiitaj, sed forestas la sanktulo. Kial ni kuraĝas reiri kun malplenaj manoj?" Unu el la oficistoj de la persika ĝardeno konsilis: "Vi ja venis laŭ ordono. Nia sanktulo estas vage-

ma, kaj nun eble estas ĉe amikoj. Vi pluku la fruktojn kaj poste mi raportu al la sanktulo.” Laŭ lia konsilo la feinoj komencis pluki persikojn. De la arboj de la unuaj vicoj ili kolektis du korbojn da fruktoj; de tiuj de la mezaj vicoj — tri korbojn, sed sur la arboj de la postaj vicoj troviĝis neniu matura frukto. Ili ne sciis, ke la maturaj persikoj estis formanĝitaj de la simio-reĝo. La feinoj pririgardis ĉirkaŭen kaj vidis nur unu ruĝetan persikon. La feino en blua vesto klinis la branĉon kaj la feino en ruĝa vesto deŝiris ĝin kaj forlasis la branĉon. Ho, la sanktulo malgrandiĝinta dormas ĝuste sur tiu branĉo. Li estis vekita. Li reprenis sian originalan formon, eliris el la orelo la orgarnitan magian bastonon kiu, swingite, fariĝis dika je bovlo, kaj laŭte kriis: “De kie venas vi monstroj? Kial vi aŭdacas ŝteli la diajn persikojn?” La sep feinoj, terurite, genuiĝis: “Ne kole-ru, via sanktula moŝto! Ni ne estas monstroj, ni estas feinoj senditaj de la imperiestredzino por kolekti persikojn. La gnomo serĉis vian sanktulan moŝton, sed ne trovis. Ni timis malfruigi la festenon kaj ne atendis vin. Ni petegas vian indulgon.” Tion aŭdinte, la sanktulo ekĝojis: “Bonvolu leviĝi! Kiuj al la festeno estas invititaj?” La feinoj respondis: “Laŭ la kutima nomlisto. Preskaŭ ĉiuj dioj estas invititaj.”

“Ĉu mi estas invitita?”

“Ni ne scias.”

“Mi estas la Granda Sanktulo kaj devas havi honoran lokon en la festeno.”

“Ni konas nur la kutiman regulon, sed kiel oni aranĝas ĉi-fojan festenon, tion ni ne scias.”

“Vi diris prave, ne vi kulpas. Vi atendu ĉi tie, mi iru por informiĝi, ĉu mi estas invitita aŭ ne.”

La sanktulo recitis sezamon kaj diris al la feinoj: “Senmoviĝu, senmoviĝu!” Per tio li jam fiksas la feinojn sur la loko. Kun duonfermitaj okuloj, la feinoj fiksiĝis sub la persikarboj, dume la sanktulo saltis sur nubon kaj iris al Yaochi. Survoje li renkontis la Nudpiedan Feon. La sanktulo cerbumis por trompi la feon kun la intenco, ke li povu mem iri sola al la festeno. Li demandis la Nudpiedan Feon:

“Kien vi iras?”

“Al la persika festeno.”

“Evidente vi ne scias la aferon. Konsiderante, ke mi povas iri rapide, la Ĉiela Imperiestro sendis min kolekti ĉiujn invititojn ĉe Tongming-halo, ke ili poste kune iru al la festeno.” La Nudpieda Feo estis kredema honestulo, tute ne dubis pri la mensogo de la sanktulo kaj turnis sin al Tongming-halo.

Sur la nubofloko la sanktulo murmuris sorĉkanton kaj tuj aliformis sin en la Nudpiedan Feon. Post momento li jam atingis la festenejon. Li haltigis la nuboflok-son, senbrue eniris en la salonon kaj tuj estis frapita de impona vidaĵo: Ŝvebas bonodora fumo, sur ore farbitaj tabloj floras juvelaj floroj en jadaĵaj vazoj, aromas la pladoj plenaj de diversaj frandaĵoj kaj raraj fruktoj.

Sed neniu gasto troviĝis en la salono. Subite la sanktulo ekflaris bonodoron de vino. Li returnis sin kaj vidis, ke en la portiko multe da homoj estis okupintaj

pri purigado de vazoj. Ili jam pretigis verajn nektarojn. La sanktulo ne povis sin deteni de bavo kaj volis tuj ĝui la nektarojn, sed li sentis skrupulon pro la ĉeesto de multe da vinistoj. Li do ŝiris de si kelke da haroj, maĉis ilin en la buŝo kaj sputis ilin kun murmuro de sezamo. “Ŝangiĝu!” La haretoj transformiĝis en dormigajn insektojn kaj falis sur la vangojn de la vinistoj. Baldaŭ la vinistoj senfortiĝis, klinis sian kapon, fermis la okulojn, neniel povis sin deteni de dormemo, fine apudmetis la laboron kaj ekdormis. La sanktulo kolektis multe da pladoj, venis en la portikon kaj laŭvole drinkis el la vazoj. Fine li ebriiĝis. Li murmuris al si mem: “Malbone, baldaŭ venos gastoj, kaj ili certe kulpigos min. Kion fari, se mi estos kaptita? Ĝuste bone, ke mi iru dormi hejme.”

Sed pro ebriiĝo li perdis la vojon. Li ŝanceliĝe kaj stumble misvenis al la Palaco Doushuai. Li konsciiĝis pri sia eraro: “Oj, la Palaco Doushuai en la empireo estas loĝejo de Laojun. Sed kiel mi venis ĉi tien? Nu, dum longa tempo mi volis viziti lin, sed ne sukcesis. Hodiaŭ mi hazarde venis ĉi tien, do mi utiligu la okazon.” Li ordigis siajn vestojn kaj enpaŝis. Sed neniu troviĝis ene. Li ne sciis, ke Laojun estas predikanta. En serĉado la sanktulo trovis alkemiistan fornon flaman-tan, kaj ambaŭflanke de la forno estis kvin kalabaso- plenaj de eliksiraj granoloj. La sanktulo ĝojiĝis de la trovo: “Tiuj estas plej karaj trezoroj de feoj. Delonge mi intencis fari tiajn eliksiraĵojn por helpi aliajn, sed ne trovis tempon. Hodiaŭ bonŝanco trafis min, ke Laojun forestas. Mi frandu kelke da granoloj.” Li elŝutis la tutan kvanton da granoloj el la kalabaso kaj formanĝis ilin kiel rostitajn fabojn.

Post nelonge la sanktulo malebriiĝis kaj kaptiĝis de maltrankvilo: “Ho, kian malordon mi faris! Mi malfacile savos min el mortpuno, se la Ĉiela Imperiestro informiĝos pri tio. Kial mi ne fuĝu kaj reĝu surtere?” Tion pensante, li prenis alian vojon kaj foriris.

Reveninte al sia Monto de Floroj kaj Fruktoj, li vidis, ke flirtas flagoj kaj brilas armiloj — tie liaj kvar marŝaloj kaj 72 monstroj estas sin ekzercantaj. La sanktulo laŭte kriis: “Miaj infanoj, mi revenis!” Ĉiuj demetis la armilon kaj genuiĝis kun plendo: “Kiel senzorga vi estis. Ja tiom longe vi forestis de ni.” La sanktulo sin senkulpigis: “Ĉu? Sed fakte ne tiom longe.” En la parolado ili iris en la kavernon. La kvar marŝaloj reordigis la salonon kaj refoje genuiĝis antaŭ li. Ili deman-dis: “Kian oficon vi plenumis sur la ĉielo dum la pasintaj cent jaroj?” La sanktulo ekridis: “Mi memoras, ke mi forestis nur duonjaron. Kial vi asertas, ke mi forestis jam cent jarojn?” La marŝaloj klarigis: “Unu tago sur la ĉielo longas kiel unu jaro por la homa mondo.” La sanktulo diris al la subuloj: “Ĉifoje la Ĉiela Imperiestro estis tre favora al mi kaj nomumis min la Ĉiela Sanktulo kaj komisiis al mi la administradon de la Persika Ĝardeno. Ĝus la imperiestredzino intencis doni festenon, sed ne invitis min. Mi mem do iris al la festenejo kaj sufiĉe manĝis ĉiajn bongustaĵojn kaj trinkis ĉiajn nektarojn. Forlasinte la salonon, mi perdis la vojon kaj misiris en la palacon de Laojun, kaj tie mi formanĝis la eliksirajn granolojn en kvin kalabaso- j. Mi timas, ke min punos la Ĉiela Imperiestro kaj fuĝis el la

Bonkora knabo

ANTAŬLONGE apud Yangzi-rivero estis vilaĝo, en kiu vivis patrino kaj ŝia filo. La filo, nomata Sunshu Ao, 7-8-jara, estis laborema, kuraĝa kaj bonkora. Iun matenon, kunportante malgrandan ŝpaton, li saltetante iris al kampo por fosi florojn.

Sur la kampo kreskis ruĝaj, blankaj, violaj kaj flavaj floroj, kaj inter ili flirtis papilioj. Li rigardis ĉirkaŭen kaj trovis, ke nemalproksime, apud rivereto estas tufo da fajre ruĝaj floroj. Li kun ĝojo kuris tien kaj levis la ŝpaton por elfosi ĝin. Subite li aŭdis strangan sonon. Li levis la okulojn kaj vidis, ke serpento rampas el herbaro. La serpento, en longo de unu metro, havas ruĝajn kaj verdajn makulojn sur la korpo, kaj pli terure, ĝi havas du kapojn!

Li iam aŭdis, ke dukapa serpento estas tre venena, kaj baldaŭ

mortos tiu, kiu vidis dukapan serponton. Li estis terurita kaj sin turnis por forkuri. Sed alia penso kaptis lin: "Ne, mi ne devas forkuri. Mi devas mortigi ĝin, por ke ĝi ne povu minaci aliajn." Kun tiu penso li haltis kaj fikse rigardis la serponton.

La serpento pli kaj pli proksimiĝis al li. Ĝi larĝe malfermis la buŝon kaj sibladis elŝovante la ruĝan langon.

Nun li neniom timis. Li alte levigis la ŝpaton kaj forte hakis la serponton. La serpento estis rompita kaj li frakasis la kapojn de la serpento. Li ekridis de la venko, sed pensante, ke li baldaŭ mortos kaj ne vidos plu sian patrinon, li ekploris de malĝojo.

Plorante, li fosis kaveton kaj enterigis la mortigitan serponton, por ke aliaj ne vidu ĝin.

Reveninte hejmen, li ĵetiĝis en la sinon de la patrino kaj plore rakontis al ŝi la aferon. La patrino ekridis de ĝojo kaj diris, karesante al li la kapon:

"Mia kara, vi faris bone. Vi faris bonajon, kaj vi ne mortos."

"Ĉu vere?"

"Sendube. Kiel mi povus trompi vin!"



La knabo ridis kaj neniam tiel ĝojis kiel nun.

Plenkreskinte, li ne kredis la diron, ke mortos tiu, kiu vidos dukapan serponton. Li fariĝis altranga ŝtatoficisto kaj faris multajn bonajojn por la popolo dum sia longa vivo. ■

ĉiela palaco."

Ĉiuj ekradiis de ĝojo. Ili prezentis vinojn kaj fruktojn al sia reĝo. Iu prezentis al la sanktulo ŝtonan bovlon plenan je kokosa vino. La sanktulo trinketis kaj tuj grimacis: "Ha, kia figusto! Hodiaŭ mi vidis en la portiko ekster la festenejo multe da vazoj plenaj de nektaroj. Vi ne havis la ŝancon ilin frandi. Mi iru preni kelke da vazoj por ke vi ĝuu la nektarojn kaj vivu eterne." De ĝojo ekbolis la simio-regno. La sanktulo elkaverniĝis, faris saltegon supren kaj, magie sin kaŝinte, tuj atingis la festenejon. Tie li trovis, ke la vinistoj estis ankoraŭ ronkantaj. Li ŝovis du grandajn vazojn sub la akselojn, tenis aliajn du per la manoj kaj ekflugis hejmen. Li baldaŭ revenis en la kavernon kaj regalas la simiojn per la ŝtelitaj nektaroj. Ĉiuj ricevis kelke da tasoj da nektaro kaj delektiĝis senescepte.

Post rekonsciiĝo la sep feinoj raportis al la imperiestro pri la afero kaj tuj iris raportoj al la Ĉiela Imperiestro. La imperiestro eksplodis de kolero kaj tuj sendis trupojn sieĝi la Monton de Floroj kaj Fruktoj

por kapti la simi-reĝon.

Sed la sanktulo tute malatentis la proksimiĝon de la ĉielaj trupoj. Malgranda demono raportis: "Naŭ ferocaj dioj estas defie skoldantaj ekster la kaverno." La sanktulo respondis kun rideto: "Ne zorgu pri tio." Sed tuj ĉe lia diro haste eniris alia gvatanto kun alarmo: "Avo, la malamikoj jam rompis la pordon kaj sturmas internen." La sanktulo ekbolis de kolero: "Kiel aŭdacaj tiuj fidioj! Mi ne volis batali kun ili, sed ili estas tro ofendemaj kontraŭ mi." Li ordonis rezisti kontraŭ la enrudigintoj.

La sanktulo mem eliris kun la magia bastono dika je bovlo kaj longa je 12 futoj. Jen komenciĝis la terura batalo sur la monto. La miksbatalo daŭris ĝis sunsubiro. Vidinte la vesperiĝon, la sanktulo deŝiris kelke da haroj, maĉis en la buŝo kaj sputis en murmuro de sezamo. Je tio la maĉitaj haroj transformiĝis en centojn da sanktuloj ĉiu kun magia bastono. Ili brave batalis, forpelis la ĉielajn trupojn kaj gajnis la venkon. ■

Ĉinmedicina Prevento kaj Kuracado de Oftaj Malsanoj (IV)

de DAI WEN

NAZA SANGADO

La pacientoj ĝenerale havas nazmukon kun sango kaj la seriozaj suferas de senĉesa sangado de la nazo. Ĉinmedicinaj kuracistoj ofte kuracas ilin laŭ jenaj du kazoj.

A. Varmo kaŭzita de ekscesaj patogenaj faktoroj: La pacientoj plejparte soifas, ŝatas malvarman trinkaĵon, ellasas urinon malmultan kaj flavan kaj havas ruĝan langon kun flava saburo kaj fortan pulsadon. Oni povas kuraci ilin laŭ jenaj receptoj por forigi la varmon:

1. Dekokti radikon de imperato (*Imperata cylindrica*), kalikarpon (*Callicarpa pedunculata*) kaj tropeolan floron (po 15 gramoj) kaj trinkigi la dekoktaĵon al la paciento.

2. Por kuraci pacieron suferantan de forta varmo, oni povas dekokti 20 gramojn da gipsoŝtono, 15 gramojn da radiko de remanio (*Rehmannia glutinosa*), 10 gramojn da radiko de ofiopogono (*Ophiopogon Japonicus*), 10 gramojn da radiko de aĉiranto (*Achyranthes bidentata*), 10 gramojn da radiko de imperato kaj 12 gramojn da tropeolo kaj trinkigi al li la dekoktaĵon, unu dozon ĉiutage, ĝis la resaniĝo.

B. Varmo kaŭzita de malforteco: La pacientoj plejparte soifas kaj estas en malgaja humoro, kun ruĝa vizaĝo, ruĝa lango sen saburo kaj malforta pulsado. Oni povas kuraci ilin per tonikaj kaj varmoforigaj drogherboj laŭ jenaj receptoj:

1. Enlutigi al la paciento 12 gramojn da piloloj *Liuweidihuang* kune kun dekoktaĵo de 12 gramoj

da folioj de bioto (*Biota orientalis*) kaj 15 gramoj da agrimonio.

2. Se la nazo sangas ripetfoje, oni povas stufi malgrasan viandon kun 2-3 alofloroj kaj manĝigi ĝin al la paciento.

Krome, ĉinmedicinaj kuracistoj aplikas ankaŭ jenajn metodojn por kuraci nazan sangadon:

1. Masaĝo: Plurfoje premi la glabelon alterne per la dikfingroj ĝis la harara rando kaj forte premi la akupunkturajn punktojn *yintang* ĉe la interbrovo.

2. Fadene ligi la mezan parton de la maldekstra longa fingro, se sango eliĝas tra la maldekstra naztruo, kaj ligi la mezan parton de la dekstra longa fingro, se sango eliĝas tra la dekstra naztruo.

3. Ŝmiri 30 gramojn da pistita ajlo en la maldekstra piedkavo, se sango eliĝas el la maldekstra naztruo, kaj, ŝmiri ilin en la dekstra piedkavo, se sango eliĝas el la dekstra naztruo.

4. Du homoj samtempe buŝblovas aeron en la orelojn de la paciento 10-20 fojojn.

5. Trempi bulojn de sorba kotonono en malvarma akvo kaj meti ilin sur la hararajn randojn super la aŭrikloj.

SANGOFEKADO

Sangofekado signifas, ke oni ellasas fekon kun sango aŭ nur sangan. La malsano estas plejofte kaŭzita pro manko de energio de la lieno kaj stomako, kaj ankaŭ pro akumulado de malsekeco kaj varmo en la korpo, kiu difektas la inteston kaj stomakon. La paciento suferas ofte de anusa fendigo, he-

moroidoj, anusa ptozo kaj ulcero.

Ĉinmedicinaj kuracistoj kuracas la malsanon ĝenerale laŭ jenaj du kazoj.

A. Malseka varmo: La pacientoj plejparte ellasas iam eĉ ŝpruce helruĝan sangan unue kaj fekon poste. Ili sentas akran doloron en la anuso, sufokecon, soifon kaj amarecon en la buŝo, konstipiĝas kaj ne havas apetiton. Ili ellasas urinon malmultan kaj flavan, havas ruĝan langon kun saburo flava kaj dika kaj pulsadon longan kaj fortan. Por kuraci la malsanon, oni povas uzi malsekeco- kaj varmoforigajn drogherbojn laŭ jenaj receptoj.

1. Trinkigi al la paciento dekoktaĵon de 60 gramoj da tropeolo.

2. Trinkigi al la paciento dekoktaĵon de 20 gramoj da sangvisorbo kaj 15 gramoj da soforfloro.

B. La malforta lieno: La pacientoj ofte ellasas fekon unue kaj sangan poste, malhele ruĝan aŭ nigre ruĝan. Ili sentas doloreton en la abdomeno, depresiĝas, ellasas plimalpli fluidan fekon, spiras mallonge, parolas malmulte kaj ne soifas. La vizaĝoj estas pala, la membroj malvarmaj, la lango helruĝa kaj la pulsado malforta. Por kuraci la malsanon, oni povas uzi tonikajn kaj sango-reguligajn drogherbojn laŭ jenaj receptoj.

1. Trinkigi al la paciento dekoktaĵon de angeliko kaj bletio (po 10 gramoj).

2. Trinkigi al la paciento dekoktaĵon de 10 gramoj da rostita radiko de atraktilodo (*Atractylodes macrocephala*), 10 gramoj da rostita sangvisorbo, 3 gramoj da rostita zingibro kaj 3 gramoj da rostita gliciriza radiko. ■

Abundo da Antikvaj Kasteloj kaj Pasejoj

Teksto de WANG QINGHUA kaj XU YE

Fotoj de XU JINYAN kaj XU YE

Elirinte el Henan-poŝtstacio kaj trapasinte Qingxi(Ĉingsji)-pasejon, la antikva vojo eniras en Daliang-montregionon. Laŭ la vojo montoj, valoj kaj riveretoj admirigas ĉiujn trapasantojn, ĉu antikvajn, ĉu hodiaŭajn. Nun, kiam ni paŝis en tieaj montoj, ŝajnis al ni, ke la antikvaj kaj pasejoj kaŝitaj en la profundo de valoj kaj la herboj kaj arboj starantaj en vento rakontas pri sia imponeco kaj la prosperiĝo de la poŝtvojo en historio.

QINGXI-PASEJO


La nomita pasejo famas pro sia apikeco. Pri ĝi historia kroniko notas, ke "Unu viro gardas ĉe la




Ĉe Yuexi-rivero



Sur la antikva vojo Linguan



En la vilaço Maoerdeguo



so da rokoj. La Chengdu-Kunming-a Fervojo longas je 1 085 km, kaj la pontoj kaj tuneloj havas totalan longon de pli ol 400 km. El la sekcio de 24-km-a fervojlinio ĉe la apika bordo de Dadu-rivero estas 21 km. da tuneloj. La fervojo serpentas en tri niveloj de la monto. Dum veturado, la trajno, aŭ kun sia kapo kaŝita en tunelo aŭ kun sia vosto ekstere, estas dividita en kelkajn partojn. Kia spektaklo! Bruado de la trajno estas timiga. La haltejoj grandaj kaj malgrandaj de la fervojo rememorigas antikvajn pasejojn kaj poŝtstaciojn.

La montoj kaj riveroj akompanas unu alian kaj la belaj pejzaĝoj donas sennombrajn imagojn. La ŝoseo kaj fervojo kune iras antaŭen, ĉio ĉi aliigis la fizionomion de Qingxi-pasejo.

pasejo, dekmil viroj ne povas ĝin konkeri." En Tang-dinastio (618-907) leviĝis Nanzhao-regno en sudokcidenta Ĉinio. Post kiam la loka reĝimo de nacimalplimulto potencigis en la regiono Erhai de Yunnan, ĝi faris atakon en ĉiuj direktoj kaj ofte ekspediciis norden, kio devigis Tang-dinastion, iam tre prosperan, fari ĉion eblan por reagi on eblan por reagi. La taskoj de kelkaj militaj gubernatoroj de Xichuan (Ŝjiĉuan) ja estis konstrui Qingxi-pasejon kaj garnizonigi en ĝi fortajn trupojn, por bari al Nanzhao la vojon.

Kie estis la ĝusta situo de la impona kaj apika Qingxi-pasejo? Pri tio diversdinastiaj historiistoj havis malsamajn opiniojn, sed ilia pli malpli identa opinio estas, ke ĝi situis en Haitang-urbeto de Ganluo-gubernio, Ĉinio.

Haitang estas ordinara malgranda urbeto, tie ne vidiĝas krutaĵoj nek pasejoj, sed etendiĝas la dezerta antikva vojo kaj maldense kreskas herboj kaj arboj. Kun paso de tempo ĝi jam ĉesis esti loko strategie grava - ĉio antaŭa fariĝis neimagebla

Ĉe Qingxi-pasejo la Hanyuan-Ganluo-a Ŝoseo kaj Chengdu-Kunming-a Fervojo iras laŭ la antikva vojo. La du trafikaj arterioj en sudokcidenta Ĉinio estas same danĝeraj kiel la antikva vojo. La ŝoseo kaj fervojo iras ambaŭflanke de la rivero. Rigardante al la kontraŭa bordo sur la ŝoseo, oni povas vidi multajn relojn kaj interligitajn tunelojn kaj amason post ama-

Ni venis al Maoerdeguo, vilaĝo de ĵi-oj, kun pli ol 30 familioj. Ni informiĝis de lokanoj, ke tie okazis granda ŝanĝiĝo. La ĵi-aj junuloj portas sur si veston tute similan al tiu de tieaj hanoj. La antaŭaj ĉevalĉaristoj stiris mantraktorojn sur la asfaltita ŝoseo por transporti ferroercojn. Multaj familioj en la vilaĝo transloĝiĝis en novajn domojn. Ili, laŭ malnova moro, algluis al la

Antikva ponto en Zhongsuo-urbeto



pordo faskon da kokoplumoj por forigi malfeliĉon.

LINGGUAN-ROKO DE YUEXI

Veturinte de Ganluo-guberniurbo 79 km, ni atingis la guberniurbon Yuexi. Ĝi estis poŝtstacio sur la antikva vojo.

Sude de la urbo sin trovas la antikva urbeto Zhongsuo.

Ĝi estis armea garnizonejo de Ming-dinastio (1368-1644) en la sudokcidenta limregiono. Tiam, granda nombro da armeanoj kun siaj familianoj loĝis laŭ la antikva vojo kaj apud trafikaj pasejoj por vigligi la trafikon kaj teni stabilecon de la regiono. Poste, nemalmultaj el tiuj armeaj garnizonejoj fariĝis urbetoj. Zhongsuo-urbeto estas malgranda. La lokanoj akceptas ĉiun ajn alilokanon kun honesta rideto.

Antaŭ la urbeto kuŝas ponto el grandegaj longaj ŝtonplatoj. Ĝia formo estas tre antikva. Sur la ŝtonplato antaŭ la ponto okulfrapas la 70-cm-aj kvadrataj ĉizitaj ideografiaĵoj "Ling Guan". Iuj opinias, ke la nomo de la antikva vojo "Lingguan" ja devenis de "Ling Guan". Fakte, ili eraris. Lingguan-vojo ricevis sian nomon pro la stria ĉielo de Lingshan-monto en Lushan-gubernio, Sichuan(-Siĉŭan)-provinco, kaj la dangereco de ĝiaj pasejoj kaj ravinoj. La ideografiaĵoj "Ling Guan" estis ĉizitaj de posteuloj kaj tre signifaj por doni ian edifon al pasantoj.

Flanke de la ŝtonplato ofte aperis versduoj kaj bondeziraj vortoj por feliĉo kaj sekureco sur ruĝaj slipoj. Per ili estas facile kompreneble, kiel grandan zorgon oni donis al siaj familianoj irantaj sur tiu trafiklinio. Homoj, kiuj estis longtempe for de siaj familioj, tuj sentis varmon en la koro, kiam ili legis tiujn bondezirajn vortojn. Nun la malnova vojo por karavanoj estis antaŭ longe anstataŭigita per nova ŝoseo, kaj la karavanoj

plejparte per aŭtoj, traktoroj kaj aliaj trafikiloj.

Trairinte Zhongsuo-urbeton, la antikva vojo suriras la Malgrandan Xianggong(Ŝjanggong)-montaron. Ĝi, longa pli ol 40 km de sude norden, sterniĝas en Yuexi (Jŭeŝji), Xide kaj Xichang (Ŝjiĉang) kaj kuŝas kontraŭ la Granda Xianggong-montaro en Hanyuan. La vojo sur ĝi estas kruta, danĝera kaj malfacile irebla. Laŭ la vojo vidiĝas nemalmultaj ruinoj de gvertejoj kaj antikvaj kasteloj. Tiuj militaj konstruaĵoj, antaŭ longe detruitaj, ludis sufiĉe gravan rolon trafike kaj milite en la antikveco.

LA ANTIKVA KASTELO DENGXIANGYING

Transpasinte la Malgrandan Xianggong-montaron, la antikva vojo eniras mallarĝan profundan valon. Inter la montoj subite aperas la alta antikva kastelo Dengxiangying, bone konservita, sur la Suda Silka Vojo.

La kastelo estas ĉirkaŭita de altaj montoj. Ĝis nun estas bone konservitaj la kreneloj de la kastelo. Apud ĝi verdas altaj poploj, pepas kukoloj kaj lirlas riveretoj. Mito diras, ke la antikva kastelo estis fiŝo. Ĝia buŝo estis la norda pordo, ĝia vosto — la suda pordo kaj ĝiaj flankoj — stratoj kaj butikoj. Tio vere estas tre figura komparo. Tamen, ĝi jam dekadencis antaŭ tre longe, nun tie loĝas nur 27 familioj kun pli ol 100 homoj.

Liangshan-regiono abundas je pasejoj kaj antikvaj kasteloj. Antaŭe, iuj karavanoj trapasantaj la lokon havis, krom armiloj, ankaŭ interpretistojn. Tiam ji-oj estis malmamikaj al han-oj. Han-aj komercistoj devis pagi por sekurigi sin en tiu ĉi regiono, alie ili ne kuraĝis negoci en Liangshan. Tamen, tie cirkulis la proverbo: "Ji-oj estis nedisigeblaj de han-oj kaj la han-oj nedisigeblaj de ji-oj; ji-oj bezonas salon kaj han-oj peltaĵojn." Aŭdinte tiun proverbon, alilokanoj sentis sin fieraj, kvazaŭ ili mem




Ji-a kamparano en foiro

fariĝus la mastroj, kaj iom post iom alproksimiĝis al la lokaj ji-oj. Iu maljunulo kun longa pipo kiel apogbastono demandis: "Kiel vi opinias pri la loko?" Ni senpripense respondis: "La loko aspektas tre malriĉa, tamen la lokanoj estas aparte amikaj al alilokanoj." "Jes, ĉiuj alilokanoj tion diris," rideto ludis sur liaj lipoj.

Jes, en la montaro ni sentis nin ege ĝojaj, ĉar tie vivas ne nur gastamaj homoj, sed estas ankaŭ ĉarmaj pejzaĝoj. Sur la ĉielo ŝvebas maldensaj nuboj, kaj sterniĝas vasta montaro. Rigardate de malproksime la ŝafaroj paŝtigantaj en la montvaloj kaj sur la terasoj ŝajnas blankaj nuboj sur verda tapiŝo. Paŝtistoj en ŝafeloj kantas el la plena gorĝo. Ilia kantado longe resonadas en la ĉielo. ■

La antikva kastelo Dengxiangying



Vendisto de ji-aj ornamoj

Ji-a paŝtisto



Floraj kaj Birdaj Pentraĵoj de Ĉinio (II)

de WANG XIUQIN

PENTRISTO Qian Xuan (Ĉjan Ŝĵuan) vivis en la fino de Song-dinastio kaj la komenco de Yuan-dinastio (1271-1368) kaj estis lerta en pentrado de floroj, herboj, legomoj kaj fruktoj. Liaj pentraĵoj sin karakterizas per belaj koloroj, mildaj kaj fortaj linioj kaj dekoracia gusto.

En Yuan-dinastio, kun la disvolviĝo de tuĉa pentrarto, ekfuroris

floraj kaj birdaj pentraĵoj kun nigra koloro kiel la ĉefa. Bambuoj, umeffloroj k. a. estis rigardataj kiel simbolo de nobleco kaj uzataj de literaturistoj kaj pentristoj por memlaŭdo. Tial furoris tuĉpentraĵoj kun temo de bambuoj en Yuan-dinastio. Wu Zhen (U Ĝen), Ke Jiushi (Ke Ĝiushi) kaj Li Kan estis fame konataj bambupentraĵaj majstroj. Li Kan verkis Libron "Pri Bambuoj", kiu detale rakontas

liajn observojn pri bambuoj kaj teknikojn en pentrado de bambuoj. La fama pentristo Zhao Mengfu (Ĝaŭ Mengfu) estis ankaŭ lerta en pentrado de bambuoj, floroj kaj birdoj, liaj verkoj estas satüre tuĉitaj kaj belaj. Wang Mian estis fama pentristo de umeffloroj. Umeffloroj sub lia peniko estas vivoplenaj. Wang Yuan estis majstra en pentrado de floroj, birdoj, bambuoj kaj ŝtonoj, liaj pentraĵoj fi-

Birdoj kaj bambuoj (Yuan-dinastio)

de WANG YUAN



Birdoj sur arbo (Ming-dinastio)

de LŬ JI (1477-?)



dele prezentas la naturon.

En Ming-dinastio (1368-1644) la ĉefaj pentristoj de floroj kaj birdoj estis Bian Jingzhao (Bjan Ĝing-ĝaŭ), Lü Si (Lju Si), Lin Liang, Xu Wei (Ŝju U/ej), Chen Chun (Ĉen Ĉun), Lu Yi, Zhou Zhimian (Ĝoŭ Ĝimjan) k. a.

Bian Jingzhao estis majstro de delikatliniaj kaj denskoloraj floroj kaj birdaj pentraĵoj. Liaj verkoj havas malhelajn kaj belajn kolorojn. Li povis pentri plurspecajn birdojn en unu bildo. Oni diris, ke la beleco de floroj, flugado kaj pado de birdoj, foliaj dorso kaj fronto kaj florbutonoj sub lia peniko estis ekskluzive vive prezentitaj. Lü Si ofte pentris feniksojn, gruojn, pavojn kaj mandarenajn anasojn kun floroj kaj arboj. Li povis fari delikatliniajn kaj liberstilajn pentraĵojn per fluaj strekoj. Li uzis du malsamajn pentroteknikojn en sia verkado kaj kreis novan prezentan formon de flora kaj birda pentrarto. Lin Liang koloruĉe pentris florojn, birdojn, fiŝojn kaj insektojn per liberstilaj teknikoj. La de li pentritaj birdoj, arboj kaj ŝtonoj estas kun simplaj strekoj kaj helaj koloroj.

Xu Wei disvolvis floran kaj birdan pentrarton post Lin Liang. Li kreis grandliberstilan tuĉpentran metodon, kiu povas plene montri apartan efikon de peniko, tuĉo, papero en la ĉina pentrarto. Li strebis montri belecon de lotusfloroj per variaj nigratuĉaj koloroj. Chen Chun estis lerta en liberstila pentrado de floroj, precipe en skizado. Li tuĉis per helaj koloroj, eĉ unu floro, unu folio de lia pentraĵo montras belecon. Liaj pentraĵoj reprezentis la novan stilon de liberstilaj floroj tuĉpentraĵoj en la meza periodo de Ming-dinastio. Lu Yi famis per siaj delikataj belkoloraj floroj kaj birdaj pentraĵoj. Liaj pentraĵoj, kvankam linie konturitaj, estas naturaj kaj riĉaj je viveco. Liaj samtempuloj opiniis, ke li estis majstra pentristo same kiel Chen Chun.

En la lasta periodo de Ming-

dinastio, majstro de floroj kaj birdaj pentraĵoj Zhou Zhimian kreis delikatlinian liberstilan metodon. Li ofte observis birdojn, tial liaj pentraĵoj estis riĉaj je viveco. Pentrante florojn, li ofte tuĉlinie konturis petalojn kaj uzis punktan tuĉadon por prezenti foliojn, la koloroj de liaj verkoj estas helaj kaj belaj. Oni nomas lin kaj liajn sekvantojn la flor-kontura kaj folipunkta skolo.

La delikatlinia konturarto de Bian Jingzhao, liberstila tuĉarto de Lin Liang kaj flor-kontura kaj folipunkta pentrarto de Zhou Zhimian estis tri ĉefaj skoloj de floroj kaj birdaj pentraĵoj en Ming-dinastio.

En Qing-dinastio (1644-1911) la flora kaj birda pentrarto faris grandan paŝon antaŭen kompare kun tiu en Yuan- kaj Ming-dinastioj. La verkoj de Zhu Da kaj Shi Tao en la komencaj jaroj de Qing-dinastio estas senbridaj kaj mornaj. La pentristoj kreis novan stilon depost Yuan- kaj Ming-dinastioj. En siaj verkoj Zhu Da uzis plejparte nigran tuĉon por montri senbridan, varian stilon kaj doni poezian impreson. Liaj pentraĵoj sin karakterizas per troigo. Fiŝoj, papagoj, anasoj k. a. sub lia peniko kun grandaj nigraj okuloj levas la kapon supren, kvazaŭ rigardas ion. Shi Tao estis lerta en pentrado de floroj, fruktoj, orkideo kaj bambuoj. Liaj verkoj vidiĝas apartaj kaj belaj.

En la komenca periodo de Qing-dinastio iuj pentristoj influitaj de la okcidenta pentrarto rompis katenon de la tradiciaj pentrartaj stiloj kaj kreis tute novan, originalan stilon. Inter ili la ĉefa reprezentanto de floroj kaj birdaj pentraĵoj estis Yun Shouping (Jun Ŝoŭping). Li kreis skizan pentrmetodon sen tuĉlinia konturado. La floroj sub lia peniko estas graciaj, helkoloraj, belaj kaj perfektaj en formo kaj spirito.

En tiu periodo aperis ankaŭ pentristoj, kies verkoj markis profundan ŝanĝon per riĉa individueco kaj nova spirito. Ili loĝis plejparte


en la komerca urbo Yangzhou (Jangĝoŭ) en la malsupra baseno de Yangzi-rivero kaj oni nomas ilin "Yangzhou-skolo". Heredinte la pentrajn teknikojn de Xu Wei, Chen Chun kaj Shi Tao, ili kreis siajn verkojn per senbrida kaj miriga tuĉado. Inter ili Zheng Banqiao (Ĝeng Banĉjaŭ) estis lerta en pentrado de orkideo kaj bambuoj. Li adoptis ĉinan kaligrafion en sia pentrado, la pentritaĵoj de lia verko ĉiam sin montras en ordo, harmonio kaj forteco, per kiuj la pentristo esprimis sian senŝanceliĝemon kaj rigidnukan karakteron. Li Shan kunfandis poezion, kaligrafion kaj pentrarton en unu tuton kaj formis sian liberan, senbridan stilon, literaturistan stilon. Li malfermis novan kampon por grandliberstilaj floroj kaj birdaj pentraĵoj.

Alia majstro de floroj kaj birdaj pentraĵoj Hua Yan, kiu longe loĝis en Yangzhou, famis same kiel Yun Shouping. Li estis lasta influhava pentristo de la tradiciaj floroj kaj birdaj pentraĵoj. Li alte taksis skizadon kaj originalan komponon de pentraĵo kaj ofte uzis sekan tuĉadon kaj helajn kolorojn, liaj pentraĵoj estis serenaj, belaj kaj riĉaj je ŝanĝiĝo. Li estis grava pentristo ekster Yangzhou-skolo kaj faris kontribuon al akcelado de la disvolviĝo de flora kaj birda pentrarto.

En la lastaj jaroj de Qing-dinastio aperis famaj pentristoj Xu Gu (Ŝju Gu), Ren Bonian (Ĵen Bonjan), Zhao Zhiqian (Ĝaŭ Ĝiĉjan), Wu Changshuo (U Ĉang-ŝuo) k. a. en la industria kaj komerca urbego Ŝanhajo. Iliaj verkoj plejparte estas liberstilaj, kun belaj, helaj koloroj kaj vivecaj figuroj. Xu Gu estis lerta en pentrado de floroj, fruktoj, birdoj kaj fiŝoj, li uzis sekan kaj penik-flankan tuĉadon, helajn kolorojn kaj iam forte kontrastajn kolorojn. La stilo de liaj verkoj estas malvarma kaj kurioza. Zhao Zhiqian lertis en pentrado de floroj, legomoj kaj fruktoj. Liaj verkoj karakteriziĝas per flua tuĉado, fortaj koloroj kaj simpleco. Li malfermis novan

kampon de liberstilaj floraj kaj birdaj pentraĵoj de la lastaj jaroj de Qing-dinastio. Ren Bonian majstris en pentrado de homfiguroj, floroj kaj birdoj. Li emfazis skizadon kaj mikse uzis delikatlinian konturadon, punktotuĉadon kaj verŝtuĉadon, ke liaj verkoj havas helajn kolorojn, versimilajn figurojn kaj originalan stilon. Wu Changshuo

Krabo kaj lotusfloro (Ming-dinastio)
de XU WEI (1521-1592)



ensorbis fortaĵojn de aliaj pentristoj kaj uzis la ĉinan kaligrafion en sia pentrado, liaj verkoj saturitaj de koloroj kaj tuĉo montras simplan, krudan kaj naturan belon. Lia arta stilo havis grandan influon en Ĉinio kaj Japanio.

Ren Bonian, Wu Changshuo kaj iliaj sekvantoj formis Ŝanhaj-

skolon, en kiu ili estis gvidantoj siatempe. Ilia komuna trajto estis tio, ke ili, ne katenitaj de rutinaj pentraj teknikoj, strebis al nova esprimo kaj nova arta stilo laŭ siaj propraj spertoj kaj kompreno pri la vivo.

La nunaj ĉinaj pentristoj heredis, disvolvis la eminentan tradi-

Bambuoj (Qing-dinastio) de ZHENG BANQIAO (1693-1732)





Krizantemoj kaj bambuoj (Nuntempo) de **PAN TIANSHOU** (1897-1971)

cion de la pasintaj ĉinaj floraj kaj birdaj pentristoj kaj kreis novajn florajn kaj birdajn pentraĵojn kun moderna spirito. Kaj aperis nombro da elstaraj majstroj, kiaj Qi Baishi (Ĉji Bajŝi), Chen Banding, Pan Tianshou (Pan Tjanŝou), Gao Jianfu (Gaŭ Ĝjanfu), Wang Xuetao (U/ang Ŝjüetaŭ), Li Kuchan k. a. Inter ili Qi Baishi ĝuas la plej vastan reputacion en la nuna mondo. La de li pentritaj salikokoj, lo-

tusfloroj, peonioj kaj visterioj ne aspektas samkiel la realaj, sed donas sentan efekton al rigardantoj per siaj koloroj. La melonoj, fruktoj kaj legomoj en liaj pentraĵoj donas estetikan ĝuon per lakona, simpla kaj lerta tuĉado kaj originala komponado. Pan Tianshou heredis la eminentan tradicion de la majstroj Shi Tao, Zhu Da kaj Wu Changshuo de Qing-dinastio, emfazis originalecon, prezentadon

de la penso de aŭtoro kaj forto, kaj atingis altan nivelon en flora kaj birda pentrarto. Li prezentis imponecon kaj firman karakteron per kruta rokmuro, ŝtonego, kurioza pino aŭ vulturo kaj montris vivforton per ruĝa lotusfloro, floreto, herbeto aŭ saltonta rano.

La nunaj floraj kaj birdaj pentraĵoj de Ĉinio progresis en esploro pri temoj, teknikoj kaj esprimaj manieroj. ■



Pino, simbolo de longviveco (Qing-dinastio) (1844-1927)


de WU CHANGSHUO



Alcedo rigardas salikokojn. (Nuntempo) de QI BAISHI (1863-1957)

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Samaĝaj ĉevalo (Kalif) kaj hundo (Paco) ludantaj
de **GIUSEPPE TRAMBAIOLO**
(Italio)



Stonehenge — antikva monumento
de **SIMON HEWITT** (Britio)

